

**La sekreto de Luka**

**de**

**Ignazio Silone**

**tradukis Daniele Mistretta**

## Ĉapitro unu

Per paŝo malrapida sed regule takta, la maljunulo supreniris la lastan parton de la kruta roka pado. En la punkto kie ĝi unuiĝis al veturebla strato, sur soklo ŝtona elstaris granda kruco fera.

La viro haltis apude por reakiri spiron kaj sekigi ŝviton. Malantaŭ la kruco estis kaŭranta virino. Temis pri juna kamparanino nigre vestita kun blanka tuko surkape. Ne estis klare ĉu ŝi ripozis aŭ preĝis. Ĉe ŝi estis granda korbo da ruĝaj kapsikoj. Sur la krucosoklo estis gravuritaj ĉi tiuj vortoj: Memore de la Misiejo de la Pasionistaj Pastroj – Karesmo 1900.

La rigardo del la viro fiksiĝis al la skrikaĵo. Dume la virino observis la nekonaton. “El kie vi venas?”, ŝi lin demandis.

Sed la viro ne respondis. Li aspektis kiel viro sepdekjara, malriĉega sed sana, alta kaj fortika, certe ankoraŭ laborkapabla, kvankam la metion oni ne povis diveni. Malofta kazo inter la kamparanoj de ĉi tiu regiono, li ne portis kapkovrilon. Liaj haroj estis grizaj kaj tre mallongaj, la barbo kelktaga, la piedoj nudaj. Lia vesto aspektis pura sed eluzita kaj flikita; plej strange estis ke, malgraŭ la granda varmo de la sezono, ĝi konsistis el dika ŝtofo. Elde ŝultro pendis eta sako en kiu videblis bulko el blanka pano kaj ŝu-paro.

La virino serĉis moneron en la jupopoŝo kaj ĝin proponis al la nekonato. “Prenu” ŝi diris etendante al li brakon. Lia embaraso estis tuj videbla. “Ho, ne”, li diris, “tute ne necesas”.

Tiu malakcepto mirigis la virinon.

“Tion mi ne faris por vin humiligi”, ŝi pardonpetis. Poste aldonis: “Ĉu vi venas de malproksime? Ĉu vi konas ĉi regionon?”.

La viro ne respondis, kvazaŭ li ne aŭdintus, kaj ekpaŝis por ree iri sian vojon sed, levinte la rigardon al la monto, kiu nun staris antaŭ li, abrupte haltis.

“Ho”, li alparolis la virinon “kaj la arbaro?”

“Ĉu vi ne eksciis pri tio?” respondis la virino.

La viro skuis plurfoje la kapon. La ĝiba monto staris antaŭ li nuda kaj nigra, Nur tie kaj tie videblis kelkaj mizeraj veproj senkoloraj. “Ĉu bruliĝis?”, demandis la viro pene kaj horrorplene. “Ĉu la milito?”.

“Ne”, diris la virino “neniu scias kiel. Eble dia malbeno.”

“Kiam tio okazis?” , demandis la viro.

La virino ekpensis iomete. “Mi ne memoras la jaron, nek la sezonon”, ŝi respondis post pripenso. “Sed mi memoras, ke estis vendredo.”

“Da vendredoj estis certe multaj dum la pasintaj jaroj”, diris la viro fikse rigardante la senvivan montoflankon.

“Certe, sed ĉu ja ne temas ĉiam pri la sama vendredo, kiu ripetiĝadas?”

La viro pluiris sian vojon laŭ la pado enfosita en la monto.

Ĉe la unua kurbo, sur antaŭa monteto, aperis al li la tuta vilaĝo. Tabulo alnajlita al paliso indikis ĝian nomon:

Cisterna dei Marsi  
alteco super maro 950 m

Deskre kaj mal de la strato etendiĝis nur brulitaj stoplejoj, malfortika migdalujo kaj morus-veproj. Antaŭ ol atingi la montopiedon, la strato pasis ŝton-ponton, sub kiu, en profunda fluejo, lirlis roĵo. La viro malsupreniris laŭ ŝtupopado ĝis ties bordo kaj tie serĉis iom da pura spaco por apogi la tolsakon.

Precize sub la ponto la roĵo falis el roka vandeto kaj formis etan basenon profundan kaj travideblan. Por mergi la piedojn lacajn kaj polvo-plenajn, li sidiĝis sur herbaj terbuloj del la bordo kaj surkuspis la pantalonojn ĝis la genuojn. La frida fluo certe impresis lin agrable ĉar li tuj komencis movi la krurojn en la akvo per knabaĝa viglo. Tiam li fermis la okulojn kaj ridetis. Sed post kiam li lasis la piedojn sekiĝi je la suno, estis por li pene ilin reenŝovi en la ŝuojn elprenitajn de la sako. La ceteraj lavadoj por refreŝigi la manojn, la vizaĝon, la nukon, estis pli rapidaj. Post tio li akiris pozicion por ektrinki: li tute sterniĝis kaj per la supra korpoparto elkliniĝis al la roĵo ĝis li tuŝis akvon per la lipoj. Li trinkis longglute, kiel ĉevalo fine de longa labortago. En la momento, kiam li ree staris kaj viŝis la buŝon, iu lin alparolis. Je malmultaj paŝoj de li, ombre de akacio, kuŝis surherbe viro, kiun li antaŭe ne rimarkis. "Estas la fontano", tiu diris. "por trinkado estas la fontano ĉe la vilaĝ-enirejo."

"Ha, nun vi havas fontanon?", la viro respondis.

"El kie vi venas?" la alia aldonis. "Kiun vi serĉas?"

Senresponde la viro rapidis supren denove ĝis la strato kaj atingis la unuajn domojn de la vilaĝo. Estis la varmegaj posttagmezaj horoj, letargiaj horoj de morto ŝajna. La vilaĝo aspektis neloĝata. La stratoj tute senhomaj, pordoj kaj fenestroj fermitaj, silentaj. Laŭ la ĉefa strato novaj dometoj, ĵus finmasonitaj, alterniĝis al la antikvaj, al ruinaĵoj kaj al barakoj. Ene de la vilaĝo, la paŝo de la viro fariĝis neregula, jen rapida kaj nervoza, jen lanta kun subitaj haltoj. Antaŭ la vakuo de kelkaj iamaj loĝejoj nun tute disfalintaj, li restadis rigardante al la malaperintaj fenestroj kaj balkonoj. Li marŝis meze de la strato. En tiu blindiga lumo, en tiu soleco de ruinoj kaj muroj, neniu lin rimarkis. Li aspektis kiel fantomo, kiel vaganta animo. Alveninte antaŭ la malnova preĝejo li kelkmomente meditis kaj poste direktiĝis al la pastrodomo. Sed kiel atingi la enirejan sonorilon? Viro duone kovrita per ĉifonoj dormis antaŭ la sojlo, en la polvo, inter muŝoj; li estis maldika kaj nigra, li aspektis kvazaŭ brulita kadavro. Sufiĉis tamen la sola ombro de la nekonato, por lin vekti.

"Kion vi serĉadas nun?", li murmuris ĝenite apenaŭ malferminte la palpebrojn.

"La paroĥestron."

La viro iom grimacis senespere.

"Kiomfoje mi devos ripeti", li flustris, "ke almoztago esta vendredo?"

La alia insistis:

“Ĉu mi ne povas paroli kun la paroĥestro?”

“Ĉi hore pastro Franko dormas”, respondis la viro plende. “Ja kiu ne dormas ĉi hore?”

La alian tamen interesis klarigo.

“Kiu viadire esta la nomo de la paroĥestro?”, li demandis?

“Pastro Franko, kun via permeso.”

“Ĉi-kaze pardonu la ĝenon”, diris la alia. “Ne estas li, kiun mi serĉis.”

Li iris returnen cirkaŭ la preĝejo kaj eniris la implikaĵon da stratetoj de la plej antikva parto de la vilaĝo, mallarĝaj kiel koridoroj.

Lia paŝo eĥis sur la pavim-ŝtonoj kiel tiu de nokta vojiranto. En tiu silento aŭdiĝis subite la malfermo de ŝutroj el unuetaĝa balkono de malnova domo, kaj tiam vidiĝis virino nigre vestita, alta, madika kaj videble blinda, kiu alproksimiĝis al la balustrado kaj alklinis la vizaĝon kun malplenaj okulkavoj direkte de la paŝobruo.

“Kies estas ĉi paŝoj?”, laŭtis kriĉanta voĉo. “Viro, mi jam aŭdis vian paŝon.”

La paŝoj subite haltis. La viro restis senmova, kvazaŭ ŝtoniĝinta, meze de la strato, kun rigardo fiksa al la subita alparolantino.

“Ĉu estas vi?” demandis plurfoje la virina voĉo per peteganta kaj maltrankvila tono. “Ĉu estas vi?”

Sed post nelonge aperis flanke de ŝi junulineto, kiu per dolĉaj vortoj kaj movoj klopodis ŝin konvinki reeniri.

“Estas vagemulo”, diris la knabino. “'stas nur vagemulo.”

“Estu singarda pri falsaj vagemuoj”, kriis la blindulino plu ne konvinkita.

La viro ne moviĝis ĝis kiam li vidis la balkon-ŝutrojn tute fermitaj, poste li rekomencis sian iron, sed per pli malpeza paŝo, preskaŭ piedpinte. Lia celo estis placeto ne fora de tie, kies tri flankoj estis nur amaso da ruinaĵoj. En la lasta flanko staris la restaĵo de humila domo, kies pordon riglis ligna lato alnajlita al la du klapoj. La sola saviĝinta etaĝo havis flankon disfalintan kaj restis malfermita al ŝtormoj kaj herbaĉoj.

La viro apogis la sakon tere kaj ekprovis per pluraj puŝoj de mano kaj ŝultroj la solidecon de la lato kunfermanta la pordon. Sed ĝi estis el dura ligno, kaŝtana aŭ faga kaj la najloj estis dikaj, rustaj kaj profunde enigitaj.

“Forĵetita forto-streĉo” al li kriis iu alveninte nerimarkite ĉe lia dorso. “Mi konas la internon”, tiu aldonis ridante, “estas plu nenio inda”.

Tiu estis knabeto sen ŝuoj nek ĉemizo, kun hararo nekombita kaj mallongaj pantalonetoj surtenitaj de ŝelkoj el ŝnuro. Li elsaltis el la amaso da ruinaĵoj apudaj kaj de tiu ruinaĵoj havis la teran koloron survizaĝe. La viro tamen klopodis disbati la pordon per kelkaj ŝultro-batoj.

“Tre taŭgus fer-bastono”, diris la knabo kaŝante ion malantaŭ sia dorso.

“Fer-bastono, jes” diris la viro, “sed kiel trovi ĝin?”

“Se vi konsentos fariĝi mia amiko, mi pruntos al vi la mian” diris la knabo montrante la objekton, kiun li estis kaŝinta.

“Dankon”, diris la viro kaj scivoleme: “Kiu esta via nomo?”

“Toni. Kaj la via?”

“Luka. Kiu estas via patro?”

“Mi ne scias. Mia kromnomo estas Dura Kapo.”

La viro ridetis.

“Mi ne tion diras kiel memlaŭdo, nek por kompari min al vi”, li klarigis, “sed je via sama aĝo, mi ankaŭ meritis la saman kromnomon.”

Toni ekridis, sulkigante la kotomaskon algluitan al la vizaĝo; lia okuloj estis verdaj, vere maloftaj, ili donis al li aspekton ruzan kaj viglan.

“Ĉu vi kapablas esti vera amiko?”, li demandis la viron gravmiene. “Ĉu vi respektas interkonsentojn?”

“Mi kredas ke jes.”

“Ĉu vi kapablas gardi sekretojn?”

“Toni, mi kredas ke jes. Ĉu pliajn demandojn?”

“Nun povas sufiĉi. Ni ne havas multan tempon antaŭ ĉiuj revekiĝos.”

## Ĉapitro du

“Mi vin tuj ricevos”, diris la urbestro al la delegitaro de la veteranoj atendanta en la koridoro antaŭ la pordo de lia oficejo. “Mi bezonas nur du minutojn plu, estu paciencaj.”

“Unue la karabinjeron, kaj nur poste nin, ĉu?”, protestis unu el la grupo.

La urbestro devigis sin rideti al ili per sia pala kaj ŝvita vizaĝego, poste refermis la pordon malantaŭ si kaj reiris al la skribotablo.

Apud ĝi sidis la ĉefserĝento del la karabinjeroj, ankaŭ li ŝvita kaj laca pro la varmego.

“Ĉu vi aŭdis?” diris la urbestro “Ankoraŭ ne estas monato, ke mi surprenis ĉi oficon kaj mi jam ne plu eltenas.”

“Servi la popolon lacigas”, flustris la ĉefserĝento kun ero da ironio.

“Kion ili postulas?”

“Foriri, elmigri”, grumblis la urbestro.

El la larĝe malfermita fenestro alvenis varmoblovo, kiel el forno-pordo.

“Ĉu oni ne povas fermi?”, petegis la ĉefserĝento.

“Ne plu enirus aero”, diris la urbestro. “ Se vi volas, mi havigos al vi sod-akvon.”

“Ho, vi ĝin nomas aero”, diris la ĉefserĝento.

Malgraŭ la juna aĝo kaj fortika aspekto, ankaŭ la urbestro estis lacega, eĉ deprimita. “Pardonu” li diris, kaj forprenis jakon kaj kravatton kaj ĵetis ilin sur

skribmaŝinon. La ĉemizo strikta, tute malseka kaj travidebla pro l'ŝvito, ĉirkaŭvolvis lian graseta torakon kvazaŭ oleumita papero. La impresio estis naŭza kaj la ĉefserĝento ne kaŝis grimacon.

"Tiu afero", diris la urbestro, "ĉion konsiderinte, min tute ne interesas, eĉ ne koncernas min."

"Kiu afero?" demandis la ĉefserĝento, "mi konstatas, ke vi min ne komprenis."

"Mi celas la kazon pri tiu ulo -kiu esta lia nomo?- finonta sian punon en malliberejo."

"Elironta el malliberejo post tut-viva puno", lin korektis la ĉefserĝento.

"Por mi esta same. Min ne tuŝas, mi ripetas. Lia krimo ne estis politika."

"Nek politika, nek ordinara", klarigis la karabinjero. "Vi scias kiel mi, ke li eliras el malliberejo, ĉar oni lin rekonsis senkulpa."

"Bone, mi pasos lian nomon al la Komunuma Instituto por Asistado", diris la urbestro. "Ĉu tio ne sufiĉas? Ni havos plian almozulon."

"Publika ordo ja ne estas tasko de Instituto por Asistado", aldonis la ĉefserĝento.

"Publika ordo? Do la reveno de senkulpulo povus ŝanceli la publika ordon? Laŭ vi oni do devus lin lasi en malliberejo?"

"Vi min deprimas", diris la ĉefserĝento. "Se vi preferas ni povos paroli pri tio ĉi vespere, kiam estos mapli varme."

"Ĉu vi min trovas stulta?" demandis la urbestro ridante. "Atendu, mi petas, residiĝu. Bone, klarigu al mi vian vidpunkton. Se vi deziras, mi portigos sodakvon."

"Mi aludis al la impresio ĉe la vilaĝanoj pri la simpla informo de l'baldaŭa reveno de tiu viro", provis klarigi la ĉefserĝento. "Certe vi tion ne malrimarkis."

"Envere, kiu do memoras tiun viron?", demandis la urbestro. "Oni lin kondamnis antaŭ kvardeko da jaroj. Kiu lin konas?"

"La maljunuloj. Ĉu vi ne rimarkis la efekton de la novaĵo ĉe la majunuloj?"

"Mi ne pripensis tion. Fakte ĉi vilaĝo estas plena je majunuloj. Bone, kion ili diris?"

"Nenion, kaj ĝuste tio zorgigas. Ili eĉ timas paroli pri tio."

"Niaj maljunuloj, vi ja scias, ne estas parolemaj homoj. Esta tiel malfacile interpreti ilian silenton. Kelkfoje ili ŝajne primeditas teruraĵojn, sed eble ili pensas pri nenio. Kiamaniere scii?"

Oni tiam frapis plurfoje la pardonon tre forte.

"Momenton, momenton!" kriis la urbestro incitite.

"Mi vin lasas al viaj urĝoj", diris la ĉefserĝento ekstarante kaj montrante la pardonon.

"Ne, ne", diris la urbestro "Temas pri senlaboraj veteranoj, ili havas eĉ troan liberan tempon. Do residiĝu kaj diru al mi sincere, kio vin timigas."

"Se nur temus pri silentado...", klarigis la karabinjero, "sed ilia evidenta embaraso, iliaj nekapteblaj rigardoj tuj kiam oni parolas pri tiu viro -bonvolu

rememorigi al mi lian nomon...”.

La urbestro traserĉis la amason da papero kovranta la skribotablon.

“Luka Sabatini”, li diris. “Do, klarigu pli bone, kion vi suspektas. Ĉu eble estis kontraŭ li falsaj atestantoj?”

La ĉefserĝento kap-jesis.

“Pli mapli”, li diris “tion mi suspektas.”

“Vi timas do, ke Sabatini revenos ĉi tien, por tiel diri, pro venĝemo?”

“Tio estus home komprenebla”, diris la ĉefserĝento. “Imagu vin en la sama situacio.”

“Ne dankon”, diris la urbestro, “mi preferas mian situacion. Sed eble”, li aldonis “post iom da tempo, “la supozitaj falsaj atestantoj jam formortis. Ni povas almenaŭ tion esperi. Kiom da jaroj pasis de tiam?”

“Mi ŝatus esti certa pri tio”, diris la ĉefserĝento. “Kaj ĉiukaze, kiu garatius al ni, ke la venĝo ne trafus iliajn filojn?”

“Mi scias absolute nenion, mi ripetas”, diris la urbestro iom malpacience, “tiu rezonado estas nur tempo-malŝparo. Kiam okazis la proceso, tion mi povus facile pruvi, mi eĉ ne ankoraŭ ne naskiĝis. Kiam mi estis infano nur malofte oni plu parolis pri tiu fia afero (kaj, inter ni, mi dirus, ke mia patro estis konvinkita pri l'kulpeco de la kondamnito.)”

“Ĉu via patro” diris la ĉefserĝento “eble estis unu el tiuj akuzaj atestantoj?”

“Mi ne scias, kial vi tion demandas? Kion vi aludas?”

“Aŭ eble via mortinta bopatro?”, insistis la karabinjero. “Oni ja devus esti singardaj.”

“Vi frenezas!”, kriis la urbestro. “Pardonu, restu sidanta, ne foriru ĝuste nun. Ni ja devos ion konkludi.”

“Nu bone, ek do” respondis la ĉefserĝento.

“Se vi tion taksas trafa, mi klopodos paroligi iun maljunulon”, diris la urbestro.

“Necesos kompreneble oferdoni vinbotelon.”

“Certe estus trafe”, aldonis la ĉefserĝento, “se fidinda persono tuj kontaktus tiun misŝanculon, jam de la unua momento, por enketi lian animstaton, eble eĉ por malkovri liajn intencojn.”

“Kion vi celas per fidinda persono”, demandis la urbestro. “Oni ne povas ja tro pretendi ĉi-tempe.”

“Mi pensis pri pastro Franko”, diris la karabinjero. “Verdire mi jam lin kontaktis.”  
La urbestro paŭtis.

“Pastro Franko ŝajnas al mi ne tro taŭga.”, li objetis “Li estas tro juna, samaĝa kiel mi. Kaj krome li okupiĝas nur pri publikaj konstruadoj. Jes, lia vera inklino estas konstruado.”

Tiukaze”, diris la ĉefserĝento, “parolu vi mem kun la alia pastro, la maljuna. Kiu estas lia nomo?”

“Pastro Serafeno”, diris la urbestro. “Jen tiu eble estus pli taŭga persono. Sed, mi bedaŭras, mi ne povas paroli al li pri tio. Jam de longa tempo ni eĉ ne salutas

unu la alian. Ha, vi ne konas lin, vi ja ne povas imagi kiom teda kaj maldiskreta li estas. Por resumi duvorte, tiu majuna pastro ne nur predikas la kredon je Dio al virinoj kaj infanoj, laŭ ofico-devo, sed li mem kredas je tio. Ĉu vi ridas? Vi do pensas ke mi fanfaronas? Nu, mi ĵuras sur tio, kion mi plej amas. Li mem certigis tion al mi. Li ankoraŭ kredas je Dio-ekzisto, ha, ha, ha.”

“Vi pensas” diris la ĉefserĝento “ke male pastro Franko...”

“Pastro Franko”, asertis la urbestro “kredas nur je la Ministerio pri Publika Konstruado. Lastatempe...”

“Bone, mi klopodos mem paroli kun pastro Serafeno”, interrompis la karabinjero, “ni ne havas multan tempon.”

La urbestron trafis subita maltrankvilo.

“Kion vi celas per tio?”, demandis, “Ĉu tiu ulo povos reveni al Cisterna jam ĉi tiujn tagojn?”

“Mi ja montris al vi la depeŝon”, diris la ĉefserĝento, “Li povus malfrui kelkajn tagojn, sed certe ne pli”.

“Tiom multaj zorgaĉoj ja ne sufiĉis, mankis nur ĉi tiu”, plendis la urbestro.

Li akompanis la ĉefserĝento ĝis la pordo. Alkuris tuj la pedelo kun ĉapo en unu mano kaj pipo en la alia. La koridoro estis senhoma.

“Kie estas la veteranoj?” demandis la urbestro.

“Ili ne eltenis pluan atendadon.” diris la pedelo “Mi ne ripetos la mesaĝon, kiun ili lasis por vi, ĉar tro senrespekta. Sed se vi insistas mi ja povas diri ĝin.”

“Kien ili iris?”

“Al la Parti-sidejo.”

“Jam komenciĝas problemoj”, grumblis la urbestro kaj frap-fermis kolere la pordon de la oficejo.

Sensukcese la ĉefserĝento, laŭ interkonsento kun la urbestro, serĉigis pastron Serafenon. En lia domo, en la preĝejo, en la du, tri ombraj lokoj kie li kutime sidadis, oni lin ne trovis. La maljuna pastro eliris el la domo kun malnova sunŝirmilo el griza tolo, dirinte nenion al la mastrumantino, jam en horo kiam la stratoj estis senhomaj. Ĉu oni lin vokis al lito de mortonto? Oni tion ja eksciis. La varmegaj horoj malrapide pasis. Sed tuj kiam la sonorilo de la preĝejo vokis al vespro, la pordoj kaj fenestroj de la domoj, fermitaj dum la varmego, ekmalfermiĝis. La metiistoj portis eksteren, apud la domopordo, siajn stablojn kaj la kamparaninoj atendante la revenon de la agroj de siaj viroj, ree ekklaĉis sursojle. La pastro ne reaperis tamen ĝis preĝohoro. Azeno ŝarĝita per tritik-tigoj malsupreniris la padon sur la montoflanko malantaŭ la vilaĝo, kaj post la azeno, flanke de kamparano, oni vidis la pastron.

La kamparano estis iu Ludoviko, iama muelisto, stranga viro. Ekde la tago kiam li devis haltigi la muel-ŝtonon de la malnova akvo-muelilo pro la konkurenco de la nova elektro-ekipita Kumunuma Muelilo, sed eble ankaŭ pro aliaj kialoj, li sinkis en mornan melankolion, elde kiu neniu plu kapablis lin eltiri. Sed ankaŭ la



malgrasa, severa vizaĝo de pastro Serafeno esprimis tiun tagon nekutiman zorgon. Kion la du diris unu al la alia, malfacile oni povus diveni. La eksa paroĥestro kaj la eksa muelisto estis inter la plej maljunaj en la vilaĝo kaj la maljunuloj, oni ja scias, kiam ili parolas inter si, nur malfacile estas kompreneblaj.

Sed tiun tagon, kvankam ili marŝis unu flanke de la alia, la du silentadis kvazaŭ il havus plu nenion por diri. Alvenintaj al vojkruciĝo de Sankta Bartolomeo, disiĝonte, pastro Serafeno kaptis Ludovikon ĉe la brako, dum la azeno sola pluiris la vojon al stalo.

“Ne estu dur-kapa, aŭskultu min”, diris al li pastro Serafeno.

“Lasu min” grumblis Ludoviko.

“Tagon aŭ alian li revenos”, aldonis la pastro, “ni ne povos lin ne helpi, ni ne povos rifuzi al li bonvenon.”

“Mi ne konas lin, lasu min iri” ripetis Ludoviko kun malama rigardo. “Ankaŭ por mi, plej certe, ja ne estos facile”, insistadis pastro Serafeno, “sed pasis tiom da jaroj, nun ankaŭ li estas maljuna”.

La maljuna muelisto rigardis teren, kun kapo klinita kiel azeno, brakoj delasitaj, buŝo duone malfermita.

“Ne blasfemigu min!”, li subite kriis kolere kontraŭ la pastro. “Lasu min iri.”

Sed pastro Serafeno ne rezignaciis sin konsideri venkita.

“Ni du estas inter la malmultaj kiuj ankoraŭ vivas post tiu malfeliĉo”, li denove diris per afliktita voĉo. “Ĉu vi ne memoras? Ni estis liaj amikoj.”

Per subita ektiro Ludovico liberigis la brakon de la teno de la pastro kaj ekkuris malfacile por atingi la azenon. La pastro restis lin plu rigardi, poste daŭrigis sian vojon per malrapidaj kaj lacaj paŝoj ĝis la placeto antaŭ la preĝejo Sankta Bartolomeo, sin apogante al la sunŝirmilo, kvazaŭ ĝi estus bastono. Alveninte tie, li ekvidis de fore la ĉefserĝenton de la Karabinjeroj kaj, por eviti lin, li eksidis sur unu el la ŝtonaj benkoj ĉe la preĝej-fasado. Ĉi preĝejon oni ne plu utiligis de la lasta tertremo, ĝi tiam duone disfalis kaj ne estis rekonstruita. Sur la starantaj muroj kronis parto de la kupolo, kies interno estis pentrita: pale violeca ĉielo kaj anĝelgrupo alportanta kap-girlandon el rozoj kaj blankaj flirtantaj rubandoj kun ora surskribo Gloro Gloro Gloro. Sur la senhoma placeto antaŭ la preĝejo esti du vicoj da arboj polvoplenaj, tiumomente kovritaj de ĉirpantaj cikadoj; je unu el la plantoj estis ligita malgranda, bruna azeno kun longegaj oreloj. La ĉefserĝento iris rekte al la pastro.

“Ĉu vi ne fartas bone?”, li demandis al tiu. “Vi aspektas suferanta.”

“Nenio grava”, diris la pastro, “ĉiuvespere dum la sun-subiro, mi sentas min laca.”

“Ĉu mi vin ĝenus malpli”, demandis la ĉefserĝento, “se mi venus ĉe vi morgaŭ matene? Temas pri urĝa farendaĵo.”

“Pri kio temas?” diris la pastro.

La ĉefserĝento eksidis sur la ŝtona benko, apud li.

“Ĉu vi memoras pri iu Luka Sabatini?”, li demandis. “Li estis via paroĥano antaŭ multaj jaroj. Ĉu vi primemoras?”

“Jes certe, estis antaŭ multaj jaroj”, apenaŭ audeble respondis la pastro, “antaŭ la lastaj kataklismoj.”

“Kiel nun ni ĉiuj scias” daŭrigis la ĉefserĝento, “li estis viktimo, tiam, de mallaŭdenda juĝ-eraro. Nun li estas revenanta kaj mi ne kaŝos al vi iom da zorgo pri tio. Mi parolas kompreneble je ĉies intereso. Mi celas, ĉu vi eble memoras sekve de kies atesto oni lin kondamnis?”

“Kiel mi povus memori?” respondis la pastro mirigite. “Mi ĉiam okupiĝis pri mia paroĥo kaj pri nenio alia. En ĉi tiu vilaĝo ĉiuj okupiĝas nur pri propraj aferoj.”

“Mi komprenas”, rapidis la karabinjero ridetante kompreneme, “sed eble vi memoras almenaŭ ĉu kontraŭ Sabatini estis, eĉ se sinceraj, atestantoj el ĉi tiu vilaĝo?”

“Mi scias nenion pri tio.”, pene diris la pastro. “Mi memoras nenion, mi jam diris” “Kompreneble”, aldonis la ĉefserĝento kun mieno tirata kaj amara, “Ni esperu, ke ne. Sed eble mi min klarigis maltrafe. Mi intencis diri, pro tio ke nun estas plu neniu dubo pri la senkulpeco de Luka, ke oni ja rajtas demandi sin kial dum la proceso li ne sukcesis sin senkulpigi.”

La pastro ekmontris malpaciencon.

“Kion do vi pretendas, ke mi diru?” li protestis ŝultroleve.

La profesia sperto donis al la ĉefserĝento multan paciencon.

“Antaŭ nelonge”, li daŭrigis, “mi parolis kun iu vilaĝano kaj kun la urbestro, kaj ŝajnis al mi kompreni, ke dum la proceso Sabatini eĉ ne klopodis defendi sin.”

La pastro jesis per rezignacia kap-movo.

“Mi ankaŭ aŭdis tian rakonton”, li diris, “li fakte ne defendis sin.”

“Ŝajnas, ke la plej forta indico kontraŭ Sabatini”, daŭrigis la ĉefserĝento, “estis ke la nokto de la krimo, li ne hejmenrevenis. Dum la proceso li rifuzis diri, kie li pasigis la nokton.”

“Li ne defendis sin”, konfirmis la pastro, “tion mi ankaŭ aŭdis rakonti. Sed mi tion certigas, mi ne povas diri al vi pli ol tio.”

“Ĉu neniu prezentiĝis por diri, kion li kaŝis?”

“Neniu.”

“Pardonu, pastro”, diris la karabinjero, “sed ĉio ci aspektas neverŝajna.”

“La vero”, diris la pastro, “tre ofte estas neverŝajna.”

“Ni venu al la nuntempo”, diris la ĉefserĝento. “Tute sincere, ĉu ne ankaŭ vi taksas la baldaŭan revenon de Luka ĉi tien al Cisterna, iom zorgiga?”

La pastro longe meditis.

“Mi mensogus, se mi dirus ke ne.” li fine respondis per apenaŭ aŭdebla voĉo.

“Ĉu vi havas iun preciza timon?”, insistis la ĉefserĝento. “Malantaŭ la mistero mem de lia konduto antaŭ la ĵurio, ĉu ne povus kaŝiĝi iu rankoro?”

“Mi ne scias”, respondi la pastro.” Mi sentas maltrankvilon, kiun mi ne kapablas esprimi. Certe, estante senkulpa, li rajtas liberon. Sed kion li faros ĉi tie? La

mondo kiun li konis jam ne plu ekzistas. Lin renkonti estos por mi kaj por iu ajn alia majunulo samaĝa, kvazaŭ kiel renkonti resurektinton... Sed, pardonu, ĉi tiuj estas egoismaj pritaksoj. Esta alia flanko, tiu materia pri lia situacio ĉi tie post la reveno, pri kiu mi ne scias kiel oni povos aranĝi. Ĉu la Ŝtato pagos al li mon-kompenson pro la jaroj da maljusta suferado en malliberejo?"

"Nia leĝaro ne pritraktas tion", diris la ĉefserĝento.

"Ĉu ĝi ne pritraktas juĝ-erarojn?"

"La leĝo" klarigis la ĉefserĝento, "ne sankcias ajnan devon flanke de la Ŝtato por kompensi viktimojn de juĝ-eraroj... Ĉu Luka ne havas parencojn? Ĉu li ne havas famili-posedaĵon?"

"Nenion" diris la pastro.

Dum la interparolo alproksimiĝis al la fino, eniris la placeton senŝua knabo, kiu surhavis militistan jakon, kiu kovris lin ĝisgenue. Li puŝis antaŭ si per piedfrapoj malnovan lad-skatolon, bruante diable.

"Toni", alkriis lin pastro Serafeno, "vi damaĝos viajn piedojn."

Tuj Toni forlasis la skatolon kaj ŝajnigante lamon iris sidiĝi ĉe la pastro.

"Mi havas ideon", diris pastro Serafeno rekomencante la interparolon kun la ĉefserĝento. "Antaŭ ol Luka revenos ĉi tien, ĉu la urbodomo ne povus peti lian gastigon en la provinca malsanulejo? Mi kredas, ke tiu malfeliĉulo ja havas ĉiujn rajtojn por gastigi tie."

"Temas pri bona inspiro", diris la karabinjero. "Mi sentas ke tion inspiris al vi la Providenco. Mi tuj iros priparoli tion kun la urbestro."

Tuj post kiam la ĉefserĝento malaperis malantaŭ la preĝejo, Toni flustris al la pastro:

"Mi venis por sciigi al vi ion, kiun mi pensis ĝojiga por vi."

"Sciigi kion?" demandis la pastro scivoleme.

"Nun tio valoras nenion", diris la knabo paŭte.

"Ek do, parolu, sciigi kion?"

La knabo flustris ion en la orelo de la pastro kaj vidis sur lia vizaĝo la signojn de subita emocio.

"Ĉu li jam estas ĉi tie?", li demandis. "Ekde kiam?"

"De hieraŭ"

"Kie li estas?"

"Mi ne scias ĉu mi bone faras, diri tion al vi. Nu, en sia domo."

"En disfalinta domo?"

"Mi provizis lin per pajlo-matraco kaj aliaj utilaĵoj."

"Ĉu neniu lin vidis?"

"Ĝis nun li ne volis sin montri"

"Ĉu estis li, kiu sendis vin al mi?"

"Li ne volas sin montri antaŭ ol li scios kiel statas nun la vilaĝo, kiu plu vivas, kiu mortis kaj tiel plu. Sed kiel mi povis respondi al liaj demandoj? Eĉ la historion pri li mi ne konas bone. Mi nur komprenis ke li ne estas homo kiel la aliaj kaj do mi

proponis al li, ke mi iros voki lian amikon de la pasintaj tempoj, por konduki tiun al li. Sed li mem ne sciis, kiun indiki. Iam estis ĉi tie pastro, iu Serafeno, li diris; mi eĉ lin serĉis en la preĝejo, kiam mi alvenis, sed mi kredis kompreni, ke li mortis. Ne, mi klarigis al li, pastro Serafeno ne plu estas paroĥestro pro maljuneco, sed li ankoraŭ vivas. Vi devintus vidi, kiom kontenta li estis pri tiu novaĵo... Vi male volus lin malliberigi denove. Nun mi komprenas, ke mi fuĝe agis dirante al vi, ke li jam estas ĉi tie. Jes, mi estis tre stulta fidi je vi.” Toni ĉesis paroli ĉar li rimarkis, ke la okuloj de pastro Serafeno pleniĝis je larmoj.

“Ni iru” diris la pastro abrupte ekstarante. “Konduku min ĉe li.”

La knabo petole saltis por montri sian ĝojon. Li estis mole fleksebla kiel saliko.

“Ne estas prudente marŝi kune”, li poste diris.

“Vi ja konas la vojon, ĉu ne?”

## Ĉapitro tri

La laborĉambro de pastro Serafeno estis malhela, aspektis sepulteje. Sur tablo kovrita de verda tapiŝo, trivita kaj aspergita je vaksogutoj, inter du malgrandaj kandelingoj lignaj kaj kelkaj preĝolibroj nigre binditaj, la ĉefa objekto estis kranio, vera homa kranio.

“Ĉu vi ankoraŭ volas kafon?”, demandis pastro Serafeno.

“Ne, dankon”, diris Luka.

“Ĉu biskviton?”

“Dankon. Se vi involvos paron en paper-pecon, mi ilin portos al Toni.”

Tuj la maljuna pastro ekstaris por pretigi la pakaĵeton. Li estis alta, askete maldika, havis mentonon longan kaj angulan, vangojn enkavigixntajn, nazon maldikan kaj pintan. Liaj senkarnaj kaj artritaj manoj aspektis kiel krifoj de kokaĉo. Suno-strio eniris tiam tra fenestreto kaj densa aerpulvoro ekdancis en la lumrubando, kiu tradividis la ĉambron.

“Morgaŭ”, diris pastro Serafeno, “oni atendas ĉi tie Andreon Cipriani. Vi ne povas koni lin, li ne estas kvardekjaraĝa. Mi ne scias ekzakte kiajn kaj kiom da misagoj li krimis dum la lastaj jaroj, sed mi scias ke formiĝis ĉirkaŭ lia kapo ruĝa nimbo de revolucia bandestro. Estas la unua fojo, ke li revenas al Cisterna, kaj ĉar intertempe la revolucia kaŭzo supervenkis, lin oni ne arestos, sed prigloros.

“Mi jam aŭdis paroli pri li”, diris Luka. “Ĉu li ne estas la filo de Karmine?”

“Jes, li estas la filo de via amiko Karmine”, respondis la pastro. “Ĉu vi lin memoras? Sed Karmine estis homo bonmora, dum la filo elektis duran vivon kaj, dank' al la nuno, la ja trovis kion fari.”

“Kiam, malfrue kiel kutime kaj tute hazarde, mi eksciis pri la morto de Karmine”, diris Luka, “mi suferis kiel pro perdo de frato. Mi ne scias ĉu iam ekzistis du knaboj pli ligitaj ol ni. Bedaŭrinde dum la lastaj jaroj de mia libera vivo, ni iomete

disiĝis. Li edziĝis kaj por mi komenciĝis tiuj suferoj, kiujn li ne sukcesis kompreni. Mi tamen kredas ke li ĉiam deziris por mi bonon.”

“Eĉ pli, mi certigas tion”, aldonis la pastro, “li multe suferis pro via proceso. Plurajn fojojn li venis ĉe mi por ke mi klarigu la absurdon de via konduto. Sed, kion mi povis diri al li?”

“Mi ankaŭ scias, ke li flegis kaj helpis mian patrino ĝis ŝia morto”, aldonis Luka. “Mi patrino diradis tion al mi en ciu letero.”

“Ĉu vi malaprobis”, demandis la pastro, “se mi parolus pri via situacio al Andreo? Esti orgojla kun li estus sensece. Andreo nun estas tre influa, eble li sukcesus asignigi al vi decan mon-kompenson.”

“Ĉu vere vi kredas, ke mi ne sukcesos trovi laboron?”

“Mi tion ripetas denove, estas preskaŭ neeble. Estas senlaboruloj eĉ inter la junularo.”

“Mi ŝatus renkonti lin, Andreon”, diris Luka, “Almenaŭ nur momenton, la tempon por premi lian manon.”

“Morgaŭ estos malfacile”, diris la pastro. “Vi komprenu, estas lia unua reveno al Cisterna. Certe la aŭtoritatoj kaj liaj parti-kamaradoj lin kaptos.”

“Ĉu li havas adeptojn ankaŭ en Cisterna?”

“Mi kredas ke jes. La venkintoj, vi komprenas, havas adeptojn ĉie.”

“Ĉu estas vere, ke li ankaŭ sidis en malliberejo?”

“Jes, dum malmultaj monatoj, kaj poste, dum pluraj jaroj oni lin ekzilis sur insulo.”

“Mi ne komprenas”, diris Luka, “vivante ĉi tie en Cisterna, kiel Andreo povis malkovri politikon.”

“Politiko, mia kara Luka, esta ĉi-tempe kiel ĥolero”, klarigis pastro Serafeno. “La difuz-vojoj de ĝiaj baciloj estas malfacile elspureblaj. Andreo ŝajnis simpla lernejo-instruisto, kaj laŭdire eĉ kapabla, kvankam karaktere malfacila kaj malafabla. Sed verdire jam kiel knabo, li aperis iel stranga. Lia patrino venis ĉe mi plurfoje por rakonti liajn strangaĵojn, por peti konsilon. Se li estus knabino, mi estus ŝin taksinta histeriulino. Neniu tiam antaŭvidis tamen kiel la afero poste disvolviĝis. Kiel tio okazis? Tute neatendite. Dum la unuaj momentoj de unu el la militetoj deciditaj de la pasinta registaro kontraŭ sendefendaj popoloj (nun mi ne plu memoras ĉu tiam temis pri hispanoj aŭ etiopoj) Andreo deklaris publike, inter konatuloj: “Estas hontindaĵo”. La skandalo ne estis en la senco de liaj vortoj, sed en la fakto ke li tion asertis surplace. Li estus povinta sin dementi, sin rehabiliti. Li faris la malon, kvazaŭ li estus atendinta tiun okazon de longa tempo. Kunvokita en la parti-sidejon, li ankaŭ tie ripetis la saman aserton, ŝajnas eĉ, ke li pliigis la dozon. Kompreneble tio pli ol sufiĉis por lin aresti kaj por la cetero. Dum la lastaj jaroj...”

Oni plurfoje frapis la pordon.

“Kiu estas?”, demandis pastro Serafeno.

Sur la sojlo aperis la urbodoma pedelo. La ĉeesto de Luka ŝajne lin embarasis

kaj li sensalute tiun rigardis malafable.

“Kion vi volas?”, lin demandis la pastro.

“Pastro Serafeno”, diris la pedelo, “vin urĝe atendas la urbestro.”

“Kial?”

“Pardonu, sed oni tion ne klarigis al mi.”

“Kiu donas rajton al via urbestro vokigi min, kvazaŭ mi estus urba balaisto?”

“Pri obeemo de balaistoj”, diris ridetante la pedelo, “mi rimarkas ke vi estas misinformita. Ekde hieraŭ ili strikas. Ĉu vi ne flaras la fetoron en la stratoj?”

“Mi pensis”, sin senkulpigis la pastro, “ke la fiodoro venas de la nova urbestro.”

La pedelo longe ridis moke.

“Ĉu mi devas tion raporti?” Sciu, mi tion ege ŝatus.”, li diris, “kaj pri la kialo de via alvoko, mi pensas ke mi ĝin komprenis. Ĉe la urbodomo oni volas formi komitaton por la morgaŭa ceremonio honore al Andreo Cipriani.”

“Kial do oni min bezonas? Ili voku la paroĥestron!”

“Eble”, aldonis la pedelo, “ili bezonas konsilojn de amiko de la prifestoto.”

Luka tuŝis pastron Serafeno per kubuto.

“Se mi estus vi, ĉi kaze mi ne tiriĝus flanken.”, li flustris. “Vi povus ŝpari al Andreo kelkajn ĝenojn.”

“Bone”, diris rezignacie pastro Serafeno, “mi venos, sed poste, nun mi havas vizitanton.”

Tuj post la pedelo foriris, Luka ridante diris al la pastro: “Ŝajnas, ke vi treege estimas la novan urbestron.”

“Temas pri strangtipa liberpensulo”, klarigis pastro Serafeno. “Tiu malhonestulo konvinkiĝis, ke libera pensado konsistas je libera seksumado.”

En la urbodomo, antaŭ ol diskuti la morgaŭan programon, oni atendis iomete plie la alvenon de pastro Serafeno, kaj dum lia mafruo ekestis mallonga interŝanĝo de ideoj inter la jam kunvenintaj gravuloj: la urbestro, la komunuma sekretario, la paroĥestro pastro Franko kaj la novaj skabenoj, unu kamparano kaj du metiistoj.

“La devizo de ĉi ceremonio”, sugestis la urbestro, “devus teksti pli mapli tiel: 'Cisterna salutas sian plej eminentan filon'. Kion vi opinias?”, li demandis al pastro Franko.

Malalta, dika, preskaŭ senhara malgraŭ la juna aĝo, la paroĥestro staris apud la fenestro por ĝuj la vesperan freŝon kaj nur ridetis.

“Mi parolos poste”, li diris, “kaj kion pri la striko de la balaistoj?”

“Kaj vi?”, demandis la urbestro la sekretarion.

La sekretario estis homo malgrasa kaj malhela, kun okulvitroj, la vizaĝo iel verdeta. Li tiumomente estis okupita revizii kalkulojn en granda libro kaj ne priatentis la demandon. La tri ĵus elektitaj skabenoj sidis malaplombe, sed solene sur divano, apud la urbestra sbribotablo, kaj intekonsultiĝis per duonkaŝaj okulsignoj. La pli maljuna el ili, malgranda, maldikega, seka, aspektis vere

mizere pro la vesto flikita plurparte; li sin senkulpigis, devonte starigi bonmoran demandon, kiel li ĝin mem definis.

“Ĉu vi ne kredas”, li klarigis, “ke ni devus amike konsili al tiuj, kiuj tiam denunciis al la polico instruiston Cipriani kaj lin arestigis, ke ili tenu sin for de la ceremonio?”

“Jes ja”, grumblis la urbestro, “Kompreneble. Kion vi ambaŭ pensas?”, li aldemandis la sekretarion kaj paroĥestron.

“Mia kara”, komencis la sekretario levante la kapon el la libro. “Se vi akceptas...” Sed li interrompiĝis. Li kutimis, kiam li ekis paroladon, strange tiri malantaŭen la kapon, kavazaŭ li atendus vangofrapon.

“Ni lasu tion”, li konkludis. “Vi jam min komprenis.”

La sama skabeno, per pli senĝena voĉo, aldonis:

“Ĉu ankaŭ ne same devus teni sin for tiuj, kiuj subskribis la peticion por forigi Cipriani-n el la lerneja instruistaro? Kion vi pensas pri tio?”

“Mi same opinias”, diris unu el la skabenoj.

Estis memkompreneble, sed la listo de la nedezirindaj ankoraŭ ne finiĝis.

“Kaj tiuj, kiuj lin alcelis per ŝtonoj kiam li, man-katenite, estis trenita de la karabineroj?”, aldonis la majuna skabeno. “Mi ne scias ĉu iu el vi memoras la scenon. Mi hazarde spektis ĝin. Mi estis revenanta de la muelilo kun la azeno...”

Ankaŭ alia skabeno vidis tion kaj rememoris la scenon. “Ĉesu do, kriis unu el la karabineroj, vi povus erare trafi nin!”

La rakonton oni aŭskultis silente. Estis embarase diskuti tiajn proponojn. Sed post iom la komunuma sekretario levis denove la okulojn de la kalkul-libro kaj kun tirata rideto demandis:

“Se ni forstrekas ĉiujn malindajn, pardonu, kiu do partoprenos la ceremonion? Eble iu seneduka kampulo, sed neniu bonmora respektinda persono, ĉu ne?” Post kelkmomenta peniga pripensado la urbestro decidis rezigni pri ĉia diskriminado.

“Nun ni estas en demokratia reĝimo.” li diris, “Demokratio estas egaleco, ĉu ne?”

Sed la formulon, kiu kvitigis ĉies skrupulon, eble eĉ tiujn de la majuna skabeno, eldiris pastro Franko.

“Andreo Cipriani”, li diris per serioza voĉo, parolante malrapide, “ne povas ignori en la alta pozicio, kiun li nun atingis, ke la plej bona venĝo estas pardono.”

La urbestro trovis la frazon ege trafa kaj post kiam li petis al pastro Franko ke li ripetu ĝin, li ĝin notis sur paperperco por ĝin enŝovi en la posttaga parolado.

“Por ke ĝi plej efiku”, sugestis al li la sekretario mallaŭte, “vi devus ĝin atribui al Garibaldi. Vi aŭdos kiajn aplaŭdojn.”

Tiam la urbestro opiniis, ke la aferoj iom gravaj estis jam ciuj difinitaj, krom la opinio de pastro Serafeno; sed pri tio ne konsentis la konkretama paroĥestro.

“Ni ĵus konkludis la retorikan parton.” protestis fakte pastro Franko. “Pardonu sed nun restas la esenco. Ĉu vi ne scias, kia bonŝanco estis por kelkaj vilaĝoj

naski homojn, kiuj atingis politikan povon?”

Pastro Franko eliris el leda teko, kiel unuan, aktujon plenplenan je paperoj sur kiu tekstis: “Projektoj”. Ĉiuj tuj komprenis, kion li celis.

“Ĉu vi taksas oportuna”, lin pridemandis la urbestro, “ĝeni Andreon Cipriani per tiaj aferoj ekde la unua momento de lia reveno inter ni? Ĉu ne estus pli inteligente unue konkeri lian simpation?”

“Oni ne perdu tempon”, rebatis la paroĥestro energie, “Ni batu la feron, kiam ĝi estas varmega.”

“Mi ankaŭ pensas, ke oni devas rapidi.”, opiniis la sekretario, “Politikaj majoritatoj povas daŭri nelonge.” Pro tio, ke je tiuj vortoj unu el la skabenoj kuntiris la brovojn, li rapide aldonis: “Bedaŭrinde.”

Pastro Frako dume malfermis antaŭ si la aktujon kaj dismetis sur la tablon plurajn foliojn.

“La famo de Cisterna, por ne paroli pri ĝia honoro”, li diris, “postulas unue la starigon de monumento por la falintoj, je kosto de la Ŝtato. Mi esperas, ke vi ĉiuj konsentos prezenti ĉi tiun peton kiel plej urĝa.”

“Triono de la loĝantaro”, protestis la maljuna skabeno, “vivas en grotoj aŭ kabanaĉoj!”

Pastro Franko atendis tiun objeton kaj havis jam pretan respondon.

“La civilizitaj popoloj”, li rebatis firme, “estas rekoneblaj per la prioritato, kiun ili atribuas al la kulto de mortintoj. Ĉu ne estas honto ke Cisterna ankoraŭ ne havas monumenton por la falintoj? Ĉiu el ni devus suferi pro tio.”

“En neniuj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj”, al li respondis skabeno, “mi vidis monumenton, kian vi diras.”

“Motivo plia por ke Cisterna ilin preterpasu kaj devancu”, diris pastro Franko triumfe, “Ilia envio konsekros nian superecon.”

“La argumento konvinkas”, jesis la sekretario rikane.

“Oni proponas al ni monumenton por la falintoj”, diris unu el la junaj skabenoj, “bone, sed al kiuj falintoj? Al la falintoj por libereco?”

La urbestro restis kun malfermita buŝo kaj rigardis pastron Franko.

“Mi ne lasos min involvi en polemikoj.”, abrupte deklaris la paroĥestro.

“Sed ne eblas starigi monumenton por la falintoj”, insistis la skabeno, “sen deklari por kiuj falintoj.”

“Mi antaŭvidis ankaŭ tiun malfacilaĵon”, diris la paroĥestro post mallonga embaraso. “kaj ĝuste por eviti tion, mi planis alegorian monumenton. Kion vi dirus pri marmora grupo en kiu Gloro kisas Sinoferon?”

“Kiun Sinoferon?”, demandis preskaŭ unuvoĉe la tri skabenoj.

“La Ideo pri Sinofero”, rebatis pastro Franko tute ruĝa vizaĝe.

“La Ideo, tio estas la Koncepto. La Ideo ĉirkaŭprenas ilin ĉiujn.”

Sed la plej grava kontraŭstaro venis tiam de la sekretario.

“Ĉu vi starigus tian monumenton en publika loko?”, li demandis skandal-tone.

“Eĉ antaŭ la paroĥa preĝejo, eble? Ho, pastro Franko via manko je imagopovo



min mirigas. Por bildigi la Gloron kisan la Sinoferon, la skulptisto ja devige kreus virin-figuron kiu kisas viron. Ĉu vi ne pripensis tion? Kaj eĉ pli. Ne temante pri filmo, sed ja pri inerta materio, la kiso daŭrus senfine. Ĉu vi sukcesas imagi? En kiu ajn horo taga kaj nokta, sub la suno aŭ sub la neĝo, tute senpaŭze, tiu virino ade kidadus viron. Vere bele ekzemplo por viaj infaninoj de la katekisma lernejo.”

“Tiu sufiĉus por naŭzigi eĉ la homon plej inklinan pri la ideo de sinofero”, komentis la urbestro ŝajnigante naŭzon.

Ruĝa vizaĝe la paroĥestro rapidis proponi kelkajn variaĵojn.

“Gloro”, li diris, “povus karesi per patrina gesto la kapon de Sinofero, aŭ, kion mi povas diri, tutsimple alrideti lin.”

Tiam la maljuna skabeno aldonis novan vidpunnkton. Laŭ li Gloro devus tute neglekti Sinoferon, kaj eĉ ne alrigardi ĝin, ĝis kiam tiu sin oferos por bonstato de malriĉuloj plu vivantaj en grotoj kaj kabanaĉoj.

“Al bonstato de la popolo estos dediĉita mia dua projekto”, diris akordiĝeme pastro Franko, kaj deprenis el la leda teko novan dokumentaron.

“Eble ĉi tiuj estas nur sencelaj klaĉoj”, interrompis abrupte la maljuna skabeno ekstarante. “Kiel do vi povas certi ke Andreo Cipriani akceptos niajn proponojn?”

Ĉi tiuj vortoj ĵetitaj per iel provoka tono, estis frosta duŝo sur la konstruan fervoron de la paroĥestro. Li rigardis ĉirkaŭ si atendate de la urbestro malkonfirmon de tiu fipesimisma dubo, por daŭrigi post tio la klarigadon de pliaj projektoj. La urbestro male mienis morne. “Mi ne kaŝos al vi mian embarason”, li diris, “Cipriani, ni tion ne forgesu, forestas jam preskaŭ de dekdu jaroj. Li revenos morgaŭ la unua fojon post sidado en malliberejo, ekzilo kaj post partizana batalado. Kiu povus antaŭvidi, kion li intencas fari?”

“Mi ne komprenas ĉi kaze, kial ni ĉiuj perdaĉas nian tempon ĉi tie tute sencele”, protestis pastro Franko ĝenite.

“Ni atendu pastron Serafeno”, diris la urbestro, “eble li scias pli multe ol ni pri tio. Se mi ne malbone komprenis, li korespondadis kun Cipriani.”

“Ĝis la revido, morgaŭ.”, diris la pastro ofendita.

Li kolektis rapide siajn paperojn, ekstaris kaj rapideme foriris. Kaj ĉar alproksimiĝis la manĝo-horo, lin tuj sekvis la tri skabenoj.

“Konfidence”, demandis la sekretario la urbestron, kiam li estis certa, ke neniu povas lin aŭdi, “konfidence, tiu eksinstruisto Cipriani, ĉu vi scias, kiu estas lia politika ideo?”

“Mi povas nur konjekti”, respondis la urbestro, “ke li estas homarano.”

La sekretario preskaŭ sufokiĝis pro ridado.

“Ĉu vere?”, li diris. “Do, konfidence, kompleta kreteno.”

“Kompleta”, kunsentis la urbestro.

## Ĉapitro kvar

Pastro Serafeno ĵus revenis hejmen de la frumatena diservo, kiam oni frapis je lia pordo. La dommastrino iris vidi. Ĉe-sojle estis junulo, kiun ŝi unuamomente ne rekonis. Li estis alta kaj svelta, kun ĉapo surkape, surhavis nur ĉemizon kaj mallongajn pantalonojn. Li estis kovrita je polvo de kapo ĝis piedoj, kiel iu longe vojaĝinta. Plie li iel aspektis aplomba. La viro alvenis per motorcicklo, kiun li estis apoginta al la muro; sur ĝia kofroplato, malantaŭ la sidilo, estis ligita eta valizo.

“Kiun mi anoncu?”, demandis la dommastrino tra duonfermita pordo. “Mi ja devas tamen averti vin, ke oni ne tiel povas viziti pastro-domon”.

“Andreo Cipriani”, diris la viro ridetante.

La surprizo de la dommastrino devis lasi lokon al tiu de pastro Serafeno kiu, aŭdinte la nomon, tuj alvenis.

“Kiel belan surprizon!”, li ekkriis ĝoje. “Ni vin atendis ĉirkaŭ tagmezo. Ĉu vi jam estis ĉe la urbodomo? Eniru, eniru; kiel vi eble scias, en la urbodomo nuntempe sidas viaj amikoj.”

“Amikoj?” respondis Andreo rikane. “Mi volas scii pri kio temas antaŭ ol renkonti ilin. Jen mi venis antaŭtempe ĝuste por ricevi informojn pri la turmentoj, kiujn vi preparis por mi.”

“Kaj vi fidas je mi?”, lin demandis la pastro per tono amike ironia. “Nun eksidu, dum ni trinkos kafon, ni babilos iomete. Kiom da jaroj vi forestis, he? Ni kalkulu ilin.”

“Verdire”, diris Andreo zorgeme, “pro tio, ke mi vin bone konas, mi ne fidas je vi tute. Mi scias, ke vi nenion komprenas pri politiko kaj ke instinkte vi estas konservativulo mallarĝmensa.”

“Tiu ja estas trafaj prijuĝoj”, konfesis la pastro. “Dankon. Konsiderante la nunajn tempojn, mi ilin akceptas kiel komplimentojn.”

“Sed mi ankaŭ scias ke vi estas sincera, lojala kaj ke vi neniam estas oportunisto.” aldonis Andreo, “Konsiderante la nunajn tempojn, kiel vi diras, tiuj estas raraj virtoj.”

“Sidu, do kaj flanken lasu la komplimentojn.” diris la pastro, “Kafo baldaŭ pretos. Pri la hodiaŭa ceremonio viahonore ne estas multo por diri: oni ĝin organizis laŭ la trajtoj de loka patriotismo.”

Li prononcis tiujn vortojn per certa ironia emfazo.

“Baf, mi abomenas ĉiujn patriotismojn”, diris Andreo naŭz-miene, “min interesas pli multe la personoj. Diru do, kun kiu mi interfrapiĝos?”

“Ĉeestos ja la tuta vilaĝo”, klarigis la pastro, “Ĝi estas ja via naskiĝloko, finfine vi ĝin konas.”

“Sed vi ja scias, ke mi restis for dum tre longa tempo.”

“Estu certa, vi ĝin ne trovos ŝanĝita. Estas ankoraŭ kelkaj mavuloj, kelkaj

honestaj homoj, sed stultaj, kaj pri la cetero estas la ĉiama arego da kaproj kaj ŝafoj. Por igi pli stulta ĉi tiu mizera gento, ne sufiĉis la deviga lernejo. Nun aldoniĝas ankaŭ kino kaj radio. Oni devus sopiri je analfabeteco. La malriĉuloj? Ne revu. Ili ne estas sufiĉe seriozaj kaj harditaj por revolucio... Sed mi vidas, ke mia priskribo ne kontentigas vin. Vi mem diris antaŭ kelkaj momentoj: mi neniam komprenis ion pri politiko.”

“Kiu sidas nun en la urbodomo?”, demandis Andreo.

La respondo ne venis tuj.

“Mi ne povas diri, kion mi pensas”, respondis fine la pastro bridante sian langon, “venus el mi facile, ke mi malŝatas ilin. Tial ke la komunuma estraro bezonas vian apogon, juĝante ilin malbone, mi timus malutili al la tuta vilaĝo. Nu, ke Cisterna urĝe bezonas helpon, vi ja certe mem vidis dum via alveno. Ĉu tio ne tuŝas vin?”

Andreo grimacis.

“Mi vidas, ke ankaŭ vin kontaĝis loka patriotismo”, li diris.

La interparolo mallonge haltis dum la dommastrino verŝis kafon. La okuloj de la maljuna fraŭlino, ŝrumpinta kaj flaveca, ekmalsekiĝis pro la emocio revidi Andreon. Pro hasto ŝi forgesis demeti du buklojn ĉe la tempioj.

“Sinjora Moŝto Andreo.”, ŝi diris.

Sed Andreo protestis pro la honortitolo.

“Mi ja ne estas aristokrato.”, li ŝerce diris.

“Mi apenaŭ povas kredi”, ŝi diris, “ke, kiel infanon, mi tenis vin ofte sur miaj genuoj.”

“Mi vetas, ke vi nun ne aŭdacus”, respondis Andreo serioz-miene.

“Ja ne en mia ĉeesto!”, protestis la pastro per falsa graveco. “Ĉu vi kuraĝas interŝanĝi tiajn impertinentajn proponojn en mia ĉeesto?”

Pro la emocio la dommastrino verŝis iom da kafo sur la pantalonetojn de la gasto. Ŝia konfuziĝo fariĝis tiam ekscitego kaj maltrankvilo.

“Nenio grava”, diris Andreo ridante. “Ili jam estis malpuregaj.”

“Por la hodiaŭa ceremonio vi devus ŝanĝi vestojn”, sugestis pastro Serafeno.

Poste li aldonis: “Diru do, kion vi intencas fari?”

Andreo ne respondis tuj kaj daŭre rigardis la titolojn de libroj sur bretaro: Sankta Justeno, Sankta Kamilo el Lellis, Sankta Johano el Kapestrano, Sankta Gabrielo de la Dipatrino... La ĉambro estis malgranda, humila kaj senaera.

“Ĉu vi pasigas ĉi tie viajn tagojn?”, li demandis la pastron. “Kiel vi povas spiri?”

“Jes ja, mi ne estas vagemulo”, tiu respondis. “Ni ne perdu tempon. Antaŭ ol mi klarigos al vi la verajn bezonojn de Cisterna, mi tamen volas paroli al vi pri kompatinda persona kazo.”

“Kion? Rekomendon?” interrompis Andreo.

“Jes”, diris la pastro, “temas pri kazo, kiu vere meritas vian atenton.”

“Mi bedaŭras”, diris Andreo. “Mi ĵuris al mi mem, ke mi neniam interesiĝos pri personaj aferoj. Mi scias bonege, ke estas kazoj eksterordinare kompatindaj, se

tiujn devas prizorgi, laŭspece, la urbestro, advokatoj, kuracistoj, akuŝistinoj kaj paroĥestroj. Pardonu min, mi petas, sed mia koncepto pri politikisto estas tute kontraŭa al la kutima. Politikisto, mi pensas, devas studi kaj solvi kolektivajn problemojn, kaj ne ja aranĝumi personajn favorojn.”

Pastro Serafeno ridetis.

“Bonege” li diris, “mi gratulas. Sed ĝis kiam vi restos fidela al tiuj justaj intencoj?”

“Homo, kia vi estas, ne devus esti unu el tiuj, kiuj min malkuraĝigas pri tio.”

“Mi ripetas, ke mi vin admiras”, aldonis pastro Serafeno, ŝanĝante tonon kaj subite ekparolante serioze. “Sed se vi scius, mia knabo, kiaj estis miaj intencoj, kiam oni min konsekris sacerdoto.”

“Se mi ne povos resti firma ĉe miaj intencoj”, diris Andreo senŝancele, “mi forlasos ĉiun ideon pri politika kariero.”

“Mi vin taksas kapabla”, rapidis la pastro. “Do mi ne insistas. Sed antaŭ ol forlasi ĉi tiun temon, mi volas diri, ke mi kulpas pro mia esprimo. Mi ne estus devinta paroli al vi pri rekomendo. Ne nur mi ofendis viajn sanktajn principojn, sed mi ankaŭ malgrandigis la viron, pri kiu mi intencis paroli. Mi certigas tion al vi, li ja ne estas almozetanto, kiun oni povus favori nur por forigi lin, aŭ por havi plian voĉdonon dum balotado. Tute male. Se temas pri orgojlo kaj fiero, kredu, li ja ne postrestas vin. Cetere, kiel mi klarigu? Tio estas malfacila. Kvankam li naskiĝis ĉi tie, li restas enigmo ankaŭ por mi. Sen troigo, la plej granda en mia vivo... Sed, nun, mi ekmemoras ke, kiel junulo, li estis la plej bona amiko de via patro. Ha, se via patro ankoraŭ vivus. Mi kaj li ne lasus aliajn personojn okupiĝi pri la bezonstato, en kiu tiu homo nun baraktas.”

“Kiu esta lia nomo?”, demandis Andreo.

“Vi ne povas lin koni”, diris la pastro, “same kiel lin ne konas, krom kvin aŭ ses maljunuloj, la nuntempaj loĝantoj de Cisterna. Kiam vi naskiĝis? Nu, lin oni arestis ĉirkau du jarojn antaŭ via naskiĝo pro suspekto pri murdo kaj rabado. Oni lin kondamnis je tutviva mallibero pro kelkaj indicoj malfavoraj al li. Mi ne sukcesus nun klarigi al vi, kio estis por pluraj el ni tiu kruela proceso. Ĉio en ĝi estis mistera, kaj precipe la konduto de la akuzito, kiu rifuzis sin defendi. Sed antaŭ kelkaj monatoj, viro el Pertikara, ĉi proksime, antaŭ ol morti, konfesis sian kulpon donante konvinkajn pruvojn. Post kvardeko da jaroj en malliberejo, oni liberigis la senkulpulon kaj li revenis ĉi tie, sen monero enpoŝe.”

Andreo ete skuiĝis kaj lia vizaĝo streĉiĝis.

“Ĉu vi eble parolas pri Luka Sabatini?”, li demandis.

“Jes, ekzakte pri li. Kiel vi povis diveni lian nomon?”

“Ĉu Luka estas ĉi tie? Kie? Ĉu mi povas lin renkonti? Bonvolu, pastro, konduku min tuj ĉe li... 'stas vere, mi lin neniam konis, sed vi ege mirus se mi rakontus, kion Luka signifas en mia vivo.”

## Ĉapitro kvin

“Mi eĉ ne havas seĝon por doni al vi”, pardonpetis Luka.

“Mi ne lacas”, diris Andreo ridetante.

Por sidigi la gaston, Luka levis ŝtonon; sube aperis formikaro, diskuranta ĉiuflanke.

“Ni trovos por vi pli komfortan restadejon”, diris al li Andreo zorgeme.

“Tute ne urĝas”, diris Luka. “Ĝis kiam estas bela sezono, mi statas bone ankaŭ ĉi tie.”

Lanterno pendis de trabo per fer-fadeno. Renversita kesto, sur kiu estis duona panpeco, unu cepo, du tomatoj, servis kiel tablo. La lito estis pajla sako sternita sur la brika pavimo. El niĉo enkavigita en muro, Luka prenis botelon da vino kaj taseton, kiun li plenigis por la gasto. Dum li verŝis, lia mano tremis.

“Trinku”, li diris. “Vi ankaŭ konas la plezuron de la unua glaso da vino viahejma post eliro el malliberejo. Kaj kia emocio povi ekbruligi fajron per siaj propraj manoj.”

Liaj okuloj brilis.

“La tutan vivon manĝi Ŝtat-panon”, diris Andreo, “kia naŭzo kaj abomeno por viro kia vi, tiel viva.”

“stas la vivo.” diris Luka. “Sed ankaŭ vin sufiĉe malbone traktis la sorto. Ne miru Andreo, mi konas multajn aferojn pri vi. Malliberulo naskiĝinta en Celano parolis al mi pri vi en Civitavecchia. Ekde tiu momento, mi povus eĉ diri, ke mi vin atendis.”

“Kie? Ĉu en tutviva malliberejo?”

“Jes, ŝajnis al mi, ke ankaŭ via destino estis antaŭskribita.”

“Antaŭskribita? Eble jes, sed ne de la naskiĝ-tago”, korektis Andreo. “Mi prefere dirus: de la vivo mem, kvankam en tre juna aĝo. Jen, Luka”, li aldonis seriozmiene, “ĉi tiu historio koncernas vin.”

“Ĉu min?”, demandis Luka.

Post paŭzo Andreo diris:

“Kiam antaŭ nelonge pastro Serafeno parolis al mi pri vi, la novaĵo trovis min nepreparita; tiu ĉi renkonto impresas min kiel okazaĵo, kiun mi atendis dum la tuta vivo. Sciu, temas pri historio, kiun mi havas ene ekde la infanaĝo kaj kiun nur vi povas kompreni.”

“Ĉu eble via patro parolis al vi pri mi?”, demandis Luka. “Ni iam estis tre bonaj amikoj, ĉu vi scias?”

“Ne nur li. En Cisterna, kiam mi estis knabo, pri vi paroladis ankoraŭ pluraj personoj”, diris Andreo. “Kvankam longaj jaroj estis jam pasintaj kaj intertempe estis okazintaj aliaj sangaferoj, kiam oni parolis pri la proceso, ĉiuj celis ja vian kondamnon. Sed kompreneble, estis temoj, kiujn oni malmulte pritraktis antaŭ infanoj. Al mi, pli ol ĉiuj, parolis pri tio via patrino, Teresa. La povra maljunulino

vivis nur de tiu memoro. Ŝi aspektis kiel Dipatrino post la forpreno de la filo. Ŝia vivo, oni povus diri, haltis la tagon de via kondamno.”

Ĉe tiuj vortoj la okuloj de Luka vualiĝis je larmoj.

“Ekde la unuaj leteroj, ” diris Luka, “ŝi skribis al mi, ke ŝi helpis en la mastrumado de via domo.”

“Sed ne kiel servistino”, diris Andreo. “La malfeliĉa okazintaĵo ne forviŝis ŝian orgojlon. Por mia patro ŝi estis la patrino de lia plej bona amiko. Lasu min rememori iomete tiun tempon.”

“Sidiĝu kaj rakontu iom pri ŝi”, diris Luka. “Diru, ĉu ŝi ankoraŭ kantis kelkfoje? Kiam mi estis hejme, dum ŝi lavis vestojn aŭ dum ŝi knedis panon, oni ofte aŭdis ŝin kanti.”

“Jes, ŝi kantis vespere por endormigi mian pli etan fraton”, diris Andreo. “Temis pri lulkantoj tre dolĉaj kaj melankoliaj, kiujn ŝi mem eble inventis, ĉar mia patrino diris, ke ŝi neniam aŭdis ilin antaŭe.”

Luka kaŝis la vizaĝon inter la manoj.

“Pardonu min.” li diris. “Ne zorgu. Se malgraŭ via frua junaĝo, vi havas pliajn memorojn pri ŝi, eĉ se malĝojajn, mi petas vin rakonti ilin; kvankam certe ne per larmoj mi iluziiĝas plenigi vakuon kvardekjaran.”

“Mi vizitis la trian elementan klason, mi do aĝis ok aŭ naŭ, kiam via patrino ricevis vian unuan leteron.”

“Tio estis post la absoluta apartigo”, klarigis Luka. “Iaspeca entombigo. Pli frue mi ne povis skribi.”

“Via patrino, kiel vi bone scias, kvankam inteligenta pli ol pluraj samkondiĉaj virinoj, neniam vizitis lernejon, ŝi neniam lernis legi kaj skribi.”

“Jes, tiam estis ofta kazo. Instruado al virinoj estis taksata, se ne peko, minimume frivolaĵo. Popolvirino devis nur koni kelkajn preĝojn kaj por tio sufiĉis memoro.”

“Mi komencis korinklini multe al via patrino, tion ankaŭ ebligis miaj gepatroj”, diris Andreo. “Grandan parton de mia libertempo mi pasigis kun ŝi. Mia patro nomis nin gefianĉoj. Mi memoras, kvazaŭ tio okazis hieraŭ, kiam ŝi ricevis vian unuan leteron. Estis vespero. Mi troviĝis sola en la kuirejo, kiam via patrino revenis el la fontano kun akvujo surkape. Ŝi ĝin deponis en niĉo. El la korsaĵo, kiel tiam kutimis, ŝi elprenis leteron kaj demandis al mi duonvoĉe, ĉu mi volis legi por ŝi vian skribaĵon kaj poste skribi al vi respondon. Tio estis elmonro je fido, honoro kiu igis min orgojla. Sed tio devis okazi, ŝi klarigis al mi, je ĉies nescio, inkluzive de miaj gepatroj. Ŝi volis konfidi siajn pensojn nur al mi, ŝi diris, al senpeka infano. Mi tuj akceptis. Certe via patrino ne komprenis la gravecon de tiu peto; kaj eĉ mi ne povis imagi kiajn profundajn spurojn tiu korespondado estos lasinta en mi. Mi volas, Luka, tion diri tuj: tiu okazaĵo restas unu el la grandaj eventoj de mia vivo. Eble, sen troigo, la plej influa. Temis por mi pri antaŭtempa distanciĝo de la senpensa infanaĝo; la unua renkonto kun la doloroj de ekzistado. Ne forgesu ke je tiu aĝo estis por mi ankoraŭ tre malfacile kaj legi

kaj skribi; al tio aldoniĝis la ekscitiĝo pro la sekreto. Ĉiun leteron, antuax la enpoŝtigo, mi devis skribi kaj kopii plurajn fojojn. Via patrino diktis al mi per malalta kaj singardema voĉo. Mi ne scias ĉu ŝi ĉiam havis voĉtonon tiel mallaŭtan. Ŝi ne parolis, ŝi flustris. Ŝi zumis frazon, restis iom pensante, tuj ĝin korektis. En sia malfeliĉego ŝi parolis al mi kvazaŭ al plenkreskulo, ŝi eldiris malklarajn vortojn, nekomprenoblajn aludojn. Mi deprimiĝis, ĉar mi ne komprenis ĉion. Tiuj vortoj, tiuj suspiroj estis por mi antaŭsignoj de nekonata mondo. Tio min terurigis, sed mi klopodis kaŝi tion. Via patrino parolis kun mi ne konjektante la grandegan efekton de siaj vortoj. Certe ŝi ne forgesis, ke mi apenaŭ estis knabo; ŝi tamen parolis kun mi, mi pensas, ĉar ŝi bezonis komuniki kun iu; kiel dum malĝoj-paroksismo persono povas paroli kun sia hundo, aŭ kun plantaĵo. Ofte ŝi parolis kaj per naztuko surbuŝe ŝi klopodis sufoki la singultojn. Komence, verdire, aspektis strange ke persono tiel prudenta kaj skrupulema kiel via patrino elektis min, kaŝe de miaj gepatroj, por tiu grava korespondado. Tagon mi rakontis al ŝi mian embarason. “Ĉu vi kredas, ke Luka estas senkulpa?”, demandis al mi Teresa. “Kompreneble”, mi diris. “Nu, la aliaj taksas lin kulpa”, ŝi aldonis. “Kulpa je tiu murdo aŭ eble je io alia, sed ĉiukaze kulpa. Jen kial mi ne turniĝis al ili.”

“Ĉu vi vere kredis je mia senkulpeco? Kiel? Kial?” demandis Luka

“Mi estis certa pri tio”, respondis Andreo. “Sed estas neeble al mi klarigi la kielon kaj kialon. Via patrino asertis vian senkulpecon per maniero, kiun forigis ĉiun dubon. Tre malofte, poste, dum mia vivo, mi spertis tiun saman senton de absoluta certo. Se mi devus ĝin priskribi per mia nuna parolmaniero, kiel plenkreskulo, mi povus diri, ke tiu estis mia unua intensa kaj sincera sperto de komunikado inter animoj. Sed tiu certeco naskis en mi grandan problemon. “Se Luka senkulpas” mi demandis al Teresa, “kial oni lin kondamnis?”. “Li ne sukcesis eskapi sian sorton” ŝi respondis al mi. Tiu difino ‘sorto’ donis al la maljustaĵo teruran sencon: ĝi fariĝis iasence laŭnatura. Ĉar mi ne povis agnoski mavecon nek trompemon de mia patrino, de la paroĥestro, de la lernej-instruisto, mi ekpensis ke maljustaĵo povas okazi spite de bonaj aŭ malbonaj intencoj de la homoj. Kruele estis kiel malbona vetero. Kial do aspektis kiel senhonorigo eniri malliberejon? Ĉu ankaŭ honoro dependis de la sorto? Mia eta cerbo streĉiĝis konfuzo kaj pene. Ha, mi estis tiam nur knabo, sed mi jam sciis kiel statas la aferoj. Tiu estis por mi antaŭkono pri la vivo. Kiam, post pluraj jaroj, okazis al mi kelkaj aferoj, mi ne miris. Mi ilin iel atendis. Mi jam sciis, ke la mondo estis tia. Sed kiel priskribi al vi nun tiun emocion? Eble se mi meditas pri tiu stranga situacio per mia hodiaŭa kritik-kapablo, via patrino havis aliajn motivojn por konfidi al knabo, prefere ol al plenkreskulo, la respondon al viaj leteroj. Estas verŝajne, mi celas, ke kelkaj novaĵoj kaj pripensoj, kiujn ŝi diktis al mi, kaj kiujn mi ne komprenis estus povintaj suspektigi plenkreskulon. Sed tiu dubo tiam eĉ ne tuŝis mian menson; kaj sume, malgraŭ la timoj kaj penoj venintaj el ĝi, mi tuj akceptis tiun rolon, kvazaŭ elektita por mi de la sorto. Mi

skrupule tenis la sekreton. Mi sentis ke ĝi entenis teruran sencon pri ekzistado, kiun mi antaŭe ne konis kaj ke ĝia ekkono levis min pli alten ol miaj samaĝuloj. Mi ne estis ajna skribisteto: oni min envolvis en vera komploto, kune kun tutviva malliberulo kaj ties patrino. Ankoraŭ nun, Luka, mi povus citi parkere longajn partojn el tiu nia korespondado.”

“Mi bonege memoras la infanan skribon de tiuj leteroj”, diris Luka. “Sed mi neniel estus imaginta tiom. Mi ankaŭ memoras, ke pluraj frazoj alvenis al mi cenzuritaj.”

“Fojon vi demandis al via patrino la nomon de la skribanto. Repensante pri tio nun, mi supozas, ke vi volis esti certa pri lia diskreteco.”

“Mi ne ricevis tamen respondon.”

Andreo ridetis.

“Ankaŭ ni, vi komprenas certe, devis gardi la sekreton. Mi havus ankoraŭ tiom da aferoj por diri al vi. Vi ne devas forgesi, ke tiam mi havis neniam vivosperton kaj ke mi antaŭe neniam estis skribinta leterojn. Tiuj adresitaj al tutviva malliberejo estis la unuaj. Dum mi ilin skribis kaj kopiadis, mia koro batis furioze. Post nelonge mi ĉesis frekventi miajn samaĝulojn. La infanaj ludoj sur la rivera sablobordo ŝajnis al mi tre foraj kaj sencelaj, kiel nelogata vilaĝo. Tio estis nur la naiva lando de la Donacoj aŭ la Ĝardeno kie patrinoj trovas siajn infanojn. Mi ankaŭ baldaŭ ekneglektis miajn lerneajn devojn, kiuj aspektis tiom negravaj kompare kun la sekreta tasko. Ĉiu letero okupis plurajn tagojn. Krom la ĉiumonata sendata al vi, estis ankaŭ, ĉiuj por vi, pluraj aliaj. Ne estis facile por infano el la tria klaso trovi taŭgan esprimon por ĉiuj aferoj rakontitaj dialekte de via patrino: pri si, pri la pagendaj ŝuldoj, pri la peto favore al vi sendota al la reĝo aŭ al la reĝino, al la duko de Abruzoj, al la papo, al la filino de generalo Garibaldi. La malfeliĉa virino, kredis fakte je la sorto, sed ne malagnoskis dian gracon kaj potenculan grandanimon. Tio, kion ŝi tute malfidis, estis justico, tiom ke laŭ ŝi eĉ ne valoris la peno malŝpari vortojn pri ĝi. Do, ni kelkajn tagojn pasigis la tutan liberan tempon en sekretaj kunsidoj. Plej ofte, por ke neniu nin ĝenu, mi iris ĉe ŝi. Kompreneble ankaŭ por la leteroj al la aŭtoritatoj, la nemalhavebla peranto estis mi. Piede de la folio de mi streĉe skribita, via patrino subskribis per krucosigno. Mi jam sciis, ke tiu estis la kutima maniero de la analfabetoj por subsribi; sed kian subskribon oni povus imagi pli taŭga por via patrino? Malgranda kruco. Ĉu ekzistas plu elvokiva ol ĝi? Mi memoras ke, la postan jaron, dum la kateĥismo-ekzameno, pastro Serafeno petis de mi interalie la signifon por kristano fini preĝon krucosignante sin. “Ĝi memorigas nin pri la Pasiono de nia Sinjoro”, mi respondis, “kaj ankaŭ pri la subskribo de mizeruloj.”. La paroĥestro diris ke la respondo ne estis malĝusta, sed ke mi ne havis rajton ŝanĝi la manlibron de kristana doktrino. Mi ankaŭ memoras la profundan impreson, kiun donis al mi, en la sama kateĥisma kurso, la vorto Revelacio, kiam pastro Serafeno ĝin klarigis al ni. Mi devis forte min teni por ne diskriegi la revelacion de Teresa pri monda maljusteco... Sed eble mi vin enuigas.” Diris



Andreo. “Kompare kun via situacio, kio estas tiaj infanaĵoj?”

“Mi petegas vin daŭrigi”, diris Luka kortuŝite. “Estas por mi ege grava tio, kion vi diras. Bonvolu min kredi.”

“Mi ne scias”, diris Andreo, “ĉu tio povas vere esti grava por vi. Miaflanke, dum mi parolas, estas kiel se fine mia vivo fariĝus pli klarsenca. Mi estis, laŭnature, sengaja knabo, facile kaptebla de absurdaj angoroj. Mi volas insisti nun pri ĉi detalo, por ne surŝultrigi al via patrino iun ajn respondecon. Prefere, juĝante nun, mi devus paroli pri merito de ŝi. Tiu estis por mi la una malkovro de la duflankeco de homa ekzistado. El tie venas la manio, mi dirus la obsedo, malkovri tion, kio kaŝiĝas en ĉiu situacio. Sed mi volas aldoni, ke en ĉi tiuj rememoroj, mi ne scias ekzakte, kie finiĝas kelkaj faktoj vere spertitaj, kaj aliaj nur timataj aŭ dezirataj. La sekreto grandigis eksterordinare ĉion, kion ĝi kaŝis. El tio rezultis memstara vivo, apud tiu, banala, de la aliaj homoj. Kun la tempopaso mi fariĝis des pli morna kaj ema al soleco. Strangaj ideoj agitiĝis en mia menso. Kaj mi malkovris la maĝojon de la plej fia soleco, la malĝojon ne povi kundividi, kun siaj karuloj, la motivojn de la animaj angoroj. Pri kio fakte temis, nek mia patrino, nek mia patro kaj ankaŭ ne mia frato eĉ ne ete suspektis. Kiam ili iel klopodis min ridigi, preskaŭ ĉiam ili atingis la malan rezulton: ofendiĝo kaj ploro. Iu malofta strebo miaflanke ne havis pli bonan rezulton. Matenon, dum ni trinkis laktokafon ĉirkaŭ la tablo, mi rakontis, ke mi dormis malbone kaj ke mi leviĝis kun dolorantaj manartikoj. “Mi sentas ilin” mi diris “kvazaŭ oni fermis ilin longe en mankatenoj”. La esprimo elektita de mi estis ja ridinda; sed pasis longa tempo antaŭ ol mi sukcesis pardoni la ĉiesan rideksplodon, kiu ĝin sekvis, kaj la fakto ke tiu aserto, je mia malfeliĉo, estis diskonigita tuj inter parencoj kaj amikoj. Ĉu ili do taksis min neinda porti mankatenojn? Iun postagmezon mi estis sola en mia ĉambreto, kuŝanta surlite, nenion faranta, kiam mia patrino, kies paŝadon mi ne aŭdis, aperis subite ĉe la pordo. Min kaptis tuj subita timego. “Kion vi volas?” mi kriis al ŝi. “Kion vi serĉadas? Kial vi kontrolas min?” Mia patrino prave konsterniĝis. Ŝi havis enmane eta donacon por mi, ŝi venis por alporti ĝin al mi. “Kio okazis al vi?” ŝi demandis. “Ĉu vi ne plu amas min? Ĉu vi ne plu fidas je mi?”. Sed por kio valoris amo aŭ fido, se ĉi tiuj sentoj ne helpis por ke senkulpulon oni ne fermu en malliberejo. Kaj plu tiele, ĝis kiam mi ekmalsanis. Vesperon min skuis fortaj tremoj kaj dum la nokto altiĝis multe febro. La kuracisto diagnozis pulmiton. La malsano estis longa, ĝi min ĉenis al lito dum la tuta vintro kaj kostis la lernejan jaron. Mia patrino kaj la via vice staris ĉe mia lito. Tuj post resaniĝo mi rekomencis skribi. Sed la postan printempon viaj leteroj ĉesis alveni.”

“Pro malobeo al la direktoro”, diris Luka, “Oni min denove punis je unu jaron da apartigo.”

“Dum tiu periodo mortis via patrino”, diris Andreo.

“Tion skribis al mi pastro Serafino.”

“Ŝi estis forta kaj samtempe delikata” diris Andreo. “Kelkajn fojojn, dum mi legis

viajn unuajn leterojn, ŝi svenis, je mia granda konsterno kaj timo. Ekde tiam, por reanimiĝi, ĉiun fojon kiam ŝi sentis sin svenonta, ŝi kutimis alproksimiĝi al la nazo boteleton da vinagro. Kaŭze de tio, vinagrodoro fariĝis por mi laodoro de persekutita senkulpeco. Temis pri la sama vinagro, mi pensis, per kiu oni trempis la spongon alproksimigitan de la legiano de Pilato al la lipoj de la Krucumito, kiam li lamentis soifon.”

Luka dume turnis al li la dorson kaj komencis senfoliigi verdajn maizajn spadikojn, sed ĉe tiuj vortoj, li ĉesis.

“Se mi pensas pri via ekzistado...”, aldonis Andreo, sed li ne daŭrigis.

Li restis rigardanta teren kun sinteno laca kaj pensema.

“Oni vin atendas ĉe la urbodomo.” Memorigis al li Luka turnante sin por lin alrigardi. “Estas tempo. La tuta vilaĝo jam tie ariĝis. Okazos paroladoj kaj bufedo.”

Andreo restis pensante, kvazaŭ li ne aŭdus.

“Mi volas peti de vi komplezon”, li diris fine.

“Volonte”, respondis Luka. “Plej kompreneble.”

“Mi vin certigas, ke ne temas pri scivolemo, sed nur pri emo al kompreno.”

“Pri kio temas?”

“Jam pasis tiom da tempo” diris Andreo. “Okazis tiom da katastrofoj, unu tertremo kaj tri militoj. Tre malmultaj vivas ankoraŭ de tiu tempo, vi scias. Pro via apero inter ĉi tiuj ruinoj, ŝajnas al mi vidi resurektinton. Se vi rigardas ĉirkaŭ vi...”

Li denove ne finis la frazon kaj eksilentis.

“Vi petis komplezon de mi”, lin rememorigis Luka.

“Kial vi ne defendis vin dum la proceso?”, lin demandis abrupte Andreo.

“Kial vi rifuzis sciigi, kie vi pasigis la nokton de la krimo?”

Luka ekstaris.

“Mi bedaŭras”, li diris. “Bonvolu kredi min, Andreo, mi vere multe bedaŭras, precipe post tio, kion vi ĵus rakontis al mi. Sed mi vin petas ne insisti per via demando.”

Andreo ridetis kaj jesis per kapmovado.

“Mi ne insistos” li diris. “Mi eĉ ĝin retiras.”

La okuloj de Luka pleniĝis je larmoj. Li malfermis la brakojn por ĉirkaŭpreni Andreon longe kaj korinkline.

Tra la pordo duonfermita enkliniĝis Toni.

“Ha, vi do estas ankoraŭ ĉi tie?”, li ekkriis vidante Andreon, “Ĉu vi ne scias ke oni vin atendas ĉe la urbodomo?”

“Diru al neni, ke mi estas ĉi tie.” diris Andreo. “Prefere prenu ĉi monon kaj iru aĉeti ion por manĝi.”

“Toni, ne iru”, diris Luka. Poste turniĝinte al Andreo, li aldonis: “Vi estas mia gasto, devas do zorgi mi. Mi tuj bolkuiros freŝan maizon”.

## Ĉapitro ses

“Vi vere troigis, jen do, ekkriis pastro Serafeno ŝajnigante skandaliĝon. “Ĉu oni rajtas scii, kie vi tiel edukiĝis? La urbestro, la skabenoj, la paroĥestro, la karabineroj atendis vin ĝis la dua. Ĉu vi sukcesas imagi kiel aĉe ili impresis la loĝantaron pro vi?”

“Ĉu ne ankaŭ vi min atendis?” demandis Andreo. “Domaĝe”.

“Plej kompreneble, mi ankaŭ ĉeestis”, respondis pastro Serafeno. “Sed mi estis la sola, kiu antaŭvidis vian nevenon, la sola kiu konis la veran motivon de via foresto kaj ankaŭ la sola”, li aldonis pasante de serioza al ŝerca tono, “la sola kiu sekrete priĝuis la spektaklon.”

“Vi ne malkaŝis, mi esperas, kie mi troviĝis.”

“Ne, mi rolis mian rolon. Kian amuzon. Mi incitis la najbarulojn kontraŭ vin. ‘Temas pri vera skandalo’, mi diris. ‘La nova reĝimo malbone komenciĝas; se mi estus la urbestro’, mi diris, ‘mi tutsubite demisius.’ Inter la plej ĉagrenitaj, mi devas tion rekoni, estis pastro Franko. Li vin atendis senpacience kun pluraj papervolvaĵoj subbrake. ‘La proksimaj komunumoj krevos pro envio’ li diris alvenante. Jes tiu estas lia religia idealo: pliigo de konstruado. Vi do povas imagi, ankaŭ por li, kia elreviĝo. Kiam la urbestro anoncis de la balkono, al la malgranda homgrupo plu restanta je tiu horo antaŭ la urbodomo, ke malgrava vojaĝa akcidento malhelpis vian alvenon, inter la ĉeestantaro aŭdiĝis rid-eksplodo. Eble iu vin rekonis ĉi matene, kiam vi eliris el mia domo. Sume, Andreo, mi devas tamen diri, ke mi vin ŝatas. Nu, vi estas pli bona ol kiom mi antaŭvidis.”

“Ĉu vin amuzas skandaloj?”

“Jes. Tiuj, kiuj senreputaciigas la civilajn aŭtoritatojn eĉ redonas al mi fidon. Nun ni devos nur enketi, kie perdiĝis la vermutaj boteloj kaj la kuketoj aĉetitaj koste de la komunumo por la regalado viahonore.”

La studejeto de la pastro, kies plafono estis malalta kaj kies muroj estis tegitaj per malhela ligno, ricevis lumon el du malgrandaj fenestroj.

“Ĝi aspektas kiel vesperto-groto”, diris Andreo.

“Tiu estas aserto de krudulo”, respondis al li la pastro.

La vandoj estis parte kovritaj de bretoj plenaj je volumoj kaj polvoplenaj registrolibro. Sur la kameno, en vitra kloŝo, estis papermaĉa statueto simbolanta la Bonan Ŝafiston. En la aero ŝvebis apenaŭa ŝim-odoro. Pastro Serafeno sidis ĉe tableto kovrita per vakso-tolo, kurbiĝinte super la latinlingvaj hejm-taskoj de kelkaj privataj lernantoj, korektante ilin per ruĝa krajono. El la duone malfermita buŝo eliris peza spiro, maljunuleca. La konata kranio servis kiel paper-premilo. Andreo rigardis la matenajn gazetojn kaj fumis pipon apud la fenestreto, kiu malfermiĝis al la legom-ĝardeno. Oni plurfoje sonoris ĉe la pordo.

La pastro iris vidi kaj iomete restis tie parolante kun kelkaj personoj ariĝintaj antaŭ la pordo.

“Ili volas paroli kun vi”, li diris al Andreo. “Se vi preferas vi povas ilin enlasi unuope.”

“Kiuĵ ili estas, kion ili volas?”

“Malriĉuloj. Iu atendas pension, alia helpmonon.”

“Kaj kial ili ne iras ĉe la urbestro?”

Estis ĝuste la urbestro, kiu adresis ilin al vi. Vi devus aŭskulti ilin”, aldonis pastro Serafeno. “Mi ilin konas, ili vere estas malriĉegaj.”

“Ĉu per rekomend-letero ili eble ĉesos esti malriĉaj?”, protestis Andreo. “Al malriĉuloj mi volas sciigi, ke ili petu de mi aliajn aferojn.”

Pastro Serafeno reiris al la pordo kaj diris ion; poste reiris al sia tableto por denove korekti la hejm-taskojn.

“Mi forgesis diri al vi”, li aldonis turniĝinte al Andreo, “ke inter la viktimoj de via malbona eduko, hieraŭ troviĝis ankaŭ kelkaj senkulpuloj.”

“Nome?”

“Via dolĉa onklino Klariĉe.”

“Kompatinda onjo, kion ŝi pretendis de mi?”

“Ŝajnas ke ŝi aranĝis viahonore bankedon ĉe ŝi.”

“Mi tion ne sciis; se ŝi nur estus min avertinta, mi certe malinstigus ŝin.”

“Ie vi ja certe devis manĝi”, protestis pastro Serafeno. “Se diri la veron, por ne elmeti vin al invito fare de la urbestro, mi mem diris, ke eble vi preferus inviton fare de parenco. Ĉiukaze, ŝi vin atendas ĉi vespere. Mi promesis al ŝi, ke ĉi tiun fojon vi ne malestos.”

“Vi min ĵetas en kaĉon”, grumblis Andreo. Poste li demandis: “Kion faras nun Luka?”

“Li estas supre, en sia ĉambro. Eble li ripozas; aŭ eble li staras ĉe fenestro rigardante la kamparon.”

“Por ĉi vespero mi skribos pardon-bileton al onjo Klariĉe. Ĉu mi povas ĝin konfidi al via dommastrino?”

“Mia dommastrino foriris”, diris la pastro. “Ĉu mi jam ne rakontis tion? Tiu ridinda megero, tuj post kiam Luka ekloĝis ĉi tie, ĵetis teren la kitelon kaj maldungiĝis, eĉ sen la kelktaga leĝa antaŭsciigo. Kompreneble Luka ne scias pri la akcidento.”

“Ankaŭ ŝi... Kion ŝi riproĉas al li?”

“Evidente, ke li sidis la tutan vivon en malliberejo.”

“Ĉu ŝi ne scias, ke li estas senkulpa?”

“Jes, certe jes, ŝi tion scias kiel ĉiuj aliaj. Tamen...”

Andreon tion ĝenis kaj malĝojigis.

“Kristo, kia gento”, li diris. “Ĉu neniu kataklismo kapablas ilin ŝanceli?”

“Bele aŭ mise”, aldonis pastro Serafeno, “la litojn reordigos ni mem. Ne estas malfacile. Sed por la cetero, je mia aĝo la manko de servistino ja ĝenas.”

“Kun tiu ĉi malriĉeco ĉitempa”, diris Andreo, “iun ajn servistinon oni ne malfacile trovos.”

“Ĉu vi pensas? La kanonika kodo malpermesas al mi dungi junan virinon, kaj ĉiukaze certe ne malpli ol kvardekjaran”, klarigis la pastro. “Nejuna, cetere, spite al neceso, ne akceptos, mi certigas tion, pro la sama motivo de tiu, kiu foriris.”

“Oni do povus diri, ke Luka timigas”, abruptis Andreo. “Sed kial?”

Pastro Serafeno iom silentis. Morna vizaĝe. “Unuamomente, kiam mi eksciis pri lia reveno, mi konfesas, mi ankaŭ timis”, li fine flustris. “Kial? Mi mem ne kapablus tion klarigi. Mi eĉ troige proponis al la karabinjera ĉefserĝento, ke oni gastigu Lukan en iu restadejo por maljunuloj, malproksime de ĉi tie.”

Andreo turniĝis agreseme kontraŭ la pastron.

“Kion povis timi, vi?”, li demandis fikse rigardante ties okulojn.

“Mi estis lia paroĥestro”, respondis pastro Serafeno per evitema frazo.

“Paroĥestro respondecas pri la sorto de siaj fideluloj.”

“Pardonu, sed ĉi tio ne sufiĉus por timi”, incitis Andreo. “Mi vin ne komprenas.”

Verŝajne pastro Serafeno ne estis preparita por ĉi tiu diskutado ĉar esprimo de pliĝanta embaraso aperis sul lia vizaĝo dum Andreo lin surŝutis per siaj demandoj.

“Nu Andreo, temas pri faktoj, kiujn vi ne povas kompreni”, pardonpetis pastro Serafeno. “Vi tiam ankoraŭ ne naskiĝis., kiam tio okazis.”

“La homa naturo, tamen”, kriis Andreo, “ja ne ŝanĝiĝis dum tiuj du jaroj.”

“Ne tiel laŭte, mi petas”, diris pastro Serafeno. “Li povus nin aŭdi”. Poste aldonis: “Eĉ se vi scius ĉion, kreu min, vi vin troviĝus same antaŭ mistero.” Andreo rikanis.

“Jen vorto iom tro facila”, li diris. “Vi, pastroj, uzas ĝin ĉiun fojon, kiam vi volas eviti embarason.”

“Mi vin ne taksis tiel kruda”, ekkriis la pastro. “Tamen ne temas pri mi, sed pri Luka. Se vi kapablus, vi devus primediti tion. Malgraŭ la granda emocio, kiun li sentis dum via renkontiĝo, li rifuzis doni al vi la petitan klarigon. Ĉu vi eble ne kredas, ke lia diskreteco rajtas iom da respekto?”

“Certe jes”, konsentis Andreo. “Vi pravas. Sed mi, mi tion certigas, ne estas simple scivolema. Kiel klarigi? Nu, la sekreto de Luka entute koncernas ankaŭ min.”

“Iasence ĝi koncernas ĉiujn”, grumblis pastro Serafeno.

Li ekstaris kaj rigardis la straton tra fenestreto trakrucita de du ferstangoj. La febla lumo heligis la konturon de liaj blankaj haroj kaj donis aspekton gipsecan al lia vizaĝo, kun ŝimkoloraj ombroj. Post nelonge li ree ekparolis:

“Mi ne scias ĉu mi jam rakontis al vi...”

“Vi rakontis al mi nenion”, lin interrompis Andreo.

“Kion vi do pretendas ke mi diru al vi?”, demandis pastro Serafeno incitite. “Vi ja ne estas mia konfesprenanto. Mi intencis diri: antaŭ ol via foriro...”

“Nun mi ne foriros”, diris Andreo malĝentile. “Ĉu tio vin ĉagrenas?”

“Ne kondutu arogante, mi vin petegas”, diris la pastro. “Mi ne komprenas kial tio min ĉagrenus.”

Inter la du formiĝis malagrabra silento. Andreo ree eklegis la gazetojn, dum la pastro turnis al li la dorson, vizaĝe al la fenestro-krado.

“Alvenas vizitantino por vi”, li anocis post iom, sen turniĝi. “Via onklino Klariĉe.”

Andreo mem rapidis al la pordo. Sinjorino jam neĵuna, sed ankoraŭ svelta kaj maldika, nigre vestita per iel malmoderna fasonaĵo, staris antaŭ la pordo.

“Kara onjo Klariĉe”, diris Andreo, “ŝajnas ke vi min atendis hieraŭ posttagmeze. Mi bedaŭras pro la maloportunaĵo, sed mi eksciis pri tio nur hodiaŭ.”

“Jes, fakte temis pri maloportuna afero”, substrekis la sinjorino. “Ni vin atendis ĝis la dua.”

“Ĉu vi ne volas eniri momenton? Pastro Serafeno ja min riproĉus pro...”

“Li jam min vidis plurajn fojojn, hieraŭ kaj hodiaŭ, kaŭze de vi. Andreo, mi do venis por demandi ĉu ni povos almenaŭ esperi vin gastigi ĉi vespere. Ĉeestos nur parencoj. Estas tiom da jaroj, ke ni ne vidas vin.”

“Verdire, ĉi vesperon mi devos foriri”, pardonpetis Andreo. “Vi certe komprenos, mi havas tiom da urĝaĵoj; kaj antaŭ la foriro, mi devos renkonti amikon.”

“Vi ja povos kunporti lin”, proponis sinjorino Klariĉe. “Ĉu ni ne indas je li?”

“Tute male, sed ĉu vi certas? Li ne ĝenos?”

“Estos por ni honoro, se temas pri via amiko. Kiu li estas? Ĉu fremdulo? Aŭtoritatulo?”

“Ne temas pri nia vilaĝano”, klarigis Andreo. “Antaŭ longe li estis granda amiko de mia patro. Lia nomo estas, sed mi ne scias ĉu vi konas lin, Luka Sabatini.”

“Ĉu la malliberulo?”

“Pli precize, la eksa malliberulo.”

Kaj vi volus konduki ĉe mi eksmalliberulon?”, ekkriis onklino Klariĉe.

Ŝiaj dolĉaj okuloj, rondaj kiel ĉerizoj, pleniĝis je hororo.

“Onjo”, klopodis klarigi Andreo, “vi eble ne scias, sed la kompatindulo estas senkulpa”.

“Senkulpa aŭ ne, li sidis la tutan vivon en malliberejo. Andreo, vi pretendus ke tia individuo...”

“Onjo, atentu pri viaj vortoj. Ŝajnas al mi, ke mi jam diris, ke temas pri amiko mia.”

“Mi komprenas, Andreo, nun vi okupiĝas pri politiko kaj do vi ne povas elekti viajn interrilatojn, sed estu komprenema, la mia estas privata domo, mi havas du filinojn jam en aĝo por edziniĝi, la plej granda, Florulino, baldaŭ fianĉiniĝos...”

“Mi certigas al vi, onjo, ke en mia amikeco al Luka, politiko tute ne havas rolon. Sincere, el la tuta loĝantaro de Cisterna, li estas tiu, kiun mi plej estimas.”

“Kompatinda, kompatinda Andreo”, kriis denove sinjorino Klariĉe. Sed emocio malhelpis ŝin plu paroli kaj por eltiri sin el embaraso ŝi foriris, exc preskaŭ fuĝis per rapidaj paŝetoj, ne salutinte.

Ŝiaj filinoj atendis ŝian revenon starante ĉe ter-etaĝa fenestro kradita de fer-

stangoj. Ilin ja tre timigis ŝia maltrankvilega aspekto.

“Kio okazis al vi?”, demandis Florulino. “Panjo, ĉu vi fartas malbone?”

“Filinoj miaj”, flustris sinjorino Klariĉe apenaŭ sufokante singultojn, “Via kuzo freneziĝis. Li indas enfermigon.”

## Ĉapitro sep

La maljuna juĝisto ne praktikis sian profesion jam de pluraj jaroj, sed li konservis la titol-ŝildon sur la vilao-pordo kaj plue tenis sur la skribotablo la kodojn kaj plurajn flaviĝintajn broŝurojn de la Leĝa Oficiala Gazeto. Ĉe la nomo Andreo Cipriani, li levis la okulojn al la vizitanto, poste li ilin ree direktis al la prezento-letero, sekve li denove rigardis la homon daŭre starantan antaŭ li kaj, sin apogante al bastono, li leviĝis el la fotelo.

“Instruisto Cipriani?”, bone, bonege, kaj... Karolina, Karolina”, li kriis, “du kafojn.”

“Mi vin atendis, sinjoro Cipriani, la prezidanto de la Apelacia Kortumo ja parolis bone pri vi... tre bone, bonege eĉ, kaŭze de l' ŝanĝiĝo de la konjunkturo.”

La majuna juĝisto lin kaptis ĉe brako kaj, iomete lamante tra mallarĝa kaj senluma koridoro, lin kondukis en la akceptoĉambron.

“Ni eksidu sur tiun divanon”, li diris, “Sur la apuda tableto kuŝas kion vi serĉas. Ĉu vi vidas, sinjoro Cipriani, ĉi tiun amason da aktoj difektitaj de ŝimo? Legu la titolon”

“Ĉu temas pri la aktoj de la proceso Sabatini?”, ekkriis Andreo. “Antaŭ ol veni al L'Aquila, mi timis ke ili forperdiĝis.”

“Ili troviĝis ĉi tie, laŭ petita permeso”, klarigis la majuna juĝisto per akra voĉo.

“Mi ilin bezonis por verki miajn memorojn. Ĉu mi finverkis ilin. Ne ankoraŭ ne, sed baldaŭ. Nun mi vivas preskaŭ nur per rememoroj. La memoro estas mia ĉiutaga vivejo kaj tio tenas for de mi la nuntempon, ĝin farante iel elteneblan. Pro la sama motivo, mi eliras malofte kaj nur nokte. Mi diras tion respektante vin, homon de la nuntempo.”

“De la estonto, eĉ”, korektis Andreo ridetante.

“Des pli aĉe”, verdiktis la maljuna juĝisto. “Eĉ des pli aĉe. Sed mi jam troviĝas sur la deklivo. Kiel retroiri? Bonvolu sidiĝi. Ĉu vi fumas?”

“En la proceso kontraŭ Sabatini, se oni ne malbone min informis”, tuj ekstraktis la temon Andreo, “vi rolis kiel akuzanto.”

“En maniero, je mia honoro, pri kiu mi ankoraŭ orgojlas”, jesis la majuna juĝisto.

“Nun oni tute ne imagas, kiom da lerto bezonis tiutempa akuzado.”

“Eĉ ne la pleja lerto, ankaŭ tiam, tamen ŝirmis de juĝ-eraroj. Errare humanum, oni ja scias.” Diris Andreo.

“Mi ne komprenas, pri kio vi precize aludas.”

“Jen, vi ja certe jam scias, ke antaŭ kelkaj monatoj, oni fine agnoskis la senkulpecon de Luka Sabatini.”

“Stultaĵon”, ekkriis la maljuna juĝisto frapante la bastonon surplanke.

“Kompreneble, plej respekteme, mi volas substreki nur ke Sabatinin oni amnestiis, ne rehabilitis. He, he, ja estas diferenco.”

“Ĉi kaze”, diris Andreo, “diferenco nur formala.”

“Sed en juro formo esta ĉio, sinjoro instruisto, kiel en arto. Permesu ke mi instruu tion al vi. Samkiel en arto”, li ripetis post paŭzo.

“Nu, do”, klopodis klarigi Andreo, “oni utiligis amnestiadon ĉar ĝi estas pli rapida kaj cefe senkosta. Rehabilitado, kiel vi min instruas, bezonus novan proceson, do advokatojn, oficialajn aktojn kaj aliajn diablaĵojn. Sabatini male ne havas monon, nek parencojn, kaj li ne taksas gravaj legajn formalaĵojn.”

“Ne, ne, ne” rebatis energie la majuna juĝisto, “tiu ĉi estas nur infaneca elturniĝo. Por malriĉuloj ekzistas senpaga defendado. Pardonu, mi petis al vi ĉu vi fumas.”

“Ne nun, dankon.”

La majuna juĝisto ekbruligis cigaredon, kiun li enŝovis en longa nigra ingo. Li estis maljunuleto gracila, rafinita, ambigua; lia vizaĝo ovala kaj flava, liaj okuloj malviglaj donis al li aspekton de nokta birdo; liaj malmultaj haroj gluiĝis en mallarĝaj strietoj sur la kranio ronda kaj brilanta, videble tinkturitaj per nigra koloro kaf-nuanca. Andreo rigardis cirkaŭ si senaplombe. La dikaj kurtenoj violkoloraj, de la fenestroj, kvankam senkoloriĝintaj, enlasis tie alkovecan duonlumon. Apud la fenestro staris alta pupitro, sur kiu estis dika volumo kaj, super ĝi, fer-fadena kaĝeto, en kiu dormis du kanarioj. De la vando malantaŭ la ŝultroj de la majuna juĝisto pendis granda portreto de Umberto I kun reĝino Margerita.

“Vidu, sinjoro Cipriani”, ree ekparolis la maljuna juĝisto, “persone mi neniel kontraŭas la amnestion al Sabatini. Kial mi devus? Kiel ĝi povus min tuŝi? Sed se li petus proces-revizion kaj al mi, abstrakte parolante, oni denove komisius akuzadon, nu, mi povas tion certigi, sinjoro Cipriani, mi petus tutsimple la konfirmon de la unua sentenco. Kaj mi tion obtenus, bonvolu min kredi.”

“Eble vi ne scias”, insistis Andreo, “ke viro el Pertikara, antaŭ kelkaj monatoj, mortonte konfesis sian krimon kaj ke tiel senkulpigis Sabatinin.”

“Mi scias ĉion” certigis la juĝisto. “Ĉion”, li substrekis post paŭzo. “Dank’ al komplezemo de la prokuroro, ankaŭ mi povis legi la atestaĵojn de la konfes-prenanto. Mi eĉ ĝin trastudis pro la intereso, kiun mi havas pri ĉi tiu grava okazintaĵo de mia juĝista kariero. Nu do, sinjoro Cipriani, tiu atestaĵo ne konvinkis min.”

“Kial do?”, protestis Andreo mirante. “La kulpulo eĉ donis pruvojn. Sekve de liaj indikoj, kiel vi certe jam scias, oni trovis en ferm-masonita kaŝejo la monujon ŝtelitan de la viktimo. Ĉu tio ne sufiĉas?”

La sensanga vizaĝo de la majunulo ekgrimacis pro ironia rido. “Ne, ne sufiĉas, sinjoro instruisto”, li diris. “Ĝi ne sufiĉas por tio, kion vi pretendas. Ĉi tiuj novaj elementoj tute ne kontraŭas tiujn, kiuj kondamnis Sabatinin. Maksimume ili



povas fortigi la suspekton, de mi klare elmetitan dum la akuzado, ke Sabatini havis komplicojn.”

“Mi male konvikiĝis pri la kontraŭo”, diris Andreo forte. “Mi eĉ certas pri tio. Mi pensas ke...”

“Sinjoro instruisto, ĉu vi permesas, ke mi diru ion al vi?”, interrompis la maljuna juĝisto. “Ĉu vi permesas? Via konvikiĝo tute ne tuŝas min.”

Li faris etan geston, kiu eĉ povis signifi kvazaŭ inviton al foriro por la gasto; sed Andreo ne rimarkis tion, ĉar liaj okuloj restis fiksitaj al la aktaro. La majuna juĝisto sidis diskrure kaj inter la genuoj li tenis sian bastonon, kies tenilo estis ebura, apogante sur ĝin la malgrandajn kaj flavecajn manojn.. Li denove ekaspektis kiel nokta birdo, enuiĝanta kaj apatia, de tempo al tempo li larĝigis la okulojn por kontroli la movojn de la gasto.

“Ĉu mi povas tralegi la aktojn?” abrupte demandis Andreo.

“Mi senrezerve ilin disponigas al vi”, diris la juĝisto.

“Mi ne plu bezonas ilin kaj la prokuroro rajtigis min transdoni ilin al vi, antaŭ la redono al la arĥivo. Mi vin tamen avertas, ke ne temas pri plaĉa lego, kvankam ne malkomprenebla. Oni sciu, ke la tuta afero estis traktita de ĵurianoj, kiuj estis plej parte kamparanoj kaj vendistoj. Mi estas certa ke, finleginte ĝin, ne mirigos vin ke la sentenco de tiuj honestuloj estis kondamno.”

“Por erari en juĝ-afero, ne necesas malhonesteco”, diris Andreo.

“Legu la aktojn, sinjoro Cipriani.” Insistis la maljuna juĝisto perdinte sian paciencon. “Malgraŭ viaj antaŭjuĝoj, vi konvinkiĝos pri la kulpeco de Sabatini. Vi trovos konfirmon por tio, mi aŭdacus diri, en ĉiu folio de tiu aktaro; sed se via pacienco ne sufiĉus, mi konsilas legi almenaŭ la raportojn de pridemandado, kies temo estas la konduto de Sabatini dum la vespero antaŭ la tragika rabado. Li anoncis la krimon, hejme de la fianĉino, tiel klare ke ne eblas dubi. Kaj plie estas lia konduto dum la enketado kaj dum la publika debato. Se fine...”

“Mi komprenas” diris Andreo. “Vi aludas pri la rifuzo de Luka Sabatini klarigi kie kaj kun kiu la pasigis la krim-nokton. Koncerne min, kvankam mi ne konas la kialojn de tiu obstina silentado, mi ne malfacile povas kompreni, ke viro povas silenti pro honor-motivoj, eĉ se tio malutilas al li.”

“Ha ne, sinjoro instruisto, via romantika klarigo ĉi kaze vere ne taŭgas”, abruptis la maljuna juĝisto per tono evidente moka. “Ĉu vi do pretendus atribui al tiaspeca kampulo kavaliran spiriton? Ha, ha, ha, vi ridigas min. Ĉu vi volus surmeti ledan selon al azeno kutimiĝinta al ligna ŝarĝ-apogilo? Plej certe ne mankas do, jes, ne mankas al vi fantazio. Krudulo kapabla preferi tutvivan malliberon al rivelado de sekreto? Ha, ha, ha. Krudulo kavaliro samkiel en antikveco?”

Ha, ha, ha. Jes ja, ĝuste tiel, kaj ĉe ni

el kavaliro ni faris episkopon  
kaj ĉenitan oni lin sendis al Galileo.”

La sarkasmo transformis la fizikan aspekton de la maljunulo, de gufo al akcipitro.

“Kampano”, rebatis Andreo tute ne timigita, “povas havi sufer-kapablon, kiu mirigus juĝiston.”

“Ne diru stultaĵojn, mi petas, sinjoro Cipriani. Ĉu vi naskiĝis en kampara komunumo? Oni ne pensus tion. Kaj vi ne scias do, ke la kapablo suferi de kampuloj estas nur fizika kaj ĝi do eltenas nur se temas pri malsato aŭ batoj? Sed la am-sufero, benita Virgulino, la malfeliĉa pasio, kiu pro l’ malĉeesto de la amo-objekto, nutras sin per la penso pri ĝi, nek koncernas kampulojn, nek burĝojn. Ĝi estas privilegio de la aristokrata animo” kaj aldonis post paŭzo, “kiam ankoraŭ ekzistis aristokratio.”

En la koridoro ektintis la telefon-sonorilo kaj aŭdiĝis raŭka virina voĉo respondi. “Ke tiu revoku poste”, kriis la maljuna juĝisto al la virino turnante la kolon direkte al la koridoro.

“Kredu min, sinjoro Cipriani”, li ree ekparolis, “senkulpulo ne akceptas tian teruran punon, kia estas tutviva mallibero; li dirus ĉion, kion li scias kaj plie ĉion, kion li povas eltrovi siafavore. Da senkulpuloj neparolemaj antaŭ juĝisto, la historio mencias nur du, Jesuo kaj Sokrato. Do mi kredas ke vi ne volas tiom ekzalti ĉi tiun krimulon viavilaĝan...”

La maniero kiel li eldiris la vorton krimulo treege ĝenis Andreon.

“Fine do”, tiu kriis, “kial vi tiom kontraŭas tiun kompatindulon?”

“Li estas ĉapitro de mia membiografio”, respondis trankvile la maljuna juĝisto.

“Ĉapitron, mi certigas, kiun mi pretus defendi per ungoj kaj dentoj.”

Li tion diris per tono sincera kaj kredinda, kia ĝis tiam ne audiĝis en lia voĉo. Tuj li aldonis: “Nun pardonu se miavice mi aŭdacas demandi: kaj al vi, kial tiom interesas tiu individuo?”

“Mi ne komprenas precize, kion vi volas scii.”

“Ĉu Luka Sabatini estas via parenco?”

“Ne, li estas mia amiko. Mia plej bona amiko, eĉ.”

“Ho”, ĵetis la majuna juĝisto kaj restis iom buŝ-malfermite, kun mieno senvole ridinda. “Pardonu”, li diris, “pardonu”. Kaj poste senkonfuziĝinte: “Ĉu via... amikeco komenciĝis antaŭ longa tempo?”

“Jes, antaŭ tridek jaroj, pli malpli.”

“Antaŭ tridek jaroj? Mi ne komprenas, li tiam sidis en malliberejo. Kiel tio eblas do?”

Andreo faris geston signifantan -estus tre longe por klarigi al vi-. “Vidu” diris Andreo per tono akordiĝema “mi ne tion diras pro l’amik-rilato, sed, plej sincere, Luka ŝajnas al mi homo normala, kampano kiel multaj aliaj, nur iom pli malbonŝanca. Eksterordinaraj estis certe la cirkonstancoj, kiun li devis alfronti. Ĉiukaze, li kondukis, ŝajnas al mi, en maniero ne banala.”

“Ĉu vi permesas, ke mi abstraktu ion senkonsidere de via amikeco?” petis la juĝisto. “Ĉu vi permesas? Nu, mi kredas, ke neniu cirkonstanco povas fari el

malaltvalora persono superhomon. Se li tion ŝajngigas, li simple blufas. La blufato tamen ne povas elteni tiel kruelegan kaj longan elprovon, kia tutviva mallibero. Vi scias, sinjoro Cipriani, kiel la falsaj superhomoj en ĉi tiu lando falis malalten. Ni ne parolu, Dio nin gardu, pri superhomoj en rilato kun virinoj. Ne ekzistas superhomoj en kalsonetoj, mi petas, vi kredu tion ĉi kaj forgesu ĉi historion.” La maljuna juĝisto parolis kvazaŭ li diktus al tribunala skribisto, per evidenta ŝato pri sia kapablo improvizi. Li poziciigis pli taŭge sur la divano, kuntuŝigis la polmojn kaj daŭrigis:

“Vi scias kiel mi ke, en ĉi tiu lando, kiu ajn havas aventuron kun virino tuj rapidas rakonti ĝin. Mi ne scias, kiel statas la aferoj en aliaj mondopartoj, sed ĉe italoj la aventuro perdas ĉian allogon se mankas admiro kaj envio flanke de amikoj. Adulton sen envio malŝatus eĉ simpla kolportisto. Se ĉi tie oni serĉadas virin-aventurojn estas ĉefe por ilin diskonigi. Ni parolu sincere, sinjoro Cipriani, el kio venus male la plezuro? Konkerita virino estas publika konfirmo de nia valoro kiel viroj. Sen diskonigado, vere, ni diru, ĉu tio valorus la penon? Temus nur pri naŭza malvirto aŭ pri ordinara ĉambra gimnastikado.”

“Viaj aforismoj, sinjoro juĝisto, estas spritaj sed abstraktaj”, prikomentis Andreo ĝenite. “Al ili bedaŭrinde mi povas kontraŭmeti nenion trafan, ĉar mi ricevis de Sabatini nenian konfidencan kaj mi ankoraŭ ne konas la aktojn.”

“Nu, legu la aktojn kaj vi konsentos, ke mi pravas.” Konkludis la juĝisto. “Mi firme kredas, ke Luka Sabatini silentadis kaj ne eltrovis alibion, nur pro manko de imagivo. Jes, pro ordinara kreteneco.”

“Li ne impresas kiel stultulo”, rebatis Andreo.

“Kredu min, kiam mi diras ke via... amiko estas senkultura krudulo perfortema.” daŭrigis la juĝisto. “Mi ne mirus se post nelonge Justico devus denove okupiĝi pri li pro ia kverelo aŭ interbatiĝo. Li estas furiozulo. Dum la unua pridemandado, al kiu li estis submetita, li ĵetiĝis kontraŭ min, perforte forŝiris kodlibron de miaj manoj kaj ĵetis ĝin en paperkorbon...”

“Tio ne estis kompleza ago”, konfesis Andreo. “Tamen direktita kontraŭ kodon, kiel vi mem diras, ne kontraŭ vian personon.”

“Ĉu vi do pretendus, ke temis pri jurkritika opini-esprimo?” demandis ridaĉante la maljuna juĝisto. “Sinjoro Cipriani, vi min mokas. Diru tion klare, ja ne temus pri strangaĵo fare de homo de la nuntempo, eĉ de la estonto, kiel vi diris.

Ĉiukaze, Sabatini daŭre kulpis perforto-agojn kontraŭ personojn ankaŭ dum la puno en malliberejo, meritante du pliajn procesojn kaj apartigojn. Cetere, ĉu vi scias ke la lastdatan suverenan amnestion preskaŭ oni rifuzis al via amiko ĝuste pro lia aĉa kondutado dum la puno-periodo?”

“Mi tion ne sciis”, konfesis Andreo, “kaj, se mi parolu sincere, tio min mirigas.”

“Jen, ĉu vi rimarkas? En vi formiĝis nevera ideo pri Sabatini”, verdiktis la maljuna juĝisto kontente. “Ŝajngigante stultecon, li ja malfaciligis mian taskon, sed je mia honoro, mi ne sentas konscienc-riproĉon pro lia kondamno. Pri la neeblo ĝisfunde ekkoni la komplikojn kaj krim-komisiatojn, kiuj verŝajne helpis

Sabatinin, certe ne kulpis la juĝistaro, sed la malparolemo de viaj samvilaĝanoj. En miaj memoraĵoj, mi skribis paĝon pri ĉi tiu temo, kaj mi ne diras tion por min laŭdi...”

La maljuna juĝisto silentis dum iom da tempo, apogis la frunton al siaj manoj kaj ŝajne streĉis sian menson por memori ion. Per pluraj signoj Andreo klopodis komprenigi, ke li atendis nur la momenton por foriri kun la aktaro, sed la maljuna juĝisto, baraktante en la nebuloj de sia memoro, ne priatentis lin, ĝis kiam li sukcesis trovi la serĉitan ideon.

“Pardonu”, li diris, “pasis tiom da jaroj. Jen, tagon, por trarompi la silentomuron, en kiu Sabatini enfermiĝis, mi permesis al mi uzi neortodoksan elturniĝon, pri kiu do vi ne trovos spurojn en la aktaro. Mi do false koncedis al Sabatini privatan kolokvon kun lia patrino kaj la paroĥestron de Cisterna. Mi ne scias ĉu tiu pastro ankoraŭ vivas...”

“Jes, li vivas”, diris Andreo.

“Vera Tartufo, mi tion garantias al vi” diris la maljuna juĝisto. “En la ĉambreto, kie okazis la renkontiĝo, oni ilin lasis solaj, sed malantaŭ la pordo subaŭskultis du policistoj kaj mia skribisto. “Ne fidu je ili”, avertis tuj la malliberulo siajn vizitantojn. “Eĉ la muroj havas orelojn ĉi tie”. Malgraŭ tiu averto, post iom da tempo la patrino demandis al li: “Se vi konsentas iu povas atesti favore al vi, ke li vin vidis tiun nokton.” “Ne”, respondis la malliberulo. La patrino ekploris kaj insistis. Kion signifis tiu propono? Ĉu falsa atestado fare de komplico? Oni ne sukcesis kontroli tion, ankaŭ ĉar la cetero de la konversacio estis neaŭdebla.”

“Ĉu vi certas, ke la paroĥestro de Cisterna ĉeestis?” demandis Andreo.

“Nenia dubo”, konfirmis la juĝisto. “Fakte mi lin tuj poste venigis en mian oficejon. Ne menciante la ĵus aŭditan konversacion, mi lin invitis trakti el la preĝeja pupitro la temon de la kristana devo al ver-atestado. La paroĥestro montriĝis tre embarasita kaj evitema. Li respondis al mi, ke vere la pupitro ne dependas de justic-aŭtoritato kaj ke vere la sola juĝo, kiu interesas kristanon estas tiu de la Sankta Di-tribunalo. Nu, el tio naskiĝis inter ni fakta disputo, dum kiu mi senpacienciĝis kaj akuzis lin je prisilentado de gravaj faktoj. 'Eĉ preterlaso de detaloj estas falsa atestado', mi diris al li. Sed la afero kompreneble ne havis sekvojn. Certe tiu pastro sciis plurajn aferojn; bedaŭrinde mi ne sukcesis movigi lian langon. Oni poste raportis al mi, ke du pasionaj pastroj, kiuj tiun jaron predikis dum Karesmo en Cisterna, akceptis mian admonon kaj petis al 'kiu ajn scias', ke tiu parolu. Sed ili estis fremduloj kaj iliaj vortoj neniel efikis. Fine, kredu min, sinjoro Cipriani, se en tiu proceso restis io enigma, tio estis la medion kaj ne la akuziton mem. Kion mi povis fari? Ĉu aresti la tutan vilaĝanaron inkluzive de la paroĥestro?”

“Kial ne?”, diris Andreo. “Tio ne malutilus.”

“Preskaŭ en ĉiuj procesoj restas mistera zono”, rekomencis la maljuna juĝisto.

“Pro la fakto, ke vulpo fosas ĉiam du elirejojn el sia kaŝejo. Bona ĉasisto tamen...”

Andreo ne plu aŭskultis lin, li rigardis sian horloĝon kaj ŝajnis malfruon. La maljuna juĝisto lin akompanis ĝis la pordo. En la momento, kiam li estis forironta, tiu diris al li: “Ĉu vi deziras, sinjoro Cipriani, utili al via... amiko? Konsilu al li, ke li kontentiĝu per la amnestio: tio estas la maksimumo, kiun li povas atingi, almenaŭ ĝis kiam mi vivas.”

## Ĉapitro ok

Tiun vesperon, Luka kaj pastro Serafeno eksciintaj ke Andreo estis revenanta, iris al li renkonte ekster la vilaĝon. Li alvenis, kiel la unuan fojon, per motorciklo kaj ekmarŝis kune kun ili, trenante la veturilon ĉe sia flanko, ĝis la centro. Eĉ post la forpreno de la grandaj nigraj okulvitroj, Andreo estis preskaŭ nerekonobla pro la multa nigra polvo teginta lian vizaĝon.

“Ni promenu iomete”, li proponis. “Mi bezonas malrigidigi miajn krurojn.”

La loĝantaro de Cisterna ankoraŭ ne alkutimiĝis vidi ilin kune. Ĉiun fojon, kiam tio okazis, ŝajnis miriga afero. La plej bonvolaj rigardis al ili kvazaŭ ili falis de alia planedo. Kiam ili pasis tra la stratoj, ĉe ĉiu angulo ariĝis scivolemuloj, la plej timemaj ilin gvatis de malantaŭ la persienoj kaj la patrinoj vokis laŭte siajn filojn, ke ili rapidu hejmen. Por ilin indiki, oni simple diris “la amikoj”.

La rezerviĝemo de pastro Serafeno, (rezerviĝema konduto en publikaj lokoj, ja nenio pli), ja suferigis lin ne malmulte, kvankam li klopodis tion kaŝi.

“Ni iru ĉirkaŭ la legom-ĝardenojn malsupre de la vilaĝo”, li proponis tiun vesperon al siaj amikoj. “Ĉu bone? Ni ne trairu denove la centran straton.”

“Vi hontas pro ni”, lin riproĉis Andreo. Ĉu oni rajtas scii, pro kio?”

“Ne rekomencu”, diris al li la maljuna pastro.

“Diru al mi prefere, ĉu mi divenis”, insistis Andreo.

“Nu, jes”, li respondis. “Se vi rigardus vin en spegulo, vi ja rekonus ke estas ĝusta motivo.”

“Pax vobiscum”, diris Luka ridante.

Eble nur pro la aspekto, Luka ŝajnis la malpli stranga en tiu grupo. De post lia reveno, li reordigis sin, ripozis kaj nun aspektis kiel emerita oficisto, eĉ se kun mizera pensio, kaj elradiis bonecon kaj pacamon. Neniu el liaj samaĝuloj bonvenigis la senkulpulon liberigitan de tutviva karcero. Ĉu senkulpa? Ĉe tiu vorto la maljunuloj kuspis la nazon. Senkulpa je kio? Je murdo? Eble, sed la cetero...

“Vidu”, diris Luka al Andreo post iom da tempo, “ĉi tie staris altega poplo. Vi ne povas memori ĝin, mi parolas pri antaŭ kvindeko da jaroj. Ĝia ombro montris la horojn, kiam estis bona vetero.”

Per malrapida movo de la okuloj, de la grundo ĝis la imagitan supron, li rekreis dum momento la arbo-konturon.

“Ĝi estis nia urbodoma horloĝo”, konfirmis la pastro. “Ĉu vi memoras la ornamiston?”, li demandis al Luka. “Mi celas tiun, kiu venkis la interdiocezan konkuron. Kiu estis lia nomo?”

“Totonno”, diris Luka. “Kia gaja viro, li estis.”

“Vi estis amikoj”, daŭrigis la pastro. “Dum la festotagaj vesperoj li lumigis la poplon kiel altaron.”

“Kaj vidu, tie kie nun staras la apoteko”, aldonis Luka por Andreo. “Tie estis nekultivitaj kampoj. Dum la posttagmezoj dimanĉaj mi iris tien kun via patro por ludi je ĵetgloboj.”

Grupo da junuloj malsamaĝaj, sed ĉiuj same brunaj kaj mornaj, vestitaj bluze staris ĉirkaŭ benzinejo, parolante per raŭka voĉo pri la itala bicikla rondveturo. Al unu el tiuj Andreo konfidis sian motorciklon.

Ne malproksime, kiel ĉiuvespere, ariĝis eta grupo da virinoj ĉirkaŭ la fontano, kun kupraj kruĉegoj por ĉerpi akvon. Kiam kruĉego pleniĝis, unu helpis la alian por levi ĝin sur la kapon, sur kiu kronis ringoforma remburaĵo. Sub la pezo de la plena kruĉego, eĉ la nejunaj levis la mentonon kaj marŝis rektaj por ke ne elfluu akvo.

La alproksimiĝo de la triopo ŝajne surprizis la virinojn. La kutima babilado subite ĉesis, kaj post iom aŭdiĝis tre klare voĉo diranta: “Tiajn homojn Dio unue kreas, kaj poste kunigas”, sekvita de ridado.

Pro la fakto ke, precize samtempe, Andreo lasis la grupon kaj direktiĝis rapidpaŝe al la fontano, la virinoj ektimantaj ke li volis disputi pro ilia mokado, tuj diskuris kun krietadoj kaj interfrapiĝoj de kruĉegoj. La celo de Andreo estis male refreŝigi la vizaĝon kaj la manojn, kaj tion li faris tute trankvile.

“Ni iru tiun vojon”, proponis denove la pastro. Li volis almenaŭ eviti pasadon antaŭ la urbodomo.

“Sed tie oni pasas sub la balkono de la blindulino”, rimarkis Luka.

“Kion pretendas de vi tiu malfeliĉa oldulino, ĉu oni rajtas scii?”, demandis al li Andreo. “Ĉiun fojon, kiam vi pasas sub ŝia domo, ŝi histeriumas.”

“Ŝi estas mia kuzino”, Luka diris embarasite.

La tri amikoj turnis post la paroĥa preĝejo dum el la sakristio estis elirantaj la infanoj de la unua katekismo-klaso. Kelkaj el ili ĉirkaŭis pastron Serafenon por kisi lian manon. Luka rigardis al ili bonkore.

“Inter ili devus esti ankaŭ la niaj”, murmuris Luka al Andreo.

Andreon tuŝis tiu frazo pli, ol la alia povus imagi; li tamen respondis:

“Ĉu ni ne havas Toni?”

“Mi raportos tion al li”, diris Luka ridetante. “Tio lin feliĉigos.”

Iu, tute neatendite, vokis Luka pernome. Temis pri koksolama maljunulo, kiu apogiĝis al la sakristi-muro; li estis malpura kaj ĉifone vestita kiel almozulo, kun mieno humila kaj malvirta.

“Ĉu vi ne rekonas min?”, li demandis al Luka.

“Ne”, respondis tiu observante la alian. “Pardonu, sed mi ne memoras vin.”

“Antaŭ multaj jaroj ni soldat-servis kune, en Ankona. Ĉu vi ne memoras?”

“La Kaporalo? Je l’diablo, vi aspektas sufiĉe aĉe.”

“Ĉu mi povus paroli al vi?” demandis la Kaporalo.

“Bonvolu antaŭeniri”, diris Luka al siaj amikoj. “Mi vin baldaŭ atingos.”

La du daŭrigis sian vojon malrapide ĝis la lerneja placeto, kie pastro Serafeno proponis:

“Ni sidu ĉi tie, male li ne trovos nin. Min plezurigas, ke iu ree alparolas Lukan.”

Meze de la placeto sterniĝis mizera polvoplena ĝardeneto, kie staris kelkaj senvivecaj arbetoj, benko el eluzita ligno kaj antikva, grandega pisbudo aĉe ornamita per fidesegnaĵoj.

“Ĉu vi volas halti ĉi tie?”, diris Andreo per naŭzita grimaco. “Tial ke ni nun havas tempon, sekvu min.”

Ne atendante respondon li ekiris laŭ kruta strateto kondukanta ĝis la kamparo, kaj la pastro do estis devigata lin sekvi. La strateto flankis staloj, porkejoj kaj lignaj dometaĉoj lado-kovritaj. Ĉe la sojloj sidis malriĉuloj manĝantaj supon kaj refreŝigaĵojn.

“Kien vi diable kondukas min?”, demandis la pastro al Andreo, kiu lin antaŭis per paŝoj ĉiam pli rapidaj. Sed li ne ricevis respondon. Tuj post la lastaj domoj la strateto transformiĝis en mallarĝa pado enkaviĝinta inter altaj dorn-arbustoj.

“Kiel sukcesos Luka trovi nin?”, daŭrigis la pastro sian plendon.

“Ĝuste tion mi celas”, diris Andreo, “Por unu fojo mi volas, ke li ne trovu niajn spurojn.”

La pastro kuntiris la brovojn kaj rifuzis plu iri.

“Venu”, ordonis al li Andreo, “mi devas paroli al vi pri li. Sed ĉi fojon serioze.”

Ne tiom la senco de la parolo, kiom la voĉ-tono kiun Andreo uzis, suspektigis pastron Serafenon.

“Mia kompatinda amiko”, li diris, “temas do pri vera obsedo.”

“Tiu estas la ekzakta vorto”, konfirmis Andreo. “Temas pri obsedo. Mi volus, sed mi ne sukcesas, pensi pri alio. Do, mi bedaŭras, sed mi devas starigi kelkajn embarasigajn demandojn al vi.”

“Vi devus ĉesi, Andreo”, petegis la pastro, “estus pli bone.”

“Pli bone por kiu? Por via trankvilo?”

“Andreo, mi portas funde en mia koro kelkajn dolorajn memorojn, kiuj ankoraŭ sangas. Vi devus respekti ilin iom pli.”

“Se ili ankoraŭ sangas”, diris Andreo, “ne estas sane kovri ilin per malpuraj toloj.”

La maljuna pastro rigidiĝis, kvazaŭ batita rekte alvizaĝe.

“Kial vi diras ilin malpuraj?” li demandis. “Ĉu vi parolas pri mi?”

Andreo evitis rektan respondon.

“Kristo”, li diris, “ĉu oni rajtas scii kial tiom da personoj en Cisterna timas Lukan?”

Kial neniu kuraĝas paroli pri lia proceso?”

“Ne ŝanĝu temon”, devigis lin pastro Serafeno. “Vi unue respondu al mi: ĉu vi

pensas, ke mi iel ricevis avantaĝon de lia kondamno?”

“Jes, sincere, io pezas sur mia koro eĉ koncerne vin”, jesis Andreo. “Ni fine parolu pri tio senkaŝe. Venu, ni malproksimiĝu plue.”

La strateto kondukis meze de la kamparo, inter herbejoj kaj legom-kampoj. Ŝvebis enaere akraodoro je kapsikoj kaj falĉita fojno. La du eksidis sur herbarando de la pado.

“Antaŭ kelkaj tagoj, por sekvi miajn farendaĵojn, mi estis en l’Aquila”, ekparolis Andreo. “La urbo ne estas granda, vi konas ĝin, ĝia tuta vivo disvolviĝas tie sub kvindekmetra portiko. Kaj tie fakte mi renkontis la reĝan prokuroron. Nia parolo ekstraktis Cisternan kaj poste Sabatinin. Rimarkinte li mian grandan intereson pri tiu temo, li min prezentis al sia pli maljuna kolego, nun emerita, kiu estis la publika akuzanto en la fifama asiza proceso, kiu kondamnis Lukan.”

“Ĉu ankoraŭ vivas tiu abomeninda turmentisto?”, demandis la pastro.

“Ankaŭ li memoras vin”, diris Andreo. “Nu, pri la konduto de la loĝantaro de Cisterna, inkluzive de la paroĥestro, rilate al tiu proceso, la maljuna juĝisto rakontis al mi detalojn sufiĉe zorgigajn, se verajn.”

“Kion li povis rakonti al vi?”, protestis pastro Serafeno. “Pri tiu proceso, la sentaŭgulo, komprenis nenion, tio ĉi estas la vero. Li baraktis kiel kokido en stupo. Imagu ke, kun viro kia Luka estas, tiu klopodis solvi la aferon legante senfine kod-artikolojn kaj paĝojn pri juro. Estis spektaklo absurda, groteska.”

“Mi kredas al vi”, diris Andreo, “sed nun min interesas io alia. Se la maljuna juĝisto ne misinformis min, vi havis eblecon paroli kun Luka dum la enketado.”

“Jes, mi akompanis lian patrinon”, diris pastro Serafeno. “La kompatinda Teresa ja certe ne kapablis vojaĝi sola. Ŝi similis al Maria dum la kalvaria suprenirado.”

“Certe temis pri grava renkontiĝo, iasence eĉ finofara.”

“Kiasence?”

“Ĉu vi ne memoras pri kio vi parolis kun Luka? Mi celas ja rilate la proceson.”

“Ne, vi komprenu, pasis tiom da jaroj.”

“Mi ne kredas al vi”, diris Andreo tranĉe.

Pastro Serafeno lin alrigardis pala kaj indignita.

“Kiel vi povas aŭdaci?”, li diris. “Vi pridemandas min samkiel tiu sentaŭgulo, la juĝisto.”

“Estas tamen diferenco”, diris Andreo, kun ironia rideto. “Li pretendis juĝi vivantan homon per presita libro, mi volas juĝi neniun, nek vin, nek aliajn. Mi nur volas kompreni.”

Pastro Serafeno ekstaris kaj rigardis ĉirkaŭe, kiel por vidi ĉu iu estis alproksimiĝanta. Li estis ŝvit-trempita kaj spiris anhele; li forprenis la ĉapelon kaj viŝis la frunton per granda poŝtuko.

“Ĉi tie vi povas eĉ kriadi”, lin avertis Andreo. “Neniu aŭdos vin.”

“Andreo, ĉu vi emas ludi? Kion vi pretendas de mi?”

“La veron, nenion pli. Do respondu. Kial vi rifuzis, kiam la juĝisto tion petis, ke vi admonu, el la preĝej-pupitro, la vilaĝanojn, ke tiuj kiuj scias ion pri la kazo de



Luka, ja plenumu sian devon?”

“Andreo, ne ridindigu vin”, balbutis la pastro plue palega kaj terurigita. “Vi ja ne estas mia episkopo.”

Dirinte tion li turnis la dorson kaj ekiris al la vilaĝo sola, sed unusalte Andreo lin kaptis ĉe la ŝultro.

“Vi ne eskapos”, li diris. “Mi estas pli rapida kaj pli forta ol vi. ‘stas vere, mi ne estas via episkopo, sed mi estas amiko de Luka kaj mi pretendas scii, ĝis kiom vi estis komplico en la granda malfeliĉo de lia vivo.”

“Ĉu vi freneziĝis?”, kriis pastro Serafeno per voĉo, kiu lasis kompreni panikon. “Demandu al Luka mem”, li aldonis, “kaj vi spertos lian respondon al tia perfortado.”

“Ne”, diris Andreo, “Luka estas tro bona. Li eble jam pardonis; sed mi estas lia amiko kaj neniam pardonos, kiu faris al li tian neripareblan malbonon. Tial aŭskultu min kaj respondu sincere. Laŭ tio, kion raportis al la enketa juĝisto la persono, kiu dum via interparolo vin subaŭskultis de malantaŭ pordo, estis iu persono ĉi tie en Cisterna, kies atestado estintus finofara por la senkulpigo de Luka. Ŝajnas ke tiu persono jam estis preta atesti, eble li jam troviĝis en la tribunalo mem.”

“Kaj do, se vi tiom scias”, diris la pastro, “vi certe scias ankaŭ la ceteron. Vi ja scias, ke estis ĝuste Luka, kiu sin oponis.”

“Ha, ha, ha mi vidas kun plezuro, ke via memoro reaperis”, rimarkis Luka sarkasme. “Sed kial vi bezonis lian konsenton? Ĉu ne estis via devo lin protekti, lin savi, eĉ spite de lia volo? Savante la vivon al sinmortigonto, ĉu oni demandas pri ties opinio?”

“Ĉu vi ne povas kompreni”, diris pastro Serafeno, pene parolante pro la kreskanta anhelo, “ĉu vi ni povas kompreni, ke via rezonado akuzas kiel unuan lian patrinon? Se la bedaŭrinda Teresa respektis la volon de sia filo, ĉu vi ne pensas, ke eble ŝi komprenis la motivojn kaj, en sia konscienco, ilin prikonsentis?”

“Lia patrino estis bona kristanino”, diris Andreo. “Ŝi estis devota virino. Ĉu ne vi mem ŝin instigis al tiu nehoma rezignaciemo? Sed ĉiukaxe, vi ja scias ion pri tio.”

Timigita kaj konfuza pastro Serafeno klopodis denove fuĝi, sed Andreo lin rekaptis ĉe la brako.

“Kristo, ne devigu min bati vin”, li diris skuante la alian forte. “Mi kapablas, mi ĵuras. Mi eble jam batintus vin, malgraŭ la tonsuro, se vi ne estus blankhara. Sed mi petas: ne elstreĉu mian paciencon.”

“Vi frenezas, vi frenezas”, ripetis la maljuna pastro kun larmaj okuloj.

“Neniam okazis en mia tuta vivo, ke oni min traktis tiel.”

Andreo ne lasis kortuŝiĝi; lia mieno estis kruela, senkompata.

“Kiu estis la persono preta atesti favore al Luka?”, li insistis.

“Pri kio temis la atestado pruvanta lian senkulpecon?”

“Silentu”, diris la pastro, “jen Luka”.

“Mi petos, ke li foriru, ke li nin lasu solaj”, diris Andreo rezolute.

“Nun mi ja ne lasos vin.”

Luka alproksimiĝis longpaŝe, sekvata de mopso, kiu albojis lin kaj provis de tempo al tempo lin alsalti.

“Aŭskultu”, flustris pastro Serafeno al Andreo. Lia mentono tremis tion dirante:

“Mi venos ĉe vi ĉi vespere post la manĝo. Jes, mi tion promesas.”

“Kiel aĉe grimacas viaj vizaĝoj”, diris Luka, kiam li estis proksima. “Kio okazis al vi?”

“Kion volis de vi tiu kaporalo?”, lin demandis Andreo.

“Li bezonis etan prunton”, respondis Luka ridetante.

## Ĉapitro naŭ

Sur la monteta deklivo kelkaj kamparanoj diserigis la ŝtonozan grundon. Surface la tero estis arida kaj sterila, necesis fosi profunde por retrovi la humon. Ĝi estis nekultivita monteto, sur kiu dise kreskis malfortaj fruktaj arbetoj. Vidinte Andreon, unu el ili, junulo nudbrusta, ruĝvizaĝa, kun granda nigra har-tufo surfrunte, lasis la pioĉon tere kaj kuris al li ridetante.

“Ĉu vi partoprenos ĉi vespere la asembleon de la ter-laboristoj”, li demandis senpacience.

“Jes, certe, mi tion promesis al vi”, respondis Andreo.

“Mi vin vidas tiel malofte...”

“Vi devas min pardoni, mi havas ankoraŭ farenadaĵojn. Estus malfacile klarigi al vi.”

“Ni ŝatus, ke vi prezentu la problemaron”, aldonis la junulo venkinte timemon.

“Kiun problemaron?”

“La emancipan problemaron. Ni ŝatus vin aŭdi en la debato.”

“Mi ĉeestos, mi promesas, tuj kiam mi povos”, diris Andreo premante lian manon.

La juna kamparano reiris al sia laboro.

“Kia strangulo”, diris unu el la kamparanoj rigardante Andreon forirantan.

“Li havis la situacion enmane ĉi tie kaj li estas ĝin perdanta pro siaj strangaĵoj”, diris alia.

“Se li ne rekomendos personojn, li ja ne ricevos voĉdonojn en la balotoj”, aldonis la unua.

“Li ne kandidatiĝos”, deklaris la junulo. “Li ne serĉadas voĉdonojn.”

“Kion do li volas?”, pluraj lin demandis.

“Emancipiĝon. Emancipiĝon de la laboro.”

“Pri kio temas? Ĉu la fervojo? De temp’ al tempo oni priparolas pri ĝi. Antaŭ ĉiu balotado oni reparolas pri fervojo.”

“Kion vi parolaĉas?” protestis la junulo. “Li ja klarigos al vi ĉion.”

Andreo preterpasis la herban plataĵon antaŭ la kampara kapelo de Sankta Silvestro, ĉiujara loko de la printempaj rogacioj, kaj li haltis momenton sur lignan ponteton, kiu traarkis malgrandegan akvofluan. Tiun oni nomis la Ponteto de la Leporo. Andreo memoris ke li, kiel knabo, partoprenis tiun rogacion, kiu fariĝis memorinda, ĉar leporo, ekzakte sur la ponteto, subite aperis antaŭ la devotuloj procesiantaj. Tuj-tuje la devotuloj apogis teren la kandelegojn kaj la krucifikson kaj ekĉasis la malbonŝancan besteton; sed kvankam ili ĝin ĉirkaŭis ĉiuflanke, tiu sukcesis eskapi, kvazaŭ dissolviĝinta en aero. Laŭ pastro Serafeno temis sendube pri diablo-apero. Tiam do fariĝis sensacio, ke la diablo montris tian preferon por tiu loko. Tie fakte ankaŭ komenciĝis la malfeliĉo de Luka, kiun, kelkajn jarojn pli frue, tie oni arestis je l’ tagiĝo post la nokto, kiam komercisto estis murdita en sia kaleŝo sur la nacia strato, je ĉirkaŭ du kilometroj de tiu loko. Apud la ponteto estis kluzo kiu, dum la laborado de la muelilo dividis la akvojn. Andreo laŭiris la padon sur la digo de la antikva kanalo, nun invadita de misherboj, kaj post nelonge li atingis la muelilon. Tiu estis konstruaĵo vasta kaj malalta, nur unuetaĝa kun draŝejo antaŭe, kie iam atendis la ĉaroj kaj la bestoj portintaj grenon kaj forportontaj farunon. La draŝejo ĉirkaŭis altaj poploj, trans ili fluis la rivereto. Je unu el la poploj estis ligita azeno; apude, kapro paŝtiĝis. La maljuna Ludoviko sidis ĉe la sojlo, apoginte la dorson al la pordofosto, malvigla kaj senmova. Agnese, la edzino, aperis kaj malaperis tra la pordokadro, kaptita de konsterno kaj kolero.

“Kion vi serĉas?” alkriis Agnese la vizitanton per voĉo furioza, antaŭ ol tiu ekparolis.

“Ĉu pastro Serafeno ne avertis vin?”, respondis Andreo. “Li certe klarigis al vi la kialon de mia vizito.”

“Se ni bezonas pastron, ni iras preĝejen”, respondis la maljunulino kaj ree eniris la domon. “Ĉi tie ni estas en nia domo”, ŝi kriis el interne.

“Mi venis por paroli kun vi”, diris Andreo al Ludoviko. “Jes, precize kun vi.”

La maljunulo direktis al li timantan rigardon, kvazaŭ li estus terure minacita.

“Mi havas nenion por diri al vi”, li murmuris. “Mi scias nenon, foriru.”

“Se necese, mi revigligos vian memoron”, al li diris Andreo per voĉo tute ne trankviliga. “Mi venis ĉi tien por paroli pri tio, kion vi scias kaj mi foriros nur kiam vi estos ĉion finrakontinta.”

“Mi scias nenion”, ripetis la majunulo per tremanta voĉo. “Nenion”.

Andreo alproksimiĝis kaj provis lin konvinki per malagresaj vortoj.

“Aŭskutlu”, li diris. “Niaj familioj ĉiam havis bonajn rilatojn. Kial ni devus disputi?” Ŝajnis ke li alparolis ŝtonon. Ludoviko eĉ ne plu priatentis lin.

“Ĉu vi min aŭskultas?”, lin alkriis Andreo. “Ĉu vi aŭskultas?”

En la pordokrado reaperis la maljuna Agnese.

“Ĉu vi ankoraŭ estas ĉi tie?”, ŝi kriĉis montrante la dentojn pro kolerego. “Kion vi serĉadas? Ĉu ni ne plu estas mastroj en nia domo?”

“Olda sorĉistino, bonvolu silenti”, tiam diris Andreo energie.

“Ĉu vi ne emas paroli? Kiom vi stultaĉas. Se vi ne ĉesos silenti, vi devigos min ŝanĝi la programon de mia vizito ĉi tie kaj mi pridemandos vin pri certaj kalkuloj. Por vi ja ne estus tre agrable.”

Tiuj vortoj, eble neatenditaj, eble timataj, ne malmulte efikis.

La maljunulo levis malrapide la grandan kapon kaj lin rigardis per doune fermitaj okuloj, kiel gufo ĝenata de lumo.”

“Mi ne komprenas.” li diris.

“Eĉ tion mi aŭdas”, al li respondis Andreo. “Via azeno jam scius pri kio temas.”

“Neniu ŝatas esti ĝenata en sia propra domo”, diris Agnese plorĝeme.

“Propra domo?”, ripetis Andreo per akra moko. “Vi do pensas ke la paperoj de certa hipoteko malaperis? Nur pro tio ke dum ĉi lastaj jaroj de mia forrestado, mi ne petis pagadon de la interezoj, vi iluziĝis, ke la paperoj perdiĝis aŭ forbruliĝis? Sed, mi tion ripetis, ne pro tio mi venis ĉi tie.”

Eble por lasi al ili la tempon mediti, Andreo malproksimiĝis kaj rondiris ĉirkaŭ la muelejo; sed tio ja povis aspekti keil unua kontrolo de propraĵo, fare de kreditoro. Li ilin aŭdis interparoli flustre, kiel dum disputado. Sur la deklivo de la akvofalejo, ĉe la alia flanko de la muelilo, kuŝis grandega nuksarbo, ĵus dehakita kaj ankoraŭ iel agonianta, la trunko sendifekta, sed la ega branĉaro mismetita, la radikoj stumpaj, kvazaŭ ellasantaj sangon de la distaŭzigitaj enkavoj de hakilbatoj. El la branĉimplikaĵo, je la alproksimiĝo de Andreo, leviĝis aro da paseroj. La ĉielo palis monotona kaj indiferenta. Malrapide li reiris al la placeto, kie li trovis la du maljunulojn pli afliktitaj, ol kiam li lasis ilin.

“Mi avertigis vin pri mia vizito de pastro Serafeno”, li rekomencis per trankvia tono, laŭvole por ne timigi ilin pli multe. “Damne, mi ja ne volas fari ion ajn mabonan al vi.”

“Niaj familioj ĉiam kunvivis pace”, diris la majunulo. “Kaj miaflanke...”

“Sed malriĉuloj timas pro ĉio”, plendis la maljunulino. “Hundo, kiu kutime ricevas baston-batojn, timas eĉ bakistan pan-ŝovilon aŭ pastran aspergilon.”

Agnese plorĝemis, vokis al la Madono, “Madono de Loreto, Madono de Pratolo, helpu min”, ŝi diris sekigante la okulojn per la antaŭtuko. Subite ŝi ekmemoris aferon urĝan kaj reeniris rapide en la domon por serĉi seĝon por Andreo.

“Pardonu”, ŝi diris. “Ĉu vi ŝatus glason da vino? Kiam mi preĝas por niaj bedaŭrataj mortintoj”, ŝi aldonis, “mi neniam forgesas vian patron kaj vian patrinon.”

Ludoviko rigardis tien kaj tien, altere, kiel timigita besto, per sangoplenaj okuloj kun ruĝiĝintaj palpebroj.

“Ĉu vi vidas kiel ni iĝis mizeraj?”, li diris. “La tutan vivon mi laboris tagon kaj nokton, de kiam mi estis dekdu jara. Ĉu vi vidas nun kiel ni iĝis mizeraj?”

Andreo eksidis proksime al Ludoviko.

“Mi havis muelilon kaj ĝi cesis funkcii”, rekomencis Ludoviko la plendon. “Mi havis kvinonon de la arbaro kaj ĝi forcindriĝis. Mi havis...”

“Mi esperas ke pri tio vi ne kulpigos Lukan”, diris Andreo.

“Kion vi scias pri tio?”

“Ek do, estu prudenta, vi bone scias ke Luka sidis en malliberejo.”

“Sed lia peko restis ĉi tie.”

“Kiu peko?”

“Kvazaŭ pesto, kvazaŭ kancero, ĝi estis ĉi tie en la aero, en la tero. Ĝi estis nia pereco.”

“Aŭskultu”, diris Andreo. “Mi ne volas perdigi vian tempon. Ni parolu rekte pri la proceso de Luka. Kion vi scias?”

“Ĉu denove?”, kriis Agnese. “Ĉu oni malfermis ree la proceson? Damne, Ĉu tio ĉi do neniam havos finon?”

“Kiam oni ekparolas pri tiu damna historio”, grumblis Ludoviko, “la homoj ekrigardas min strange. Ĉu do ĉio rekomenciĝos?”

“Neniu pensas rekomenci la proceson”, klarigis Andreo. “Luka estis amnestiita kaj tio sufiĉas al li. Li ne taksas grava rehabiliton. Vi ja devus scii, kia li estas. Sed mi, kvankam lia amiko, estas tute malsama. Mi bezonas kompreni. Nu, tiun kompatindulon mi ankoraŭ ne komprenis.”

Agnese rigardis fikse sian edzon kaj tremis por li, dum Ludoviko rigardis altere, silnete, kvazaŭ en stato de profunda stulteco.

“Ĉu vi min aŭdis?”, lin demandis Andreo.

La maljunulo fine levis la okulojn al li.

“Kion vi volus kompreni?”, li demandis. “Tiun malbenitan proceson? Sed neniu ĝin sukcesis kompreni.”

“Ĉu vi sciis, ke Luka estis senkulpa?”, demandis Andreo.

“Senkulpa estis nur unu, Jesuo Kristo”, respondis Ludoviko.

“Ne sofistumu”, insistis Andreo. “Mi celas, ĉu vi sciis ke Luka ne kulpis la murdon, pro kiu oni lin kondamnis?”

“Ke li ne kulpis tion”, diris Ludoviko, “ĉiuj sciis. Preskaŭ.”

“Kion, ĉiuj?” protestis Andreo. “Ĉu ankaŭ la ĵurianoj?”

“Mi pensas ke jes.”

“Ĉu ankaŭ la juĝistoj?”

“Certe, ja tiuj ne stultas.”

“Kaj kial, laŭ vi, oni lin kondamnis?”

“Iun oni ja devis kondamni. Homo estis murdita. Luka estis la enketito.”

“Kial oni kondamnis Lukan kaj ne alian personon, ne mia patron, ne vin?”

“Ni ne estis enketitoj, ni zorgis pri niaj aferoj, kaj restis en niaj domoj.”

“Ĉu Luka ne?”

“Ŝajnas ke ne. Se li estus restinta en sia domo, oni tion ne povus imputi al li.”

“Kiusence li ne prizorgis siajn aferojn?”

“Tion li scias certe pli bone ol mi. Tial ke vi estas amikoj kaj ĉiam estas kune, vi

devus demandition al li.”

“Ĉiukaze, kiel vi klarigas, ke malgraŭ senkulpeco, oni lin kondamnis al tutviva mallibero?”

“Li perdis la proceson. Tio ĉiam okazas al enketitoj, kiuj perdas proceson. Vi estas instruisto, tion vi devus scii pli bone ol mi.”

“Ludoviku, sekvu la sulkon.”

La maljunulo ŝvitis kaj ĝemis; balbutis en dialekto apenaŭ komprenebla. Agnese lin rigardis kompateme, suferante por si kaj por li.

“Ludoviko, respondu al mi trafe”, insistis Andreo kliniĝante super li. “Ĉu povus esti, ke Luka perdis la proceson ĉar iu, kiu estus povinta atesti favore al li, ne faris tion?”

Ludoviko fermis la okulojn kaj ne respondis.

“Ĉu vi fartas malbone?”, lin demandis Agnese.

“Li fartas bonege”, certigis al ŝi Andreo. Poste li turniĝis denove al Ludoviko: “Ĉu vi komprenis mian demandon?”

“Mi komprenis.” respondis Ludoviko levante timantajn okulojn, kiel batita hundo.

“Mi komprenis, sed Kristo-Sango, al kio tio ĉi utilas? Kial remalfermi la vundon?”

“Ne pensu pri tio”, diris Andreo. “Do, ĉu veras ke vi estis unu el tiuj, kiuj havis la pruvojn de lia senkulpeco?”

“Senkulpa estas nur Jesuo Kristo.” diris Ludoviko.

“Mi ne 'stas parolanta pri l' praa peko”, diris Andreo lime de sia pacienco. “Mi celas la murdon, pro kiu Luka esits false kulpigita. Vi sciis lin senkulpa.”

Ludoviko jesis per apenaŭa kap-movo.

“Ĉu vi sciis, ke je la krimohoro, tiun saman nokton, li troviĝis aliloke?”

La maljunulo ripetis la malrapidan jesgeston. “Ĝi estis nokto de l' diablo”, li murmuris.

“Diru, kion vi scias”, lin petegis la edzino. “Se vi silentos oni povos pensi ke ni, kompatinduloj, iel kunkulpis.”

“Mi vidis Lukan tiun nokton”, diris Ludoviko preskaŭ senvoĉe. “Nenion plu. Kaj pri la cetero mi scias nenion, mi ĵuras je Dio.”

“Diru plu”, lin incitis la edzino. “Rakontu kiel okazis, ke vi lin vidis. Se vi silentas oni povus vin suspekti.”

“Komencu vi”, diris Ludoviko kolere al la edzino. “Ĉu ne vi mem vekis min?”

Andreo turniĝis al Agnese.

“Kuraĝon”, li diris.

La maljunulino krucosignis sin.

“Jes, tion prikulpis mi”, ŝi ekrakontis. “Ankoraŭ nun mi ne scias ĉu pro inspiro de la Madono aŭ de la diablo. Estas malfacile ion kompreni pri tiu nokto terura.

Estis nokto vendreda.”

“Tio ne gravas, daŭrigu.”

“Ĵaŭde vespere Ludoviko kaj mi enlitiĝis pli frue ol kutime. Tiun tagon ni buĉis la porkon kaj okupiĝis ĝis malfrue pri peklado de lardo kaj ŝinkoj. Tial ke mi estis

lacega, mi endormiĝis tujtuje; ĉiukaze mi, eĉ kiam mi ne estis tiom laca, dormadis tre profunde kaj eĉ ne kanon-pafoj povus min vekti. La muelistoj, estas sciate, havas malbonan orelon. Tiun nokton tamen mi vekigis subite kaj, en plena nokto, vekis mian edzon. Mi sonĝis ion timigan, pli bone, ne temis pri sonĝo, sed pri vizio. Mi vidis Lukan sin ĵetiĝi en la kanalon, barakti senespere en akvo, krii, peti de mi helpon. Aliajn fojojn, aliaj personoj...”

“Unu fojon”. Korektis la edzo.

“Vi forgesas la pulviston”, klarigis Agnese. “La antaŭan jaron ĵetiĝis en akvon la pulvisto.”

“Unu fojon”, insisits Ludoviko. “Vi forgesas la ŝafist-edzinon”, diris Agnese. “Tio okazis dekon da jaroj pli frue, la jaron de nia geedziĝo.”

“Tio ne gravas”, diris Andreo. “Daŭrigu, la aliaj kazoj ne interesas min.”

“Mi vekis mian edzon kaj rakontis al li la sonĝon”, rekomencis paroli Agnese. “Mi tiom timis kaj konfuziĝis, ke tiu ne ŝajnis nura sonĝo. Kaj fakte ne temis pri sonĝo. Madono mia, mi kriis, Madono mia.”

“Ŝi vere deliris”, konfirmis Ludoviko. “Mi vidis ŝin aliajn fojojn en ekzaltita stato, sed neniam tiom forte. Ŝi preskaŭ konvulsiis. Mi komprenis, ke estis nur unu vojo por kvietigi ŝin, mi devis leviĝi kaj kontroli. Vera malagrablaĵo. Tiam estis plena vintro kaj tramontano fajfigis la tutan muelilon, kavazaŭ ĝi plenus je serpentoj. Mi prenis la dikan surtuton, bastonon ferpintan kaj eklumigis lanternon.”

“Kiam mi vidis lin eliri, nur tiam la maltrankvilo iom malpliigis”, daŭrigis Agnese.

“Mi ellitiĝis, volvis min en plumkovrilo kaj staris malantaŭ la fenestraj vitroj por sekvi liajn paŝojn. La ĉielo nigris kiel peĉo, sed surtere estis iom da neĝo, kiu helis ete.”

“Kompreni?”, interrompis Ludoviko turniĝinte al Andreo. “Vi pretendas kompreni? Neniu komprenis, kio okazis dum tiu malbenita nokto.”

“Antaŭen, mi petas” diris Andreo. “Kion do vi vidis?”

“Momenton” diris la majunulo. “Kion mi diris? Ha, jen, do, mi kunprenis bastonon kaj lanternon kaj malsupreniris. Tuj kiam mi estis ekstere, la malvarmo preskaŭ senspirigis min. De la sonorilturo preĝeja, portita de la vento, alvenis ĝis mi la horo. Estis la tria, horo por lupoj. Mi komencis de la akvofaleto ĉi malantaŭe, ekiris la padon laŭ la kanalo kaj iris malrapide al la kluzo. La akvosupro glaciigis, se iu falintus en ĝi, ja lasus spuron. Mi klopodis serĉi en la kanalo tenante la lanternon alta kaj atentis la plej etan bruon. Ankaŭ la neĝ-tavolo kovranta la padon glaciigis kaj mi ja devis atenti por ne enfali. Post iom, kiam mi ne sciis ĉu pluri aŭ ne, mi vidis ombron flanke de poplo. Kion faris homo tiuhore tie? Mi turniĝis al la domo kaj vidis la fenestron unuetaĝan lumanta, kaj la konturon de mia edzino malantaŭ la vitroj. Kuraĝigita mi alfrontis tiun ombron. Temis pri viro mezstatura envolvita en surtuto kiel la mia, la dorso apogita al la poplo kaj la rigardo fiksa en la kanalon. “He, kiu vi estas?” mi alkriis lin. “Kion vi faras ĉi tie?”. Li turnis malrapide la kapon al mi senresponde. Mi

alproksimiĝis plue kaj rekonis Lukan. Li impresis kvazaŭ li sin apogis al arbo por ne fali teren, se diri la veron” daŭrigis la majunulo, “granda amikeco inter ni du, neniam estis. Dum la lastaj tempoj ni eĉ ne salutis unu la alian. Sed lia ĉeesto tie, je tiu nokta horo, ĉefe post la sonĝo de Agnese, ne povis ne tuŝi min. 'Luka', mi diris al li, 'kial vi staras tie? Ĉu vi fartas malbone?' Ĉu vi ne volas iri hejmen? Ĉu vi volas veni ĉe mi por trinki ion varman?' Li ne respondis al mi. Nur post iom li demandis min: 'Kioma horo estas?'. 'Antaŭ nelonge sonoris la tria', mi respondis. 'Luka, ĉu vi komprenas?' mi diris al li. 'Estas la tria, esta tempo por dormi'. Li poste diris: 'Pardonu, la tria tage aŭ nokte?'. Tiom lia menso mallumis. Lia voĉo feblis, sed ne pro ebrio aŭ io tia. Mi klopodis insisti konvinki lin, ke li venu kun mi, sed sensukcese. 'Lasu min', li diris. Kaj nenion plie. Mi tiam pensis, ke se li intencis ĵetiĝi enakven, li jam estus povinta tion fari, kaj ke maksimume, restadante tie, li ekhavos pulmiton. Tiam, trankviliĝinte, mi reiris hejmen.”

“Certe estintus pli bone, se li devigus lin veni al la muelilo”, diris Agnese. “Sed, kiu povis tion scii? Mi sekvis la paŝojn de mia edzo de la fenestreto de nia ĉambro, kiel mi jam diris, dank'al la lanterno. Tial ke la fenestro malfermiĝas norde, la aer-trablovoj kiujn enlasis la fermokadroj, pikis kvazaŭ tranĉiloj. Tiun nokton mi eksuferis pro artrito kaj tio neniam plu ĉesis. Dum li iris, sekvante la lanterno-lumon, mi ankaŭ povis vidi la nigran ombron ĉe la poplo. Tuj kiam Ludoviko revenis, mi lin demandis: 'Kiu estas?'. 'Luka' li respondis. Do tiu estis la viro, kiu ensonĝe petis mian helpon. 'Kial vi lasis lin tie?', mi riproĉis mian edzon. 'Mi ja ne povas lin preni surŝultre' li respondis al mi.”

“Neniu povis scii, kio precize en tiu momento estis okazanta ne tre fore de tie.” grumblis Ludoviko.

“Mia edzo ree enlitiĝis”, daŭrigis Agnese, “mi male restis alnajlita al la fenestreto, kun la okuloj fiksj al tiu ombro ĉe la poplo. Mi neniel kvietiĝis. Mi ekrecitis la rozaron. La koro batis tiel forte, ke ĝi doloris. Mi sentis pliiĝantan timon neeldireblan. Mi sentis, ke io terura estis okazanta, io, kion mi ne povis kompreni. Madono mia, Madono mia, mi ripetadis al mi. Mi ne scias kiom da tempo pasis.”

“Estis nokto terure longa”, diris Ludoviko. “Mi vekigis plurajn fojojn abrupte, estis ĉiam mallume.”

“Neniam nokto daŭris tiel longe”, pludiris Agnese. “Ĝi ne plu volis tagiĝi. Fine mi vidis la ombron disiĝi de la arbo. Tuj mi vekis mian edzon. La aero iom heliĝis, certe estis tuj antaŭ la tagiĝo. Kune ni vidis Lukan ekiri al la kluzo, direkte al la vilaĝo. “Nu bone”, mi diris al mia edzo. “Li rezignis sinmortigi, la madono lin helpis.”

“Kioma horo estis tiam?” demandis Andreo.

“Mallonge antaŭ la kvina” diris Ludoviko.

“Ne estis tiom hele”, korektis Agnese.

“Estis vintro”, insistis Ludoviko ĝenite. “Tial tagiĝo malfruis. Ni ĵus estis enlitiĝintaj, kiam la tramontano portis al ni la sonoradon de la preĝejo. Sonoris



kvin batoj. Ili daŭre sonoradas en miaj oreloj. Por Luka ne plu tagiĝis, sed ankaŭ por ni ĉiuj komenciĝis vespero... Ĉu vi vidas kiel transformis nin tiu malbeno?"

"Ĉu Luka estis arestita?" demandis Andreo.

"Tuj", diris Ludoviko. "Ĉe la Ponteto de la Leporo"

"La karabinerojn" rakontis Agnese, "oni avertis ke unu aŭ du horojn pli frue, homo estis murdita kaj priŝtelita sur la strato al Avezzano. Tuj elirintaj por patrolado, ili renkontis Teresan, la patrino de Luka. 'Mia filo ĉi nokte ne revenis hejmen' diris la virino al la karabineroj. 'Ĉu eble vi lin arestis pro ebriĝo?'. Post kelkaj minutoj oni vidis Lukan, kiu revenis al la vilaĝo. Li estis malpura, frostiĝinta kaj konfuzita, kiel persono kiu pasigis vintran nokton ekstere. 'El kie vi venas?' ili lin demandis ĉeeste de lia patrino. 'Temas pri afero, kiu ne koncernas vin' li respondis. Tiun saman frazon li ripetadis ĝis la kondamno."

"Kial Luka ne rivelis kie li pasigis la nokton?", demandis Andreo. "Temus ja pri respondo stranga, sed ne hontinda. Kial li ne menciis vin kiel atestanton?"

"Nu, tion vi povus demandi al li", respondis Ludoviko ĝenite. "Vi ĉiam kunas."

"Sed vi" insistis Andreo. "Kial vi ne tuj diris, kion vi sciis favore al li? Via nura atestado estus sufiĉa por lin savi."

"Luka kontraŭis tion", saltis Agnese. "Tio estas la vero."

"Kial?" ripetis Andreo.

"Mi ne scias", respondis Ludoviko.

"Ĉu vi taksas lin freneza?"

"Ne."

"Ja do devas ekzisti kialo. Kion vi pensas pri tio?"

"Mi rakontis al vi tion, kio koncernas min", respondis la majunulo. "La cetero ne interesas min. Vi ne povas peti de azeno la laboron de bovo."

"Ĉu vi volas scii ĉion?" intermetis abrupte Agnese. "Ĉu vi volas, ke mi vere diru ĉion? Post iom da tempo, neniu pri tiu afero, honor-vorton, neniu sukcesis reordigi la ideojn. Ĝi fariĝis plej evidente privata afero inter Dio kaj la diablo."

"Kiel kutime", flustris Ludoviko, "supervenkis la diablo."

"Lasu tion", diris Andreo ĝenite. "Min tio ne interesas. Mi ankoraŭ devas starigi kelkajn precizajn demandojn al vi."

"Ĉu plue?" diris Ludoviko per senespera voĉo.

"Kial vi ne prezentiĝis al la proceso?"

"Respondu", lin kuraĝigis la edzino. "Se vi ne respondos, li povos suspekti, ke estas kulpo via."

"Kiam estis alvoko de la enketanta juĝisto", diris Ludoviko, "kune kun Teresa, la patrino de Luka, kaj kun pastro Serafino, kiu tiam estis ankoraŭ la paroĥestro, ankaŭ mi iris al L'Aquila. Ili lasis min en gastejo. 'Restu ĉi tie', diris al mi la paroĥestro. 'Parolu al neniu. Se oni demandas al vi, kion vi venis fari, rakontu iun ajn mensogon'. Mi manĝis kaj dormis en tiu gastejo. Mi ne eliris eĉ nur por spiri liberan aeron. Ili ne revenis ĝis la posta tago. La patrino, kompatinda, estis kiel preskaŭ agonianta. 'Estas nenio farebla' ŝi diris al mi. 'Vi povas foriri, vi

povas reiri hejmen', diris al mi la paroĥestro. 'Rakontu al neniuj, ke vi estis ĉi tie'. Tiel mi perdis eĉ la vojaĝ-elspezojn."

"La afero ne plu dependis de homoj", diris Agnese. "Ĉu vi komprenas? Ĝi ne plu dependis de la juĝistoj, nek de la atestantoj, nek de la parencoj."

"Ĉu mi povas rigardi iomete tra la supraetaĝa fenestro?", demandis Andreo.

"Nur por praktike kompreni."

Agnese ekstaris kaj lin kondukis enen. Pere de kruta ŝtupareto ili grimpis ĝis la supra etaĝo.

"Ĉi tiu estas la fenestro", diris la majunulino. "Tie fore, pli mapli kie vi nun vidas tiun salikon, tiam staris la poplo, al kiu li sin apogis."

## Ĉapitro dek

Cisterna kaj Perticara estas du grandaj vilaĝoj situantaj unu dorse de la alia, sur la du flankoj de la sama monto, do tute kaŝitaj tiel de reciproka vido. Sed por iri, piede kaj senhaste, de unu ĝis la alia, sufiĉas iom malpli ol unu horo. La vesperon antaŭ la aresto Luka estis en Perticara, ĉe sia fianĉino, kune kun ŝi, ŝia malgranda familio kaj aliaj parencoj. Al tiu renkontiĝo oni dediĉis multajn paĝojn de la procesa aktaro. Ĉiujn ĉeestintojn oni pridemandis eĉ plurajn fojojn. La akuzo stabo ĉerpis abunde el tiuj atestoj la ĉefajn argumentojn por la kondamno-peto; kaj ankaŭ la plimulto de la notoj eltiritaj fare de Andreo el la aktaro, koncernis tiun vesperon.

Ekde preskaŭ du jaroj Luka estis la fianĉo de tiu knabino el Perticara, kaj la renkontiĝo tiuvespera estus devinta marki feliĉan daton ankaŭ por li. Estis pli frue konsentite, ke tiun vesperon oni decidus la nupto-tagon. Fakte okazis ekzakte la malo. Post rezonadoj tre konfuzaj, kiuj povis lasi kompreni novan prokrasto-peton fare de li, kaj kiuj en la protokoloj de la karabinjeroj akiris aspekton pli minacan, Luka finis petegante la fianĉinon, ke oni ne plu priparolu tiun temon.

"Hodiaŭ mi iros al Perticara", diris Andreo al pastro Serafeno. "Mi jam avertis mian tiean amikon."

"Forĵetita tempo", diris la pastro.

"Vi pensis same pri mia vizito al Ludoviko. Sed mi sukcesis paroligi lin."

"Temis pri vera miraklo. Sed mirakloj ne okazas ĉiutage. Kiel vi statas ĉe via kuzo?"

"Ne ŝanĝu temon. Mi kapablos malplenigi ankaŭ vian sakon, vi vidus."

"Pa, dorlotu vin per tiu konvinko."

"Mi paroligos eĉ ŝtonojn."

Andreo staris apud la fenestro de la ĉambreto de pastro Serafeno, kun manoj

enpoŝe, pala, morna.

“Andreo, sincere, vi min senrevigas”, diris la pastro. “Mi vin kredis socialisto, mi vin kredis ema al engaĝo en hodiaŭaj problemoj. Male via ĉefa intereso estas arkeologio.”

“Mi ne sciis, ke vi vin taksas muzea ekzemplero.”

“Ĉu vi scias, ke Luka eksuspektas? Tiuj viaj solecaj ekskursoj kaŝitaj al li...”

“Mi esperas ke tio ne fontis el via maldiskreta parolo. Mi rekomendas al vi, almenaŭ pri tio, lojalecon.”

“Ĉu do ne sufiĉas tio, kion vi sciis de Ludoviko? Ĉu ne sufiĉas al vi la certo pri senkulpeco de Luka?”

“Pri lia senkulpeco mi certis jam de kiam mi estis ok jara. Tio, kion mi ne komprenas estas la loĝantaro de ĉi vilaĝo.”

“Ĝi estas via vilaĝo, vi ĉi tie naskiĝis kaj kreskis.”

“Mi ne komprenas ĝin. Malantaŭ sekreto kaŝiĝas alia sekreto. Ŝirinte vualon oni trovas alian pli obskuran. Mi ne havos pacon, kredu min, ĝis mi tion funde elkomprenos.”

“Estas malmulto por kompreni. Vi forĵetas tempon.”

La alveno de Andreo per motorciklo en la malgranda placo de Peticara, antaŭ la urbodomo, tuj altiris aron da scivolemuloj. De la ĉiuspecaj vendejetoj ĉirkaŭantaj la placon alvenis aliaj personoj, kaj tiel same de la urbodomo, kies antikva fasado estis tute tegita de politikaj afiŝoj. Inter ili elstaris ĉefe unu, granda kiel littuko, kun ruĝa skribaĵo “Alvenos Stalin”.

Tuj trabatis al si vojon inter la homamaso grandstatura junulo en mekanikista kostumo, kiun Andreo konis.

“Mi jam avertis Jasmenon”, li diris ridetante. “Ŝi atendas vin.”

“Kiu ŝi estas?”

“La fratino de la bedaŭrinda Laŭreta. Pluvivas nur ŝi el la tuta familio. Venu, mi vin akompanos.”

“Ĉu Jasmeno jam konas la celon de mia vizito? Certe ne estis facile ŝin konvinki, ĉu ne?”

“Kion vi diras? Jasmeno estas kamaradino, ŝi administras nian konsum-kooperativon. Por ŝi estos honoro. Verŝajne ŝi jam konas vin.”

La strateto, kiun ili ekiris, estis mallarĝa kaj ŝtonoza, flanke staris malnovaj konstruaĵoj nigriĝintaj, en kiuj loĝejoj alternadis kun bestejoj. El la domoj flariĝis fortaodoro je ŝafoj, je ŝafa fromaĝo sekiĝanta sur bretaroj kaj je kaldronoj plenaj je bolanta selakto. La kooperativa vendejo estis preskaŭ fine de la strateto, ĉe la flanko kie la domoj apogiĝis al la monto. Ĝian fasadon oni ĵus refarbis. Ĉe la pordo staris neĵuna virino, fortika, nigre vestita krom blanka antaŭtuko kun grandaj gras-makuloj.

“Tiu ĉi estas Jasmeno”, diris al Andreo lia akompananto. “Mi vin konfidis al ŝi, kaj mi reiros al mia riparenda kamiono. Ĝis la revido poste.”

“Kamarado Cipriani”, diris Jasmeno tenante lian manon, “mi vin jam konas.”

“Ho jes, certe”, respondis Andreo ridetante, “mi bonege memoras. Dum la akceptado ĉe la urbodomo de Perticara, ĉu vi ne staris apud mi?”

“Vi havas bonan memoron. Mi estas kontenta, ke mi fine povos alparoli vin.”

“Mi neniam estus pensinta ke tiun dimanĉon la kamaradino apud mi estis...”

“... la fratino de Laŭreta? Mi ankaŭ neniel povis imagi, ke vi estas amiko de Luka. Verdire, ju pli mi pensas pri tio, des malpli mi komprenas. Mi pensas multe pri tio, sciu. Kamarado Cipriani, ĉu mi diru la veron? Mi hontas ĉar tio ĉi kontraŭas principon de la partio, sed mi ne sukcesas ne pensi pri ĝi.”

“Ni priparolos tion trankvile. Mi venis ĝuste pro tio.”

“Ĉu ankaŭ Luka estas en la partio? Ne? Ha, bone. Ne plu staru tie sursojle.

Eniru, mi petas. Ĉi tiu estas malvigla horo por la vendejo, kaj en la postbutiko mi disponas pri ĉambreto por persona uzo. Mi boligos iom da kafo, aŭ eble vi preferas glason da vino?”

“Kiun vinon vi havas?”

“Apulian, ruĝan.”

“Pli bone kafon.”

La interno de la vendejo estis tute senornama kaj malriĉa. La planko estis el tretita tero, la vandoj el ŝtonoj diversgrandaj ne kalkitaj, la plafono estis simple volbo de kanoj interplektitaj. La porvendaj varoj konsistis nur el pasto, oliva oleo, gado, ŝnuroj, sulfuro kaj sapo. Super la breto de la makaronioj pendis du oleografioj koloraj: unu reprezentis la grandan kapon de Karlo Marx kun lia rufa leoneca hararo, kaj la alia Nian Sinjoron, vestitan per longa tuniko ruĝa, dirantan la 'Prediko sur la Monto'-n. “Feliĉegaj la Justo-soifantoj”, estis skribite sube. La postbutiko estis malseka groto elfosita en roko. La gad-odoro estis ĝena, sed la freŝa duonlumo plaĉa. La malforta lumo de la strateto atingis tiun ĉambron jam febla pro la densa reto pendigita ĉe la enirejo, kiel ŝirmilo kontraŭ muŝoj. Sed tre rapide la okuloj alkutimiĝis. Fornelo metita en niĉo enkavigita en ŝton-vando, donis iel al la groto la aspekton de kuirejo. Dum Jasmeno pretigis kafon, la atento de Andreo fiksiĝis al portreto de virino pendanta de la muro. Temis pri fotografia grandigo de knabino malnov-mode vestita, kun vizaĝeto pala kaj malgrasa, du grandaj okuloj timemaj kaj vasta har-pufo sur la kap-verta. Eble pro sensperteco de la fotisto, la bildo iel impresis halucine kaj fantomece. Rubando el nigra vualo ĉe la kadr-angulo forigis de Andreo ĉiun dubon.

“Ĉu Laŭreta?” li demandis.

Jasmeno kapjesis. Ŝiaj okuloj tuj pleniĝis je larmoj.

“Ŝi estis lilio”, ŝi diris. “Kiel klarigi? Laŭreta neniam iris for de ĉi tiu monto, kie ŝi naskiĝis. La vortoj trajno, ŝipo, haveno, stacidomo, kinejo estis por ŝi pek-nomoj.”

“Pro kio ŝi mortis?”

“Pro malsano kiu ne troviĝas en kuracistaj libroj.”

Poste Jasmeno aldonis:

“Tri monatojn post la proceso.”

En grotangulo, surtere estis telereto kun kelkaj fromaĝ-restaĵoj. “La ĉiutaga oferdono al la muso”, klarigis la virino. “Tiel ĝi respektas la vendejan varon.”

“Vi parolas, kvazaŭ vi ĝin konus”

“Fakte, sed ĝi neniam montriĝas, kiam mi ricevas viziton.”

“Bedaŭrinde”, diris Andreo. “Mi estus demandinta ankaŭ al ĝi pri ĝia opinio.”

“Pri kiu. Ĉu pri mi?”

“Ne, pri ĉi tiu vilaĝo.”

“La muso konas nur min”, asertis Jasmeno senŝancele.

Ŝi verŝis la kafon en du tre etajn tasetojn, samgrandajn kiel fingringoj, kaj eksidis fronte al la gasto. Kompare al la brusto, vasta kaj plena, kaj al la impona griza har-amaso, briligita de oliv-oleo, ŝia vizaĝo estis malgranda kaj ŝrumpa kiel terpomo, ŝiaj trajtoj signitaj de soleca suferado, sed funde de ŝiaj okuloj videblis malgajeco kaj mildo ŝafeca.

“Vi estas same frizita”, diris Andreo kap-montrante al la bildo de la fratino.

“Eble ĝi ne taŭgas al mi”, ŝi konfesis, “sed mi faras tion memore al ŝi.”

“Ĝi taŭge kronas vin”, diris Andreo. “Ĉu vi konsentus revidi Lukan?”, li subite aldonis. “Sciu, ne temas pri invito, kiun mi portas liaflanke. Li eĉ ne scias, ke hodiaŭ mi estas ĉi tie ĉe vi, kaj certe tio ĝenus lin.”

Jasmeno sufere ektemis.

“Se revidi, mi jam lin revidis”, ŝi respondis post reakiro de la fortoj.

“Ĉu li ne estis kun vi, dimanĉe matene, proksime al la domo de pastro Serafeno?”

“Kial vi ne alproksimiĝis? Mi ne scias, kian majustaĵon faris Luka al via familio, sed vi ne povas nei, ke li tion pagis dure.”

“Se tio interesas vin, mi venis al Cisterna ĝuste por paroli al vi, kamarado Cipriani. Sed kiam mi vin vidis kune, min ekatakis timtremoj kaj revenis hejmen sen turniĝi.”

“Mi bedaŭras. Kion vi bezonis?”

“Paroli, mi ripetas. Peti konsilon, helpon.”

“Mi vin dankas. Vi ne povas imagi, kiom tio flatas min.”

“Dum kvardeko da jaroj mi vivadis kun tiu glavo trapikanta mian koron. Helpe de la tempo mi alkiutimiĝis al tio, mi tion konsideris mian sorton. Sed nun lin oni liberigis, kelkaj lin taksas senkulpa, kaj li eĉ estas via amiko. Ĉu do ni rekomencu? Jen ke la rustiĝinta glavo moviĝas denove en la koro, ĝin ŝiras ĉiuflanke, la malnova cikatriĝinta vundo denove ekŝprucas sangon abunde. Temas pri sangoperdo senĉesa, kamarado Cipriani. Mi ne kapablas diri al vi la turmenton.”

“Luka estas bona viro, mi tion certigas, Jasmeno, li ne meritas abomenon kaj des malpli, ke oni timu lin.”

“Kamarado Cipriani, mi lin ne abomenas, sed li terurigas mi. Mi havis fratinton, kiu estis kiel lilio. Li estus devinta porti ŝin orgojle antaŭ la tuta mondo. Male...”

“Ankaŭ li estis viktimo, ne forgesu tion. Li akceptis tutvivan malliberon, kvankam senkulpa.”

Ĉe tiuj vortoj la rigardo de Jasmeno fariĝis malvarma kaj dura.

“Ĉu vi serioze kredas je lia senkulpeco?” ŝi diris.

“Ankaŭ Laŭreta tion kredis kaj ŝi tion kriis antaŭ la juĝistoj dum la proceso. Tio estas en la aktoj.”

“Mia fratino lin amis, kaj obstine lin amis ĝis la lasta spiro. Sed la vero koncerne ŝin...”

“Kiu vero?”

“Nu, mi ne kapablas eldiri la kulpon de Luka koncerne ŝin.”

Lignoŝua bruo haltis ĉe la sojlo de la vendejo. Maljunulino per voĉo febla, kvazaŭ musa, vokis Jasmenon.

“Momenton”, ŝi diris laŭte. “Mi tuj venos.”

Antaŭ ol montriĝi ŝi sekigis la okulojn per la antaŭtuko por kaŝi la ploradon.

“Mi povus facile elmeti la pruvojn”, diris Andreo tuj post ŝia reveno en la postbutikon, “ke la nokto de la murdo Luka estis malproksima de la agres-loko.”

“Ĉu li tion rakontis al vi. Ĉu vi kredis al li?”

“Mi parolis kun du personoj, kiuj lin vidis tiun nokton dum longa tempo, proksime al sia domo. Li estis sola.”

“Kial ili ne atestis tion dum la proceso? Kial, se senkulpa, Luka rezignacie akceptis kondamnon?”

“Mi ne scias. Plurajn aliajn aferojn mi ne konas. Sed mi certigas, Jasmeno, ke mi ne trovos pacon, ĝis kiam mi sukcesos malkovri, kion kaŝas la personoj, kiuj ne volas paroli.”

“Ĉu vi ne povas tion demandi al Luka mem? Ĉu vi ne estas amikoj?”

“Ankaŭ li preferas silenti.”

La virina vizaĝo esprimis pliiĝantan maltrankvilecon. Tio kortuŝis Andreon.

“Jasmeno”, li diris kor-inkline, “mi rakontos al vi la originon de mia obstino pri tiu okazintaĵo. Tiel vi pli fidus je mi. Ni faru interkonsenton, ĉu? Ni kune klopodu kompreni.”

“Vi tamen pensas nur pri la vero koncerne la krimon”, diris Jasmeno. “Sed la malfeliĉo de mia fratino komenciĝis jam antaŭ tiu rabado.”

“Kiusence?”

“Mi eĉ ne scias kiel klarigi tion al vi”, diris Jasmeno. “La partio kontraŭas tion. La kamaradoj tion taksas superstiĉo.”

“Ĉu vi tion priparolis eĉ ene de la partio?”

“Jes, la kamaradoj trovas ke kelkaj pensoj miaj estas malnovaj. Ili min estimas. Ili scias, ke mi faras por ili ĉion, kion mi povas. La partio estas mia nova familio. Sed oni ne povas lukti por emancipigo de la laboro kaj samtempe kredi je sorĉistinoj.”

“Ĉu vi pensas, ke Laŭreta estis prisorĉita? Fare de kiu?”

“Mi estis certa pri tio. Sed nun... Nun mi denove ne scias. Mi komprenas nenion.

La malnova rustiĝinta glavo, kiun mi havas en la brusto de kvardek jaroj, denove suferigas min kiel la unuan tagon. La vesperiĝo min plenigas je maltrankvilo, kiun mi ne kapablas esprimi. Nokte mi suferas terurajn koŝmarojn. Se mi pensas pri la bedaŭrinda Laŭreta... Pardonu min.” Ŝi apenaŭ havis tempon por averti. La singultoj, longe retenataj, abrupte senigis ŝin je spiro, ŝi stertoris kvazaŭ mankus aero; poste tre malfacile trabatis al si vojon ĝemado, sekvita de profunda raslo kaj de larmado neordinare abunda; dume per interplektitaj manoj kaj petegantaj okuloj ŝi preĝis la gaston pardoni tiun spektaklon neindan por kamaradino. Andreo ne plu sciis kion fari, ĉu resti, ĉu foriri, aŭ kiel helpi ŝin. Dume eniris la vendejon senŝua infanino, nigre vestita, kun boteleto por aĉeti iom da oliv-oleo.

“Jasmeno”, ŝi vokis pete plurajn fojojn.

“Revenu poste”, fine Jasmeno kapablis respondi, tamen sen montriĝi.

“Bonvolu eksidi”, ŝi aldonis turniĝinte al Andreo, “ne foriru, ne lasu min sola ĝuste nun. Kion ni estis dirantaj?”

“Kiam mi loĝis ĉi tie”, diris Andreo, “la gefianĉiĝoj inter knabinoj ĉi tieaj kaj junuloj el Cisterna ne multe oftis. Se mi ne malbone memoras, knabino el Peticara eĉ estus konsiderinta tion senhonorigo.”

“Tio komenciĝis post la proceso al Luka kaj la morto de Laŭreta”, klarigis Jasmino. “Oni eĉ kreis proverbon prian: ‘Pli bona morto enputa ol en-Cisterna’, ĝi diris. Pli frue estis ekzakte la malo. La geedziĝoj inter junuloj de la du vilaĝoj estis tre oftaj. En Cisterna tiam pli multis viroj, en Peticara virinoj, kies famo ilin diris bonrasaj. Kaj certe ne mankis okazoj por renkontiĝi. Krom la vizitoj dum la someraj monatoj, okaze de religiaj festoj estis ankaŭ tradicio, ke la malriĉaj familioj el Peticara, por gajni iom pli, laboris potage en Cisterna. Tiel ili interkonatiĝis kaj naskiĝis simpatioj.”

Jasmeno ekstaris por forpreni de la tablo la tasetojn kaj la kaf-kruĉon, kiujn ŝi poste metis en pelvo troviĝanta surplanke.

“Se tio ne kostas penon”, diris Andreo, “parolu al mi plue pri tiu tempo.”

“Kiam Laŭreta kaj mi estis knabinoj”, ŝi rekomencis, “estis sinjoro en Cisterna, kiu interalie pogrande komercadis fruktojn. Mi ne scias ĉu ankaŭ vi konis lin poste, lia nomo estis sinjoro Silvio.”

“Ĉu Silvio Ascia? Jes, mi lin apenaŭ memoras.”

“Li aĉetis fruktojn de nia tuta vilaĝo, ĉefe nuksojn kaj migdalojn, kaj ilin revendis eksterlande. Kompreneble li el tio gajnis sian monon. Dum la sezono, por senŝeligi nuksojn kaj migdalojn, kaj pretigi kestojn por sendado, li donis laboron certajn jarojn eĉ al dudek knabinoj, kies plimulto aĝis de dekdu ĝis dek ses. Inter ili preskaŭ ĉiam estis kelkaj el ĉi tie. Mi aĝis dektri kaj Laŭreta dekkvin, kiam oni vokis nin la unuan fojon. Tiu sinjoro, Silvio, ne estis malbona, li eĉ iam fariĝis malavara; sed li estis riĉa kaj tial li kelkfoje havis kapricojn. Tial unu vesperon pretekste ke li volis kontroli ĉu kelkaj knabinoj forportadis migdalojn, kaŝante ilin sub la vestoj, li pretendis ke ni, ironte hejmen, pasu antaŭ li, unu post la alia,

montrante la mamojn. La plimulto de la knabinoj, kiel mi ĵus diris, estis preskaŭ infaninoj kaj rigardis tiun peton kiel ŝercon. Laŭreta male min prenis ĉemane kaj ankaŭ mianome rifuzis. Pro tio ke sinjoro Silvio insistis, ŝi diris al li: ‘Voku vian edzinon, sinjorinon Ortensia, ke ŝi nin kontrolu.’

Ĝuste tiumomente aperis ĉe la pordo Luka, kiun ni ankoraŭ ne konis. Li alvenis por ŝarĝi la jam pretajn kestojn kaj ilin porti al la stacidomo. Ĉeeste de li, sinjoro Silvio ne aŭdacis insisti, kaj elembarsiĝis respondante al Laŭreta: ‘Tre lerta. Tial ke vi estas inteligenta mi vin sendevigas’. Sed la postan fojon, kiam sinjoro Silvio same kapricis, la respondon de Laŭreta uzis ankaŭ la aliaj knabinoj. ‘Ĉu vi taksas nin ŝtelistinoj? Nu, ni pretas esti priserĉataj, sed fare de via edzino’. Ili respondis al la mastro. Li kriaĉis iomete, sed pro tio ke li ne estis trudema, li fine rezignis pri tiu fia emo. Post iom da tempo, eble por pruvi ke li ne rankoris, li invitis al unu familia festo nur Laŭretan el inter ĉiuj la junaj laboristinoj kaj rajtigis ŝin porti ankaŭ min akompane. Estis en la monato aprilo, dimanĉan posttagmezon, belegan tagon. Laŭreta surmetis novan robon ĉiel-lazuran, garnitan rozkoloro, kiu vestis ŝin belege. Nia patrino eĉ aldonis ruĝan rozon en ŝia hararo. Ŝi vere aspektis aminde. Ĉe tiu festo ni trovis multajn gajajn personojn. Oni proponis al ni unue ratafion kun biskvitoj kaj poste glaciaĵon. Dum la festo sinjoro Silvio nin prezentis al sia edzino, sinjorino Ortensia. La famo pri ekstravaganculino, kiun ŝi havis, konfirmiĝis antaŭ niaj okuloj ekde tiu unua renkontiĝo. Mi ne scias ĉu vi iam konatiĝis kun ŝi.”

“Ne, mi pensas ke ŝi mortis en hospitalo, kiam mi estis apenaŭ du aŭ tri jara.”  
“Ŝi mortis tre longe poste, en frenezulejo. Kaj ke sinjorino Ortensia estis freneza, tion oni povis kompreni eĉ tiam. Aŭskultu ĉi tion. Ŝi pretendis ke Laŭreta dancu kun Luka kaj, ĉar mia fratino pro sensperteco kaj timemo rifuzis, ŝi insistadis ĝis preskaŭ perforto. Post la danco ŝi vokis mian fratinton flanken, incitite kaj ruĝa vizaĝe, por rimarkigi al ŝi, ke dum la danco, ŝi alproksimiĝis iom tro al la kundancanto. Vi povas imagi la humiligon por mia kompatinda fratino. Ŝi tiom konsterniĝis ke post tio, dum la tuta cetero de sia vivo, ŝi ne plu volis danci. Kiam fine de la festo, ni serĉis la mastrojn por forpermesi, sinjoro Silvio diris al ni: ‘Ĉu vi eble pensas iri piede la tutan vojon ĝis Peticara?’. ‘Kiam ni venas por migdaloj’, respondis Laŭreta, ‘ni tion faras du fojojn tage’. ‘Sed hodiaŭ vi estas miaj gastoj’, respondis sinjoro Silvio, ‘kaj mi kondukigos vin tie de Luka per mia kaleŝo’. Tiel estis. En la daŭro de kvaron-horo, per kaleŝo, ni atingis nian domon. Dum la vojaĝo Luka kondukis ĝentile kaj ŝerceme, sed tre bonmore. Mi pensas ke Laŭreta eĉ ne malfermis sian buŝon, lasante min respondi al la malmultaj demandoj de li. Je nia alveno, ni trovis niajn gepatrojn sidantaj ekstere por refreŝiĝi. Nun mi ne memoras ĉu tiun unuan fojon ili invitis Lukan por trinki glason ĉe ni, aŭ ĉu tio okazis iun postan fojon. Ĉiukaze la ĝentila ago de sinjoro Silvio, kondukigi Laŭretan, ripetiĝis aliajn fojojn, ankaŭ fine de labortagoj. Kaj tial ke mia fratino neniam restus sur kaleŝo sola kun viro, okaze de mia malĉeesto, ŝin akompanis iu alia virino revenonta al Peticara. Ŝoforis ĉiam



Luka. Iom post iom naskiĝis senĝeno kaj simpatio inter ili, ankaŭ se fakte ili neniam havis okazon resti minuton solaj. La reciproka ŝat-esprimo tiutempe okazis nur pere de rigardoj. Bonmoro tiutempe malpermesis al virino paroli surstrate kun viro, kiel nuntempe okazas senprobleme. Junulo devis eniri la knabinan hejmon, kie la patrino povis zorgi, ke la du junuloj neniam restu solaj, eĉ dum momento. Sed mi devas diri, tiu severece ne ĝenis Lukan. Li estis knabo serioza, sinretenema, silentema. Eble la sola afero, kiun oni povus al li riproĉi, estis ke en nia kompanio li ne multe parolis kaj aspektis meditema, dum, laŭ rakontoj, en trinkejo aŭ kune kun amikoj, li ofte estis gaja. 'Ĉu vi eble jam pensas pri la venontaj zorgopremoj?', ŝerce lin riproĉis foje mia patro. Sed, eĉ tiu tro diskreta konduto pliigis nian simpatian rilate al li. Laŭreta kompreneble multe amis lin."

"Ĉu la gefianĉiĝo estis tuj decidita?"

"Jes kaj ne. Li kondukis kiel fianĉo, sed malvolonte prononcis tiun vorton. Ja certe ne povis paroli kiel unua ĝuste Laŭreta. Fakte la unua, kiu parolis pri tio estis sinjoro Silvio."

"Kiurole? Luka ja ne esits orfo. Kaj eĉ se tio estus, li ja ne estis muta."

"Tiel pli malpli sonis la respondo de mia patro al sinjoro Silvio, foiran tagon, kiam tiu tiris lin flanke kaj diris: 'Venis ja tempo por decidi ĉi geedziĝon'. Ŝajnas ke Luka mem, kiam mia patro tion raportis al li, afliktiĝis ne malmulte. Sed la klarigoj sekvintaj tion tamen kondukis al oficiala gefianĉiĝo. Ni tiam konis ankaŭ la patrinon de Luka, Teresan... Mi preferas ne paroli pri ŝi. Pacon al ŝia animo."

"Kial? Mi estus dankema al vi, se vi rakontus kion vi pensas."

"Se paroli plej bonkore mi povus diri, ke Teresa ne kondukis lojale al ni. Iom pli malfrue ol ŝia veno, tiun saman vesperon, alvenis virino el Cisterna por alporti donacon por la fianĉiniĝo de Laŭreta, flanke de, ŝi diris, sinjorino Ortesia. Ŝi malfermis la ujeton kaj montris al ni belegajn orajn orel-ringojn. Ni ĉiuj ja ekkonsterniĝis, Estis nenio, kiu povus motivigi donacon tiom senproporcie altvaloran flanke de sinjorino, de kiu eĉ de tempo al tempo ŝi ricevis malĝentilaĵojn. 'Certe donacoj plezurigas ĉiujn', diris mia fratino, 'ĉefe malriĉulojn, sed ili devas veni de la koro. Tial', ŝi aldonis, 'mi ne povas akcepti tion'. La virino el Cisterna kapablis tamen tiel argumenti, ke fine iĝis nebla obstina rifuzado. Se la sinjorino kelkfoje montriĝis nervoza, ŝi diris, la donaco celis fakte esprimi ŝian simpatian. Krome donaco, kiu povas aspekti senproporcia por neriĉa persono, estas ja nemulto por riĉulino. Malriĉuloj, oni ja scias, ŝi ankaŭ diris, bezonas protektantojn; kaj pliajn sukerajn vortojn tiajn, pro kiuj Laŭreta fine pardonpetis pri sia antaŭa parolo."

"Kiu estis tiu virino?"

"La edzino de la muelisto de Cisterna"

"Ĉu Agnese?"

"Jes, ĝuste ŝi. Ĉu ŝi ankoraŭ vivas? Tiam ni jam konis ŝin. Tiutempe en Perticara ankoraŭ ne estis elektran muelilon kaj ni pro tio devis veni al Cisterna."

Ni ankaŭ aŭdis de iu, ke ŝi estis parenco de sinjorino Ortensia. Certe estis, ke ŝi kaj ŝia edzo umadis en tiu domo. Pluraj aliaj personoj kunskrapis ion en ĝi, iu ĉi tiel, alia tiel. Fakte post kelkaj jaroj, kiam oni enfermis sinjorinon Ortensian en frenezulejon kaj sinjoro Silvio forveturis al Ameriko, komenciĝis por Cisterna tempo de malgrasaj bovinoj. Sed, pardonu min, ne pri tio mi intencis paroli. Kion ni estis dirantaj? Ha jes, Teresa. Nu, tiun unua vesperon, ŝi ankaŭ aspektis strange embarasita pro la donaco de sinjorino Ortensia. Ankaŭ ŝi helpis konvinki mian fratinton pri la neebleco rifuzi la donacon, sed per agumentoj, kiujn tiuvespere ni ne multe priatentis kaj kiuj, nur post iom da tempo, pensigis nin. La edzino de sinjoro Silvio estas virino kapricema, ŝi diris al ni; bona sinjorino, sed tia, kiu povus senvole fari malbonaĵojn. Estas vera bonŝanco por vi du, ŝi diris ankaŭ, ke ŝi estas kontenta pri ĉi tiu geedziĝ-promeso. 'Bonŝanco venas de mia kontenteco kaj de tiu de Luka, kun permeso de niaj gepatroj', respondis al ŝi Laŭreta. Ĉu ŝi ne estis plene prava?"

"Sed Luka, kiel li reagis? Kion li diris?"

"Li impresis sincere korinklina al Laŭreta. Se li ne amus ŝin, li estus povinta ĉiumomente repreni sian vorton. Oni ja ne diskutus tion. Ankaŭ li tamen, mi ne scias kiel klarigi, aspektis stranga."

"Kiel li klarigis la donacon de sinjorino Ortensia?"

"La donacojn."

"Ĉu poste venis pliaj? Ĉu ĉiam portitaj de la sama persono?"

"Jes, kaj ĉiam multvaloraj: unu kol-ĉeno, du ringoj, alia paro da orel-pendaĵoj. La unua impulso de Luka estis ĉiam rifuzi ilin. Poste ankŭ li cedis al la konfuzigaj argumentoj de Agnese. Pri afero li tamen montriĝis firma: 'Tenu ilin, do', li diris al Laŭreta. 'Okaze de neceso ni povos ilin vendi. Sed mi petegas vin, ke vi neniam surmetu ilin'. Kiom da fojoj, dum la sekvantaj jaroj mi devis repensi pri tiuj vortoj. Kial Luka ne klarigis al ni la danĝeron?"

"Kiun danĝeron?"

"Bedaŭrinde Luka pensis nur pri si mem. Eble li ne estis mava, sed avida kaj malparolema. La juvelojn Laŭreta enfermis en komodon. Neniu el ni iam estus aŭdacinta sin ornamati per ili. Sed kelkfoje, Laŭreta kaj mi, ilin rigardis kaŝe. Ni estis tiom malriĉaj. Ni almenaŭ volis priĝui ilin perokule. Ili strange briladis. Eĉ en mallumo ili brilis kvazaŭ ili estus vivaj. Ni jam vidis oraĵojn, sed neniam tiel lumaj. Ĉiun fojojn ni estis tuŝitaj kaj maltrankviligitaj. Dum la lastaj monatoj, bonŝance, la vizitoj de Agnese ĉesis. Ni vidis kelkfoje Teresan, sed temis pri kvietaj renkontiĝoj. Ŝajnis ke ankaŭ sinjorino Ortensia nin forgesis. Nia paco aspektis sekura."

"Sed oni ne parolis pri geedziĝo."

"Mia patro priparolis tion kun Luka du aŭ tri fojojn. La gefianĉiĝo daŭris jam de ĉirkaŭ du jaroj. Tiam tio ankoraŭ ne estis afero eksterordinara, sed ja estis motivo por priparoli. Ĉiun fojon Luka montriĝis konsentema, sed kiam temis pri fiksi daton, li hezitis. Antaŭ ol edziĝi li volis posedi, li diris, paron da bovoj kaj

ĉaron. Ankaŭ novan domon li volis, li diris, por tien porti la edzinon. La disponebla domo estis malgranda kaj malnova, li diris alian fojon.”

“Ĉu temis pri pretekstoj?”

“Mi kredas ke ne. Mia patro ilin klarigis tiel: vivante apud sinjoro Silvio li al kutimiĝis al troa bono; li ne plu adaptiĝis al malriĉula vivo. Revenis la jarparto dum kiu, ĉesintaj la kamparaj laboroj, oni reordigas la familiajn aferojn. Mia patro tiujare opiniis trafa ian stimulon, sed male li okazigis katastrofon. Pro liaj insistadoj, oni akordiĝis por renkontiĝo en nia domo, dum kiu oni devis findecidi la nuptodaton. La konkretajn aspektojn de la afero oni jam ordigis. La majunuloj jam priparolis tion inter si. Teresa promesis, ke la filo portos dote la domon, la vinberĝardenon kaj certan monsumon. La sumo egalas strange al tiu de la rabado.”

“Ĉu vi celas, ke Tereza por edzigi la filon antaŭkalkulis rabadon? Tiu estus freneza ideo.”

“Kamarado Cipriani, mi inventas nenion. La sumo egalas. Estis ja ne malmultaj la diablaj koincidoj tiukaze.”

Jasmeno siletis kaj kovris la vizaĝon per la manoj, kiel venkita de subita laceco.

“Mia Dio”, ŝi diris, “mia Dio, mi denove ekrakontas tiun vesperon? Kiom da fojoj mi ĝin rakontis dum la lastaj kvardek jaroj? Kiam da fojoj mi devos tion rakonti dum la eterno?”

“Se vi lacas”, diris Andreo, “se vi preferas ke mi revenu poste...”

Jesmeno kapgestis nee.

“Ne lasu min sola”, ŝi diris. “Mi vin petegas, ne nun. Ĉiukaze, eĉ se vi forirus, mi tion same rakontus al mi mem. Tiun vesperon Luka atingis nian domon tre malfrue, post la aliaj invititoj. Teresa pardonpetis pro ŝia melĉeesto, ŝi ne fartis bone. Dum la tago, ĝi neĝis, la vespera aero estis rigida kaj la stratoj glaciigis, Luka alvenis piede. Li aspektis tre emociiginta. Konsiderante lian malsocieteman karakteron, tio ŝajnis natura. Sed premante lian manon, mi preskaŭ ekkriis. Lia mano brulis kiel gladilo ardanta. ‘Ĉu vi malsanas?’, mi demandis al li. Li ridetis al mi kaj kapgestis nee. Ni priĝojis ke li, ĵus eksidinte, petis trinkaĵon, kion li jutime ne faris. Li eltrinkis certan nombron da vinglasoj, unu post la alia, konvulsie. Kiam, akompanite de mia patrino, eniris Laŭreta, li ekstarsi kaj respekte sin klinis, kiel oni kutimas enpreĝeje. Ni estis ekridontaj, kredante ke la intenco de Luka estis ŝercema, sed ni devis rimarki la kontraŭon. Li estis maltrankvila kaj emocioplena. Poste, vokitaj de mia patro, alvenis du muzikantoj, por ĝojigi. Unu ludis akordionon, la alia klarneton. Unue Luka rifuzis kanti, kvankam oni ja sciis ke li konis kelkajn antikvajn belajn kantojn. Fine li kantis unu, ankaŭ ĝi bela, sed tre malĝoja kaj ne taŭga al la cirkonstanco, ĝi rakontis pri soldato, kiun oni kredis mortinta kaj kiu, reveninte hejmen, trovis ke sia virino edziniĝis al alia ulo. Ekde tiu momento li eksidis ĉe la kameno kaj falis en profunda muteco. Li sidis kun la kapo klinita al la fajro, movetante braĝojn kun ferstango. Ni ja kutimis al liaj humor-ŝanĝoj, sed la gastoj ne taksis

respektema lian konduton tiom fortendiĝeman de la koversado. Tiel Laŭreta iris sidi ĉe li por paroli kaj igi lin eniri la rondon. Luka ne respondis tuj al la amikeca invito kaj ŝin rigardis longe kvazaŭ li ne estus kompreninta, kion ŝi petis de li. Subite li ekprenis ŝian manon, ĝin alproksimigis al la lipoj kaj ŝin rigardis fikse en la okuloj. Unu aŭ du fojojn li estis ekparolonta, rivelonta ion, sed li ne sukcesis. 'Mi sentas hororon pri mi mem', li diris. Ŝajnis kvazaŭ li tenus la animon per la dentoj. Fine li esploris. Li singultadis vere kiel infano. Lia vizaĝo mienis terure senespere. Laŭreta konsterniĝis. 'Mi ne volas', ŝi diris, 'ke vi estu malfeliĉa kun mi. Estas ankoraŭ tempo por retiriĝi'. Kun ĉiesa ekmiro Luka surgenuiĝis antaŭ ŝi kaj petis pardonon pro la malbono de li kaŭzata; kaj tiel same diris al niaj gepatroj, al mi, al ĉiuj invititoj, eĉ al la muzikantoj, aldonante senkoherajn vortojn. 'Mi ne povas edziĝi al vi', li diris al Laŭreta. 'Tio estus sakrilegio'. 'Kiusence sakrilegio?' iu lin demandis. 'En la senco de la animo', li respondis. 'Mi ne indas'. Ankaŭ lia aspekto estis nerekoniebla. Sekvis terura nokto. Laŭreta ĉesis plori eĉ ne minuton. 'Kio okazos al li?', ŝi diris inter singultoj. 'Kio fariĝos pri li?'"

"Inter la procesaj aktoj", diris Andreo, "la atestadoj koncernantaj tiun vesperon raportis ĉi tiujn precizajn vortojn de li: 'Mi petas vian pardonon, Laŭreta, mi ne indas je vi. Mi estas krimulo'. Ĉu vi memoras ĉu li vere diris tiujn vortojn?"

"Ion similan, certe. La postan tagon", daŭrigis Jasmeno, "estis vendredo, kaj ni rigardis unu la alian kvazaŭ fulmo estus trafinta nian domon. Mia patrino diris al Laŭreta: 'Filino mia, eble estis bonŝanco por vi, liberiĝo. Pensu, kia estus via vivo ĉe tia viro'. Laŭreta male zorgis nur pri lia sorto. 'Ni esperu ke lia sorto ne estos malbona', ŝi ripetadis. 'Ke Dio lin protektu'. Dum la posttagmezo unu el la muzikantoj de la antaŭa vespero portis al ni la novaĵon pri lia aresto. Estis por ni nedirebla doloro, sed ankaŭ konfirmo; la fino de necerteco. Ĉu mi jam diris, ke estis vendredo?"

"Jes, ĉu vi pensas, ke tio iel gravas?"

"Nenio okazas hazarde. Se nur la partio ne..."

"Ĉu Laŭreta iam dubis pri la senkulpeco de Luka?"

"Laŭreta amis lin. Iom da tempo poste ŝi ricevis de la juĝisto la permeson viziti Lukan en malliberejo. La enket-juĝisto eble esperis, ke Luka povus diri al ŝi ĉion pri la kaŝejo de l' rabaĵo. Mi akompanis mian fratinton ĝis la mallibereja pordego. Elirinte ŝi diris al mi: 'Luka estas senkulpa'. 'Kiel vi scias? Ĉu li eble tion klarigis al vi?', mi demandis. 'Mi lin rigardis en la okulojn', ŝi respondis al mi. 'Mi tion ĵuras Jasmeno, li senkulpas'. Tiom ŝi lin amis."

"Mi pensas ke ŝi pravis", diris Andreo.

"Mia patro reportis la donacojn al sinjoro Silvio", daŭrigis Jasmeno. "Estis renkontiĝo mallonga, senparola ambaŭflanke."

"En la aktoj mi neniam trovis la nomon de sinjorino Ortensia."

"Ĉi tie, kiel vi jam scias, justico ne ĝenas riĉulojn."

"Frenezo tamen estas malpli respektema."

“Mia kompatinda fratino”, daŭrigis Jasmeno, “preskaŭ ne havis forton prezentiĝi ĉe la proceso. Ŝi atestis kontraŭ patron kaj patrinon, kontraŭ min kaj la aliajn parencojn. Ni donis pruvojn pri kulpeco de Luka; ŝi dementis nin, donis al liaj vortoj alian sencon. Sed, tuj post la reveno hejmen, ŝi enlitiĝis. Unu vesperon...” Jasmeno ŝajnis ekŝanceli.

“Diru libere ĉion, kion vi scias”, ŝin instigis Andreo.

“La partio malkonsentas”, ŝi diris.

“Tute ne gravas. Temas pri aferoj, kiuj ne koncernas ĝin.”

“Ĉu ili ne koncernas ĝin?”

“Vi estis rakontanta pri la malsano de Laŭreta”, diris Andreo. “Daŭrigu.”

“La kuracisto, komence parolis pri simpla malbonfarto kaŭzita de emocio”, daŭrigis Jasmeno. “Sekve pri kor-malsano. Sed, antaŭ ol morti, Laŭreta konfesis al mi plorante sian malprudenton. Spite al la malpermeso de Luka, unu nokton, dum ĉiuj en la domo dormis, ŝi sin vesti porfeste kaj ornamis sin per la orelpendaĵoj, la kolĉeno kaj la sorĉitaj ringoj, kaj ŝi sin rigardis enspegule. Ŝi sin trovis belega. Dum ŝi, daŭre antaŭ la spegulo, sin admiris, ŝi sin riverencis, diris dolĉajn vortojn, subite ŝi ekvidis malantaŭ si sinjorinon Ortensian tute ruĝe vestitan. Ŝi kredis morti pro la ektimo, sed ŝi havis forton tuj krucosigni sin. La vidaĵo malaperis kaj ŝi iluziiĝis esti savita. Sed la envulto jam ekposedis ŝin.”

## Ĉapitro dek unu

Alproksimiĝante al la malnova muelilo, Andreo vidis Agnese-n etendantan tolaĵon por sekigo sur ŝnuro ligita al la du poploj en la draŝejo.

Sed, tuj kiam la maljunulino rimarkis lian alvenon, tre haste ŝi eniris la domon kaj tie enfermiĝis. Andreo aferumadis ekde l' tagiĝo. Jam de du tagoj li ne razis sin kaj tio aspektigis lin morna kaj kolera.

“Malfermu”, li kriis frapante pugne la pordon. “Mi devas paroli al vi.”

“Mia edzo ne estas ĉi tie”, respondis Agnese elinterne.

“Ne lin mi serĉas hodiaŭ”, diris Andreo. “Mi bezonas paroli al vi.”

“Li ordonis, ke mi malfermu al neniu”, ekskuzis la virino denove.

“Mi ja ne venis por vin delogi”, diris Andreo. “Venu eksteren.”

“Revenu alian tagon”, petegis Agnese. “Hodiaŭ estas vendredo.”

“Mi disbatos la pordon”, ekminacis Andreo.

Post iom la pordo malfermiĝis. Agnese aspektis distaŭzita kaj timigita pli ol kutime.

“Kio estas?”, ŝi plorĝemis. “Ĉu denove?”

“Mi estis en Pertikara”, diris Andreo. “Mi parolis kun Jasmeno, la fratino de la bedaŭrinda Laŭreta.”

“Kaj do? Kial vi venas rakonti al mi viajn interesojn?”

“La nomo Laŭreta diras al vi nenion? Iam vi ŝin vizitis, vi portis al ŝi donacojn”  
“Mi ĉiam okupiĝis pri miaj aferoj”, respondis la maljunulino per tremetanta voĉo.  
“Mi ŝatus esti lasata en paco.”

Andreo sidis sur grandan ŝtonon apud la pordo, kiel por montri sian intencon ne tre baldaŭ foriri. La lazureca barbo akcentis la maldikon de lia vizaĝo. Lia konduto mastreca konsternis Agnesen.

“Oni statas bone ĉi tie”, li diris. “Ĉu temis pri viaj aferoj”, li aldoni rikane, “kiam vi portis al Laŭreta donacojn de sinjorino Ortensia?”

“Ortensia estis parenca al mi”, respondis Agnese indignite. “Min mirigas, ke vi tion ne scias. Mi estis ŝia onklino.”

“Bela, pura maniero koncepti parencecon. Ĉu mi devas memorigi al vi, kiel oni nomas personojn, kiuj svatas por nelicaj am-rilatoj?”

“Kio ensaltas vian kapon?” protestis la maljunulino. “Luka kaj Laŭreta gefianĉiĝis.”

“Sed Luka kaj Ortensia, kiamaniere rilatis?”

Agnese gestis lace kaj eksidis sur la sojlo de la domo. Ŝi aspektis tre malgranda, minca, senkarna, blank-hariĝinta.

“Mia Dio, mia Dio”, ŝi grumblis, “ĉu neniam finiĝos ĉi historio?”

“Levu la kapon”, diris Andreo. “Dum vi parolas mi volas rigardi viajn okulojn, diveni kion vi kaŝas.”

“Vi ne timigas min”, diris Agnese fiksante siajn okulojn larmoplenajn al tiuj de Andreo. “Ne kredu, ke vi min timigas.”

La du alfrontiĝis iom da tempo. Agnese mienis kiel paŭtanta infanino.

“Nun ke vi rigardis en ilin”, diris Agnese, “rakontu, kion vi vidis.”

“Mi vidis, ke vi devus paroli”, respondis Andreo pli paceme. “Tio helpus vin. Tion mi vidis. Malplenigi la koron helpas ciujn.”

“Kion mi diru, ke vi ne konas jam?”, diris Agnese. “Ortensia estis filino de mia fratino, la orgojlo de l' tuta familio. Tial ke mi kaj Ludoviko ne havis filojn, ni turnis al ŝi nian amon. Por ŝi mi estus min ĵetinta en fajron.”

“Ĉu estis vi, kiu aranĝis la geedziĝon kun sinjoro Silvio?”

“Li estis la plej alloga ŝanco en la ĉirkaŭaĵo.”

“Ĉu vi celas la plej riĉa?”

“Ne estis la unua fojo, ke riĉulo portis al altaro knabinon el pli malalta rango, se li ŝin ŝatis.”

“Maliculoj klaĉas, ke el tiu geedziĝo, via edzo ricevis avantaĝon.”

“Ni ĉiam estis kiel tiu azeno, kiu transportadas vinon, sed trinkas akvon. Sed malriĉuloj vidas malbonon ĉie. Ankaŭ pri vi oni diradas nun ĉiuspecajn ... Se kelkajn aferojn sinjoro Silvio faris en societo kun mia edzo, ĉu ne estis juste, ke ili dividis la gajnon?”

La maljunulino subite ekanhelis kaj devis paŭzi por spiri. Ŝi iel aspektis mizere kaj kaduke; ŝi similis al kompatinda hundo ĉen-ligita.

“Mi ankoraŭ havas pendigendajn tolaĵojn”, ŝi petegis. “Tutan korbon.”

“Poste”, diris Andreo. “Nun parolu kun mi, senpezigu vian koron.”

“Se tiel estus”, ŝi rekomencis rezignacie. “Se tiel estus. Spite al la tuta bonhavo de sinjoro Silvio kaj la modestan doton de Ortensia, mi povas certigi al vi, ke tiu estis ama geedziĝo. Kaj tute ne indas grimaci. Se vi estus koninta mian nevinon, vi kredus je miaj vortoj. Ŝi povis esti impulsa, kapricema kaj petola; sed ankaŭ terure orgojla. Ŝi neniam estus edziniĝinta pro intereso, kredu min. Des malpli pro cedemo al parenca volo.”

“Sed por edziniĝi, ĉu ŝi ne devis rompi sian rilaton kun Luka?”

“Rilaton? Antaŭ kvindek jaroj tiu vorto ĉi tie ankoraŭ ne ekzistis. Eĉ nun mi ne bone scias, kion ĝi signifas.”

“Luka kaj Ortensia, mi celas, ĉu parolis unu al la alia?”

“Jes, sed ili ja ne interŝanĝis promeson. Ili ridetis unu al la alia kaj reciprokis saluton ĉe renkontiĝo. Eble fojon tra fenestrokrado, ili manpremis. Nenion pli. Luka mem retiriĝis, kiam sinjoro Silvio eksvatiĝis. Li fakte estis invitita al la geedziĝa festo kaj ĝin partoprenis.”

“Ortensia kaj Luka tiukaze dancis kune.”

“Neniu tiam trovis tion kritikinda. Ni ĉiuj etis tie, geamikoj kaj paren caro. Ortensia kompreneble ricevis permeson de la edzo.”

“Ŝi tamen, ŝajnas, multe frapis la atenton de Luka.”

“Ĉu? Sed kiel oni povis kompreni tiun viron? Unue preskaŭ indiferenta, li komencis korpreniĝi, post kiam li ŝin vidis edzino de alia viro. Tio fariĝis kompatinda spektaklo. Tuj kiam li vidis ŝin, li subite transformiĝis. Tamen, ekde la momento kiam inter sinjoro Silvio kaj Ortensia estis sakramento, li ja devintus scii, ke por li ne plu estis espero.”

“Domaĝe ke, de tempo al tempo, Ortensia revivigis lian esperon.”

“Atentu”, diris la maljunulino per voĉ-tono, kiu mirigis Andreon. “Atentu, vi insultas mortinton.”

“Mi pardonpetas.” diris Andreo. “Mi scias, ke mia rolo esta fia.”

“Ĉu vi scias do? Tio ja estas pli bone ol nenio”, diris la maljunulino akre mokante lin.”

“Sed do, Agnese”, li aldonis, “vi ne povas nei, ke via nevino akceptis Lukan en sian domon. Tedan svatiĝanton oni ne enlasas, oni ja evitas, oni eĉ ne respondas al ties saluto.”

“Vi pensas tiel, ĉar vi povas juĝi pere de tio, kio okazis poste. Sed neniu el ni, tiam antaŭvidis tian katastrofon. Mi parolas al vi kiel se mi estus dum sankta konfesado. Tio, kion mi nun diras al vi, mi ripetos antaŭ la Dia tribunalo. Povas esti ke niaflanke estis naiveco kaj mankis singardemo: la kulpo tamen, la veran kulpon havis Luka.”

“Mi ne komprenas. Kiun kulpon?”

“Virgo Maria, tiu pri kiu ni parolas. Ja devas esti diferenco inter homo kaj hundo. La rilaton kun virino kristano difinas per geedziĝo, unu fojon por ĉiam kaj sufiĉe, oni ne plu parolu pri tio. Vivi, ĉi tie signifas ŝviti sangon ĉiun tagon de la jaro. Vivi

estas afero dura. Eble vi tion ne scias.”

“Geedziĝo povis esti elirejo ankaŭ por Luka. Nu, kial Ortensia...”

“Sed la edziĝo de Luka estis unue ideo de mia nevino. Estis ĝuste ŝi, kiu priparolis tion kun mi kaj Tereza. Ni devas trovi fianĉinon por li, ŝi diris. Sinjoro Silvio eksciinte la projekton, indikis tiun knabinon el Peticara, kiun li laŭdis. La kompatinda Laŭreta eble meritis laŭdojn, sed ŝiaj gepatroj...”

“Ili ne volis la donacojn, kiujn vi portadis.”

“Ili afektis malŝatemon, sed akceptis ĉion, tiu estas la vero. La donacoj venis de sinjoro Silvio; estis li, kiu pagis. Tuj kiam la gepatroj de Laŭreta ekflaris ke malantaŭ Luka estis tiuj riĉuloj, ilia apetito ne plu konis limojn. Mi parolas ĉefe pri ŝia patrino. 'Mia Laŭreta', plorĝemis kun mi ŝia patrino, 'ankoraŭ ne havas decan vestodoton, ŝi ne havas kupraĵojn por la kuirejo, ne havas monon por mendi la du devigajn komodojn. Ne taŭgas', ŝi diris iam, 'ke la estonta edzo alportos nur dometon kaj kelkajn arojn da tero'. Li devus alporti ankaŭ belan monsumon. Ŝi eĉ postulis pli altan prezon por sia rikolto da nuksoj kaj migdaloj ol la aliaj kamparanoj ricevis..”

“Jen pastro Serafeno”, diris Andreo.

Li tuj ekstaris kaj rapide direktiĝis al la poplo-spaliro staranta kiel barilo inter la muelila draŝejo kaj la rivereto.

La maljuna pastro alvenis ŝvitante kaj anhelante, kun sun-ŝirmilo el griza tolo kaj tuko ĉirkaŭ la kolo.

“Kio okazis?”, li demandis al Agnese. “Kiel mi povas utili al vi? Ĉu ne estis vi, kiu vokis min?”

“Por kiu celo?” ekkriis Agnese mirante. “Mi ja ne bezoans Lastan Sanktoleadon. Ankaŭ Ludoviko, dank' al Dio, fartas bone, li iris al la merkato.”

“Antaŭ nelonge”, diris pastro Serafeno, “venis Toni ĉe mi, por diri ke vi deziris min vidi kiel eble plej urĝe.”

Sed tiumomente li ekvidis Andreon sidantan surherbe, inter du poploj kaj komprenis ke li estis viktimo de ties kaptilo.

“Fiulo”. Li ekkriis kontraŭ tiu, svingante la sun-ŝirmilo minace. “Fripono, senvirtulo, kanajlo.”

“Plu, plu”, lin instigis Agnese duonvoĉe, “se vi volas, vi povas diri al li ion ankaŭ mianome, daŭrigu plu.”

Andreo ridis kaj mansignis, ke li alproksimiĝu.

“Venu ĉi tien”, li diris. “Ĉi tie estas malpli varme.”

“Fakte, krom la poplo-ombro, tie estis ankaŭ la freŝo de la proksima rivereto. La poploj estis altaj, sveltaj, superbaj, la plej belaj en la ĉirkaŭaĵo; ties ombroj estis mallarĝaj, sed densaj.

La akvo de la rivereto lirlis sur fluejo el koloritaj ŝtonoj kaj perfekte diafanis. Ĉe la alia bordo, kampo el kanabo altega formis barilon malhele verdan; iom flanke, apud verda kanaro, du knabinoj lavadis tolaĵojn kaj ridis.

“Mi pardonpetas”, diris Andreo al la pastro, kiam tiu estis proksima. “Luka estas



ĉiam ĉe vi. Vi bone scias, ke ne eblas paroli pri kelkaj aferoj en lia ĉeesto. Eksidu ĉi tie apud mi kaj reakiru spiron. Ja ne necesis veni kure.”

“Se dependus de mi”, diris pastro Serafeno lacega kaj ĝenita, “mi vin ambaŭ sendus sur neloĝata insulo. Mi jam estas superplena je vi du, mi parolas serioze.”

“Kion ni misfaris?”

“Nenion. Sed tiu esta la problemo. Vi estas honestaj ĝeneguloj. Neniu kanajlo iam ajn kaŭzis en ĉi tiu vilaĝo malfeliĉaĵojn kompareblajn al tiuj, kiuj pezas sur la konscienco de la senkulpulo Luka. Se en ĉiu generacio nio havus ĉi tie paron da senkulpuloj, kiel li, aŭ kiel vi, en niaj familioj plu ne estus ordo kaj paco.”

“Eksidu”, insistis Andreo. “Povus esti, ke vi nomas ordo kaj paco tion, kion aliaj nomis blanke farbitaj sepultejoj.”

“Vi ja ne certe volas nun, kromofice, klarigi Evangelion al pastro!”, eksaltis Serafeno kolere.

Agnese daŭre sidadis ĉe la sojlo de la domo, kapkline kaj kun elĉerpita mieno. Apenaŭ ŝi havis fortojn por leviĝi kaj eniri la domon. Sin apogante al la sunŝirmilo, kiel al bastono, pastro Serafeno fleksis la genuojn kaj ŝrumpis surherbe, apud Andreo. Dum tiuj tagoj li multe maljuniĝis, li videble maldikiĝis kaj pene spiris.

“Jes, oni statas bone ĉi tie”, li diris repaciĝinte. Poste li aldonis, aludante al Agnese: “Ĉu vi ŝin denove tradraŝis?”

“Komprenu, oni devas eltiri la informojn per tenaĵo”, motivigis Andreo.

“Oni ne vidis vin ĉi matene”, aldonis la pastro. “Ni vin atendis. Ĉu vi denove vagadis? Oni ja ne povas nei, ke vi havas policistan flar-kapablon.”

“Ĉu vi volas min ofendi? Mi esperis, ke ĉi tiu freŝa aero estus por vi trankviliga.”

“Ne, mi parolis serioze. Cetere ne estas stranga afero se en persekutito evoluas forta enketa senso. Estas ĉiam terure, kiam regadon akiras eksaj persekutitoj.”

“Male, se vi tion volas scii, mi venis ĉe vi, sed en neoportuna momento. Vi estis disputanta kun Luka.”

“Vi estus povinta voki min. Aŭ vi eble preferis subaŭskulti de malantaŭ la pordo? Nun mi ja scias, ke vi kapablas eĉ tion fari.”

“Tute ne necesis. Kelkmomente vi kriaĉis plenpulme. Mi iom atendis la finon kaj poste foriris. Kiel ĝi komenciĝis?”

“Kompreneble pro vi.”

“Jes tion mi tuj komprenis. Tial mi vin vokigis ĉi tien.”

“Mi timas, ke mi ofendis Lukan”, aldonis la pastro. “Li volas reiri al sia domo .”

“Inter la ruinaĵoj?”

“Vi devus klopodi lin trankviligi. Se li lasus min, por mi estus vera humiligo. Ĉiuj rimarkus tion.”

“Prie,” diris Andreo “mi ne volas prokrasti diri al vi aferon. Do, per via ĉi matena disputo, ŝajnis al mi kompreni, ke ankaŭ vi, pri la malnova afero de Luka, ne scias ĉion.”

“Ĉu vi firme kredis, ke mi sciis ĉion? Mi bedaŭras pri via policista naturo.”

“Vi min pelas de surprizo al alian”, daŭrigis Andreo. “Ni rezonu iom pri tio. La proceso, multilate, tuŝis ankaŭ vin, ĉu ne? Ĝi vin kortuŝis, ĝi suferigis vin, katastrofe efikis su la paroĥa vivo, pri kiu vi estis respondeca. Kiamaniere vi povis rezigni je la scio? Ne, kara mia, ŝparu al mi procirkonstancan respondon. Unu fojon nur, mi petas, for la hipokritaĵojn.”

“Tio, kion mi sciis, sufiĉis al mi.”

“Kion vi sciis?”

“Pli malpli, kion ankaŭ vi nun scias.”

“Ĉu nur? Sed mi ne konas la esencon mem.”

“La esencon konas nur Dio.”

“Pastro Serafeno, flankenlasu nun la respondeco-ĵonglojn”, diris Andreo senpacienciĝinte. “Ĉi momente mi trovas min alnajlita al ĉi tiu punkto. Do, Luka ekiris al Pertikara ĉirkaŭ la deka vespere, direkte al Cisterna. Unu horon pli malfrue li estus devinta ĝin atingi, sed neniu lin vidis. Aŭ”, li aldonis turniĝinte al la pastro, “ĉu vi eble scias, ke iu lin vidis en Cisterna ĉirkaŭ la dekunua vespere?”

“Ne, neniu lin vidis.”

“Mi ne scias, ĉu mi povas kredi al vi, sed ni plu iru. Kvar horojn poste, ĉirkau la tria nokte, Ludoviko trovis Lukan ĉe la kanalo de sia muelilo. Ĉu li tie alvenis rekte de Pertikara? Se ne, kie li restadis intertempe?”

“Ĉu vi eble ne komprenas, malfeliĉulo, ke tiuj demandoj taŭgas por spiritisma kulto?”, diris la pastro.

“Senofende al la mortintoj,” daŭrigis Andreo, “ĉu vi ne pensas, ke li pasigis tiun tempon kun sinjorino Ortensia?”

“Kian stultaĵon. La sekvo estus absurda.”

“Kial absurda?”

“Kiun neceson havus viro, mi demandas, lasi sin kondamni al tutviva mallibero, se li kapablas pasigi nokton kun sia amatino?”

“Bone”, diris Andreo, “daŭrigu, elverŝu ĉion ankaŭ vi.”

“Se Ortensia kaj Luka estintus adultaj geamantoj, konvinkiĝu, ne estus okazinta tragedio, sed komedio. Mi povas paroli pri tio senembarase ĉar nenion kion mi eksciis kaj scias, mi ekkonis kiel paroĥestro, sed kiel amiko aŭ duon-parencano. Mi kredas, ke ilia konfes-prenanto estis la paroĥestro de Pertikara, kiu venis preskaŭ ĉiumonate diservi ĉe ni. Unue oni povas diri, ke dum pluraj jaroj tiu amanto estis unuflanka; nur flanke de li. Kiam Ortensia edziniĝis certe ne amis Lukan, eĉ se ŝi kelkfoje ŝercis kaj ridis kun li. Alivorte, ŝi sciis pri la flamo de Luka, sed ŝi ne antaŭvidis tiun incendion. Eble ŝajnis ke eĉ post la edziniĝo, ŝi plu koketis kaj vantumis kun Luka kaj kun aliaj junuloj, kiuj pli frue ŝin amindumis. Envere, kredu min, ŝi estis profunde honesta. Ŝi facile ekzaltiĝis, ekgapis, parolis ekscitite, sin kontraŭdiris; sed tuj kiam iu ajn aŭdacis vorton aŭ geston apenaŭe ofendan al ŝia pudoro, ŝi abrupte repuŝis tiun for. Sed tio certe

ne okazis kun Luka. Ŝi ne antaŭvidis, neniu el inter ni antaŭvidis, ke Luka estis kapabla je tiel eksterordinara am-sento. Eble, antaŭ la edziniĝo de Ortensia, ili interŝanĝis kelkajn dolĉajn vortojn. Povas esti, ke post iom, la knabino ne plu pensis pri tio. En la koro de Luka male ili restis profunde engravuritaj. Laŭŝajne, atentu, li postulis nenion de ŝi. Li tute ne skandalis, kiam ŝi edziniĝis. Li eĉ ne imagis ke ŝi, restinte sola, estus povinta forgesi la devojn de edziniĝinta virino. Sed li ne komprenis, ke amsento tiel profunda kaj forta kiel tiu, en la medio fermita kaj strikta de Cisterna, kreis kun la tempopaso situacion neelteneblan. La amo akiris super Luka absolutan regadon. Li plu restis laborema, ĝentila kaj ridetema kiel antaŭe; sed oni 'vidis' ke li pensadis pri ŝi kaj ke nur ŝin li revis. Imagu", daŭrigis la pastro, "ke eĉ en la preĝejo dimanĉe matene, dum la Sankta Diservo, liaj okuloj estis nevarie fiksaj sur ŝi. La rezulto esits ke neniu fidelulo plu okupiĝis pri la celebrado de la Diservo, sed pri tiuj du. Mi estis devigita lin voki en la sakristion por lin skoldi. Vi devas rigardi al la altaro kaj ne al tiu aŭ alia sinjorino. La postan dimanĉon li obeis al mi. Li deturnis la rigardon eĉ ne momenton de la altaro. Sed ĉiuj lin observis pro la artificeco de lia konduto, kaj la rezulto estis sama kiel antaŭe. Nu, mi devis ordoni, ke li ne eniru la preĝejon, ke li restu en sia domo. Ĉe ĉiu ilia renkontiĝo, eĉ hazarda, la sceno ripetiĝis senvarie, kaj kreis ekscesan streĉitecon. Sed la renkontiĝoj ne estis nur hazardaj. Estis familiaj festoj dum kiuj la renkontiĝo estis neevitebla. Vi bone scias ke en Cisterna, kiel en ĉiu malgranda komunumo, sangaj interligoj estas tiom disbranĉiĝintaj, ke fine ĉiuj pli malpli estas parencoj. Nu, ĉiun fojon estis plejevidente ke por Luka neniu kaj nenio plu gravis post la apero de Ortensia. Se nur li estus konduktinta malrespekte aŭ agreseme, oni tiam estus povintaj lin riproĉi kaj limigi. La afero male estis serioza, kaj ĝi des pli fariĝis tia, kiam ni ekrimarkis, ke Ortensia iom post iom ekbrulis pro la sama fajro. Kiam li apartiĝis, estis ŝi, kiu lin vokis en sian konversaci-rondon. Pri kiu ajn temo pridiskutita, ŝi kuris peti lian opinion, kvazaŭ ŝi kredus nur je li kaj lin taksus supera al la aliaj." "Ĉu ŝi esits bela?"

"Se kredi je mia mallerta juĝ-kapablo, jes ŝi estis bela; sed mi ne kapablus diri kia estis ŝia beleco. Oni preparolis, eĉ longe pridiskutis tion. 'Ŝi ja belas, sed el kie fontas ŝia beleco?', oni diris. Ŝi estas alta, svelta, ŝi havis grandajn verdajn okulojn; ĉiam bele frizita, ŝi havis belegan kaŝtanan hararon. Kiam ŝi ridetis, ŝi estis ĉarmega. Ŝi ofte ridetis."

"Do, por la malriĉaj parencoj, kapitalo saĝe investenda."

"Vera loteri-gajno. Riĉeco el lulilo. Cetere ne estas tiom multaj la vojoj por eliri el malriĉeco. Inter la malmultaj, ĉe ni, ĉiam estis havi belan filinon. Ekde ŝiaj dek du, dek tri jaroj la tuta parenkaro ekprojektis super la naturaj ĉarmoj de Ortensia. Oni ŝin edukis al tio, kaj tion la knabino mem akceptis kiel leĝon de naturo kaj de la socio, tio fariĝis ŝia orgojlo kaj privilegio. La knabino kreskis tial sentima kaj facilanima, aferoj kiuj ofte akompanas belecon. Edziniĝo ŝin plibeligis, alportis koloron. Luka aliflanke estis edukita al respekto de la plej tradiciaj

opinioj pri geedza fidelo. Li tion akceptis, kredis firme je tio kaj al tio submetiĝis. Estis absolute neniam kialo pridubi lian lojalecon. La parolis al neniu pri tiu amo. Li ne arogis al si ajnan rajton. Kaj cetere paroli pri amo estis banala; kiu ne parolas pri ĝi? Li ne donis nomon al sia sento. Tial ke ĝi ne koncernis la aliajn personojn, al kio utilis nomi ĝin? Li ne komprenis, ke li same iris renkonte al ruino; li tion ja ne komprenis.”

“Vi estus povintaj lasi lin trankvila, tial ke li nenium ĝenis.”

“Vi parolas kvazaŭ vi venus de la luno. Tiu ĉi ne estas vilaĝo, vi tion devus scii, sed granda tribo. Ni ĉiuj estas pli mapli parencaj; ĉi tie ne ekzistas privataj aferoj. La klaĉoj plej neverŝajnaj pri la rilato inter la du fariĝis la ĉefa temo de familiaj konversadoj.

La triba tradicio, kiel vi scias, estas kamparana kavalireco: adulto kaj posta tranĉila interbatalo. Bedaŭrinde Luka ne sin tenis al tradicio. Li estis absurda. Via patro, kiu estis lia amiko, koleris pri tio. Kuŝu kun ŝi, tiel baldaŭ la tuto ĉesos. 'Kial vi ne kuŝas kun ŝi?' li ripetadis. Tiel vi rimarkos ke ŝi estas ino kiel la aliaj, kaj ĉio ĉesos. Sed li ne amis paroli pri tio. Li rompis la rilatojn kun via patro ĝuste por ne aŭdi tiujn vortojn. Iasence...”

“Ĉiukaze Luka ne estis sensperta knabo”, rimarkis Andreo. “Iu, kiu soldatservis kun li, rakontis al mi. Ke li ne malŝatis bordelojn.”

“Jes, tiusence li estis kiel la aliaj”, komentis pastro Serafeno. “Li nek estis anĝelo, nek nenormalulo. Nekutima estis lia pasio: nebula amo.”

“Ĉu amo tute senpostula?”

“Amo absurda”, substrekis pastro Serafeno. “Sed malgraŭ tio, li estis strange dolĉanima. Ĝuste la malo de vi.”

“Kial la malo?”

“Pli forta, pli milda.”

“Ĉu vi volas diri, alivorte, pli rezignaciema?”

“Ne mi volas diri pli firma. Oni povis lin malaprobi, sed oni ne povis kvereli kun li. Temis pri damna obstino. 'Miaj sentoj ne koncernas vin', diris al mi fojon. Vere, mi klopodis klarigi al li, ke le kristana vidpunkto, la sentoj koncernas nin pli ol la cetero; la peko, mi klarigis, ne sidas en la faroj, sed en la sentoj. 'Kaj tio ĉi ne koncernas min', li finis. Aliflanke Ortensia ne aspektis samŝtofa kiel li. La kompatinda sinjorino estis malpli stabila, malpli forta, mapli rezistokapabla kaj ŝi marŝis grandpaŝe al histerio. Ŝi fariĝis malsane sentiva. Mi memoras ŝin unu tagon en la sakristio. La vido de rozo en glaso sur mia tablo ŝin kortuŝis ĝis larmoj. 'Vi detruas ŝin', mi diris al Luka, 'vi igas ŝin malfeliĉa; oni ne kredus, ke vi ŝin amas'. Tiu estis la sola argumento kapabla vere tuŝi Lukan, kaj tial li akceptis ĉiun nian sugeston por krei nova situacion.”

“Li povintus elmigri, foriri.” diris Andreo.

“Oni fakte eĉ planis tion. Luka obtenis pasporton kaj kolektis monon por la ŝipo. Sed, tuj antaŭ la foriro, Ortensia kontraŭstaris tion. 'Ĝis kiam li ne edziĝos', ŝi diris, 'mi ne trovos pacon. Ni devas trovi al li virinon, kiu igu lin feliĉa'. Pri tio estis

familia kunsido, kiu decidis la geedziĝon. Kiamaniere ĝi poste fiaskis, vi jam scias.”

“Ĉu? Mi scias nenion”, protestis Andreo.

“Ek”, rebatis pastro Serafeno ĝenite, “pri tio vi scias, kiom mi.”

“Ha ne, pardonu, sed mi ne povas kredi al vi. Alimaniere kiel oni klarigu ke vi, Teresa kaj Ortensia akceptis, ke li lasis sin pasive kondamni al tutviva mallibero. Ne temis pri bagatelo. Vi certe scias pli ol ĉi tio.”

“Ni sciis, ke Luka troviĝis en senespera kaj neeltenebla situacio. Karcero estis elirejo. Ĉu tio ne sufiĉas al vi?”

“Tute ne. Neniam Teresa estus akceptinta tion. Ĉu vi ne komprenas, ke via klarigo estas abstrakta, taŭga eble por psikologia manlibro? Vi daŭre mensogas.”

“Via malrespektemo naŭzigas min”, finis la pastro malfacile ekstarante. “Mi neniam estus pensinta ke fine de mia ekzistado, mi devus alfronti tian mistraktadon.”

## Ĉapitro dek du

“Luka venis serĉi vin en via domo”, diris pastro Serafeno. “Ĉu vi ne renkontis lin?”

“Mi eliris tra la pordo de la legom-ĝardeno kaj petis, ke oni lin tenu tie”, diris Andreo.

“Vi ne povas daŭrigi tiel. Vi kolerigos lin.”

“Hodiaŭ mi disponas je fiakro”, diris Andreo. “Mia motorciklo difektiĝis. Bonvolu min akompani. Mi proponas belan ekskurson.”

“Ne”, respondis pastro Serafeno. “Mi ne volas denove ridindigi min. Mi ja ne promenos bele kun vi ĉirkaŭe.”

“Mankas nur malmultaj eroj de la mozaiko. Mi ne povas, ĝuste nun, rezigni pri ĉio.”

“Ju pli da eroj vi rikoltos, des pli viaj ideoj fariĝos malklaraj”, lin admonis la maljuna pastro.

“Ŝajnas, ke la pasintan nokton oni vidis lumon moviĝi en la forlasita domo de Familio Ascia. Kaj tio sufiĉas por ke oni ekparolu pri fantomoj kaj aliaj diablaĵoj. Mi pensas male, ke temis pri vi.”

“La pasintan nokton? Ne, la pasintan ne estis mi. Hieraŭ mi estis en l'Aquila, ĉe la provinca frenezulejo.”

“Ĉu kuracisto vin priesploris? Kial oni ne enfermis vin?”

“En la registroj, nenia spuro pri sinjorino Ortensia Ascia.”

“Tio signifas, ke oni enhospitaligis ŝin alialoke.”

“Ĉu vi scias kie?”

“Ne.”

“Tion diris al mi la urbodoma sekretario. Ĝi cetere estas legebla en la loĝantara registrolibro. La sinjorino mortis antaŭ unu jaro en la benediktana monaĥinejo de Sankta Klara, sur monto Sankta Rufeno. Mi iras tien nun, fiakre.”

“Ĉu vi volas porti florojn sur la tombon?”

“Mi iras por paroli kun la monaĥestrino.”

“Tial vi survestis blankan ĉemizon kaj kravaton. Sed mi kredas, ke ŝi ne enlasos vin.”

“Mi prezentiĝos je via nomo. Ĉu ne estis vi, kiu gastigis tie la kompatindan sinjorinon, kiam ŝi farigis freneza?”

De la strato audiĝis la voĉo de Toni.

“Fiakro pretas”, li kriis.

“Adiaŭ”, diris Andreo al la pastro. Mi donos viajn salutojn al la monaĥestrino.”

“Aŭskultu”, diris al li abrupte pastro Serafeno.

“Ĉu vi akompanos min?”

“Ne. Mi volas sciigi vin pro afero sufiĉe grava. Eksidu, kafo pretas, mi mem pretigis ĝin.”

“Do, pri kio temas? Nu, se ne pli, kafon vi kapablas fari. Gratulojn.”

“Kiam sinjorino Ortensia forlasis la edzan domon, ŝi ne estis freneza.”

“Mi tion supozis. Ĉu vi frenezigis ŝin poste?”

“Ŝi neniam frenezis. Sed, por motivi, sen skandaloj por la ĉi tiea tribo, ŝian malproksimiĝon de la edzo, ekzistis laŭ ni nenia alia klarigo kredebla.”

“Ĉu nur tio, do?”, ekkriis sarkasme Andreo. “Vi asertis, ke vi sciis nenion pli kaj male kaŝis alian bufon en via gorĝo.”

“Mi perfekte komprenas, ke mia respekto al la sekreto de la animoj esta sento, kiun vi ne povas apreci”, seke respondis la pastro.

“Ne, ĉefe viaflanke, mi ne povas ĝin apreci. Mi tion konsideras male, masko por trankvila kunvivado”, rebatis Andreo.

La pastro fermis la okulojn kiel homo subite trafita de kapturniĝo kaj iom silentadis.

“Andreo”, li respondis fine per voĉo senforta kaj rezignacia, “se vi kredas paroli kun viro kontenta pri si mem kaj pri la maniero kiel li alfrontis la terurajn devigojn de sia ofico, nu, vi eraras. Mi konas pli bone ol vi miajn limojn, miajn malfortojn, miajn pekojn. Sed en la tragedia sorto de Luka kaj Ortensia, mi kredas ne havi kulpon”. Pastro Serafeno aspektis kiel dehakita arbo-trunko: li ne plu defendis sin, li ne plu fintis; li rezignaciis. “La katastrofo”, li rekomencis diri, “okazis pere de fortoj, kiujn ni ĉiuj ne komprenis. Estis neniu por konsili. Kiam ni eksciis ke Luka, dum la enketado, ne defendis sin de la murd-akuzo, kvankam senkulpa, ni ne plu sciis kiel turniĝi. Neniu el ni estis freneza, sed ni sentis super niaj domoj la venton de ĉiesa frenezo. Tiuj estis teruraj tagoj, suferigaj. La patrino de Luka, la kompatinda Teresa, enfermis sin en la preĝejo, ŝi pasigis tri noktojn plorante

antaŭ la Sakramento, ŝi ne akceptis manĝojn. Ortensia estis en stato de plena senespero, ŝi ĝemadis, kriadis, petegis Dion kaj la demonon, akuzis sin mem, elŝiris siajn harojn, batis la kapon almure. Unu nokton sinjoro Silvio vokis min por ekzorcado. Mi trovis antaŭ mi kompatindan, terurigitan estaĵon, kiu perdis kaj sin kaj la prudenton. Ŝi intencis tuj prezentiĝi antaŭ la juĝisto por atesti favore al Luka. La kaleŝo jam pretis antaŭ la pordo.”

“Ĉu ŝi volis atesti pri okazintaĵoj, kiujn nur ŝi konis?”

“Tre malfacile ni sukcesis ŝin persvadi. Tiumomente ni uzis prokrastigan pretekston. 'Oni devas unue demandi Luka-n pri tio', ni diris al ŝi. Sekvis alternaj momentoj trankvilaj kaj angoraj, laŭ la novaĵoj al ni reportitaj pri la konduto de Luka, kiu kontraŭis ĉiun defendan atestadon.”

Pastro Serafino paŭzis por reakiri spiron.

“Daŭrigu”. Diris Andreo, “Nun vi jam saltis la heĝon.”

“Mi ne reparolos al vi nun pri la proceso”, tiu rekomencis. “Kelkajn tagojn post la kondamno, Ortensia vokigis min. Mi trovis ŝin timige maldikiĝinta, laŭlitere nur haŭto kaj ostoj, sed trankvila. 'Mi likis sangon pogute', ŝi diris, 'ekde kiam li estas enkarcere. Nun mi sentas min malplena kiel malplena botelo'. Ŝiaj vortoj min terurigis. 'Tial ke li akceptis laŭvole tutvivan malliberon pro mia amo, mi ne plu povas resti en ĉi tiu domo', ŝi diris. 'Nun mi ne povos plu vivi ne pensante pri li. Oni rakontas pri viroj, kiuj akceptis morton pro amo; sed Luka por mi faris tre multe pli. Tutviva mallibero esta ja pli ol morto. Morto daŭras sekundon kaj por tio oni bezonas momentan kuraĝon; tutviva mallibero estas ekzistado. Ne kedu', ŝi aldonis, 'ke mi sentas min malfeliĉa pro la sinofero, kiun mi nun faras. Male mi fine trovis iun, je kiu kredi. Nun mi kredas je li. Kiel mi povus resti ĉi tie? Nun neniu povus min akuzi je forlaso de la geedza hejmo por kuri al mia kromamanto'. Vi povas imagi, ĉe tiuj vortoj kiel mi reagis. Preskaŭ nur pro ofica devo, mi balbutis ion defende de la ĉiameco de geedziĝo. Sed ne plu temis pri tio. Danke al la perforto de Luka al si mem, ŝi reakiris liberecon, kiu valoris tiom, kiom la perditan de li. Ĉioma kiel tiu. Ŝi longe meditis pri la speciala naturo de honto fontanta el malfidel-peko. Sed tiukaze la afero estis renversita. 'Kiu savus min de la honto', ŝi diris al mi, 'prezentiĝi antaŭ Dio, post kiam mi forlasis sola la viro, kiu oferdonis al mi sian animon?'. La persono staranta antaŭ mi ne plu estis la nekohera, ĉarma kaj supraĵa virineto, kiun mi konis antaŭe. Temis pri alia estaĵo transformita de l' sufero. La sorto supervenkis ŝin. Ŝi eksimilis al sia sorto. Ĉu vi iam vidis la animon de homo?”

“Kion vi celas? Animon senkorpan? Ĉu fantomon?”

“Ŝi estis terura kaj mirinda. Ĉiuj konvencioj dum momento ŝajnis al mi forviŝitaj. Mi sentis, ke mi tute ne kapablis prediki al ŝi. La konvenciaj frazoj ŝrumpis en mia buŝo. Cetere ŝia decido estis neŝanĝebla. Ŝi nur petis min paroli kun ŝia edzo kaj kun la plej proksimaj parencoj kaj, interkonsente kun ili, eltrovi ajnan klarigon, por eviti skandalon. Klarigon verŝajnan. Do tiuj, kiuj akceptis la kondamnon de Luka kaj la ŝajnigon de lia krimo, devis poste subigi sin al

ŝajnigo de frenezo de Ortensia. Mi aldonu ke, ĝenerale, la parencoj estis ĝisfunde konviktaj pri ŝia frenezeco. Ĉu ŝi do ne bone fartis kun sinjoro Silvio? Kion ŝi povus pretendi pli? Ili demandi al si. Ortensia forlasis la domon vespere. La edzo ne montriĝis. Ŝi aperis ĉe la pordo apenaŭ prilumita de lanterno. Ŝi palis kaj rektis kiel kandelo. Supreniris la kaleŝon, sur kiu mi atendis ŝin, sen turniĝi. 'Vi dankos Silvion miaflanke', estis la nuraj vortoj, kiujn ŝi diris. 'Pro kio?', mi stulte demandis. 'Tial ke li ne venis', ŝi aldonis."

"Post la foriro de la edzino, li forlasis ĉion kaj veturis al Brazilo, kie li aĉetis kafo-plantejon. Por Cisterna estis katastrofo. Mi pensas, ke li ankoraŭ vivas."

Tra la fenestro aŭdiĝis denove la voĉo de Toni.

"Fiakro pretas. Ĉu mi lasu la ĉevalon sub la suno?"

"Mi tuj venos. Restu tie", kriis Andreo responde.

Andreo supreniris la fiakron kaj trotigis tuj la ĉevalon. Dum la vojaĝo li malmulte observis la pejzaĝon. La strato estis senhoma. Ĝi aspektis kiel forlasita lando. Dum li veturadis, la suno iom post iom atingis la ĉielosupron. Temis pri suno, de kiu oni ne povis sin ŝirmi, ŝajnis ke ĉio giris ĉirkaŭ ĝi, la montoj, la arboj, la herbejoj, la padoj, la rokoj, kiel ĉirkaŭ rostilo. Ĉe ĉiu vojkurbiĝo, la monaĥineja konstruaĵo malproksimiĝis kaj alproksimiĝis. Sur la lasta supreniro de la montopasejo Sankta Rufeno, la ĉevalo ekpaŝis kaj li elfiakriĝis. Li iris la lastajn voj-turniĝojn piede, marŝante ĉe la fiakro, liginte la bridilojn al la bremsostango. Fine li atingis la malgrandan altebenaĵon, kie staris la antikva monaĥinejo: vasta herboplena plataĵo, disŝutita je vepro kaj ŝtonoj. Aliaj konstruaĵoj ne videblis, krom du nelogiĝitaj domoj, kadukaj, sen pordoj kaj fenestroj.

La monaĥinejon cirkaŭis antikva parko enfermita de muro, kiun preskau tute kovris hedero. Andreo ligis la ĉevalon al la krad-barilo, metis antaŭ ĝi fojnsakon kaj ekiris laŭ la enir-aleo. La monaĥineja fasado estis flavece kalkita kaj videblis sur ĝi larĝaj fendoj. La plimulto de la fenestroj estis fermita, impresante kvazaŭ nelogiĝata domo. Nigraj korvoj krakis kaj flugis malalte super la tegmento. Apud la enirejo maljunulo kunrastis kaj amasigis malsekan herbon. Sed li verŝajne estis surda-muta aŭ kretena ĉar li ne respondis al lia saluto. Andreo tiris la ŝnuron de sonorileto pendants ĉe la enirpordego. Post longa atendado, li estis denove sonoronta, kiam la pordego malfermiĝis. Aperis en ĝi avinjo maldika kaj flava, nigre vestita.

"Mi venas sendite de la paroĥestro de Cisterna", diris Andreo. "Mi havas gravan neceson paroli kun la manĥestrino."

"Ĉu vi havas leteron?"

"Ne, mi povas min klarigi per voĉo."

"Vi venas sen prezent-letero? Pri kio temas?"

"Pri sinjorino Ortensia Ascia."

"Sed, ĉu vi scias ke..."

"Jes, certe. Antaŭ unu jaro."

"Bonvolu eniri. Mi iras voki la Superan Patrion. Ne estas tamen certe ĉu ŝi



povos vin akcepti.”

Andreo sekvis ŝin. Tra mallonga halo senluma li atingis internan korteton kun enmeza puto. Alia avinjo tie staris tiumomente disdonante bekaĵon al kelkaj turtetoj, per tia gracio kaj bonvolemo, ke li haltis.

“Venu”, lin vokis lia gvidistino.

Andreo estis kondukita en vastan salonon, malluman kaj malvarmetan kiel kelo. Post kiam la avinjo malfermis fenestron, kiu apertiĝis al la ĝardeno, li povis vidi, ke en vando estis granda aperturo kradbarita kaj fronte al ĝi estis fotelo.

“Atendu ĉi tie”, ŝi diris. “Eble tamen la Supera Patrino ne povos vin akcepti.”

En la parolejo ne estis aliaj mebloj krom tiu fotelo. De la altaj vandoj pendis obskuraj pentraĵoj, portretoj de prelatoj, monaĥestrinoj, bonfarulionj, romantikaj pejzaĝoj kun sanktejoj. Enaere ŝvebis apenaŭa odoro je ŝimo kaj vakso. La parolejo estis tre vasta ĉambro, sed verŝajne ĝi akceptis unu solan vizitanton jare. Tie regis tombeja silento. En la ĉirkaŭaĵoj oni sciis, ke la monaĥinejo estis ege kadukiĝinta. Oni tiam eĉ diskutis pri ĝia sorto, kiam mortos la lasta monaĥino. La pluvivantaj certe estis jam majunaj kaj malmultaj.

La atendado de Andreo fariĝis longa. Por malpezigi la tempopason li alproksimiĝis al la mafermita fenestro. Ĝi apertiĝis al la parto de la ĝardeno kultivita je legomoj. Maljuna monaĥino ĉerpis akvon el puto kaj akvumis laktukon. Post iom tintis malproksima sonorileto kaj la monaĥino ĉesis la laboron kaj krucoŝignis sin. Mallaŭta pordobrueto trans la krad-barilo sciigis fine al la vizitanto pri la alveno de la monaĥestrino. Li alproksimiĝis al la krado. Blanka aperaĵo movigxis en mallumo trans ĝi. Estis malfacile distingi ŝiajn trajtojn, la aĝon, la mienon.

“Eksidu”, ŝi diris.

La voĉo estis febla, agrabla, senkorpa.

“Vi venas el Cisterna, ĉu? Kiu estas via nomo?”

“Andreo Cipriani.”

“Cipriani? Antaŭ multaj jaroj ni havis malavaran bonfarinton en Cisterna, kies nomo estis Annamaria Cipriani.”

“Ŝi estis mia avino, sankta virino. Fojon, kiel infano, mi akompanis ŝin ĉi tien por vizito. La tiama monaĥestrino regalis min per dolĉaĵetoj ege bongustaj. Mi ĉiam konservis dolĉan memoron pri ĉi tiu monaĥinejo.

“La nomo de via avino estas ĉiam en niaj preĝoj por la mortintoj.”

“Ŝi estis sankta virino, vere”, aldonis Andreo. “Requiescat en paco. Sed ŝi estis la ruino de nia familio.”

“La ruino?”

“La ekonomia ruino, diradis mia patro. Ŝajnas ke ŝi destinis al pastroj kaj monaĥinoj tion, kion rajtis la gefiloj. Plenfavore al sia animo, kompreneble.”

“Ĉu vi persone konis ankaŭ sinjorinon Ortensia? Ĉu ankaŭ ŝi estis via parenco?”

“En Cisterna, via Respektinda Patrino, kiu ne parencas? Sed la kompatindan sinjorinon mi persone ne povis koni, ĉar mi ankoraŭ ne naskiĝis, kiam ŝi forlasis la domon kaj la vilaĝon. Mi konas tamen ŝian historion, ni diru, rekte.”

“Ĉu pastro Serafeno ankoraŭ vivas?”

“Jes, maljuna kaj obstina. Mi eĉ dirus dur-nuka. Imagu, ke hodiaŭ li mem volis veni ĉi tien, kvankama li vekiĝis kun forta spir-manko. Estis vera streĉo lin konvinki sendi min. Krom tio, oni ĉiam revenas kun plezuro al la lokoj vizititaj kiel infano.”

“Kiam ni komunikis al li la morton de la sinjorino, li ne respondis.”

“Tio mirigas min tree. Mi tamen povas certigi al vi, via Respektinda Patrino, ke li ĉiam havis grandan intereson pri la sorto de la sinjorino, sed pro la aĝo, mi aŭdacas diri, lia atentemo iomete febliĝis.”

“Ĉu eble li ne plu estas la paroĥestro? Ni erare adresis la komunikon ne laŭnome, sed al la paroĥestro de Cisterna.”

“Tiukaze ĉio klariĝas, via Respektinda Patrino. La nuntempa paroĥestro, iu pastro Franko, estas ulo moderna, praktikema kaj optimisma, Nu, pli bone ni ne preparolu tion. Malgraŭ tio, pastro Serafeno ricevis same la informon pri la morto. Fakte li celebris funebran diservon, propete, mi ne scias ĉu oni tiel diras, por la forpasintino.”

“Se li tiam estus respondinta, ni lin demandus kiel disponi pri kelkaj personaj objektoj de la bedaŭrinda sinjorino. Vi scias, ke la sinjorino restadis ĉi tien kvardekon da jaroj. Ŝi vivis kun ni, ŝi estis unu el ni, sed ŝi ĉiam restis gasto, 'donacita', kiel oni diras, ne monaĥino.”

“Mi supozis tion, konsidere de ŝia edxina stato.”

“Ŝiaj personaj objektoj do apartenis al ŝi. Ni volis pri tio konsilon de pastro Serafeno. Tial ke ni ne ricevis respondon...”

“Pardonu se mi vin intrerrompas, via Respektinda Patrino. Mi petegas vin ne kredi, ke mia vizito havas ajnan profit-celon.”

“Kiu do estas la celo de via vizito?”

Kvankam li kompreneble ja atendis tiun demandon, Andreo iom embarasiĝis.

“Nu”, li diris, “via Respektinda Patrino, ĉu mi diru la veron? Mi vere volus scii, kiel la sinjorino pasigis ĉi tie sian tempon. Ĉu ŝi trovis inter ĉi tiuj muroj sian pacon, sian trankvilon? Ĉu ŝin kelkfoje turmentis konscienc-riproĉoj? Ĉu ŝi konfidis tion al vi? Ĉu al aliaj monaĥinoj?”

“Vi diris, ke vin sendis pastro Serafeno.”

“Okazis grava afero, via Respektinda Patrino, grava okazintaĵo. Mi esperas, ke vi min komprenos. Viro, kiu, kaŭze de sinjorino Ortensia, lasis sin kondamni al tutviva mallibero, revenis al Cisterna.”

“Ĉu Luka Sabatini?”

Subite la voĉo klara kaj nepersona de la monaĥestrino emociiĝis.

“Via Respektinda Patrino do konas kaj eĉ memoras ties nomon?” ekkriis Andreo.

“Nu, antaŭ kelkaj monatoj oni finfine agnoskis lian senkulpecon. De mallonga

tempo amnestiita, li troviĝas nun inter ni.”

Estis longa silentopaŭzo.

“Kia estas lia sano? Ĉu iu lin flegas?”, demandis fine la monaĥino.

Estis io nova en ŝia voĉo, virina vibro, kiu tuj komunikiĝis al Andreo.

“Li loĝas en la domo de pastro Serafeno”, li rapide klarigis. “La longa ripozo, se oni tion povas diri, ne malutilis al li. Kia mirinda persono. Ĉu vi ne kredas, via Respektinda Patrino, ke tia viro rehonorigas iom la vira genro?”

“Ĉu la vilaĝanoj repaciĝis kun li?”, insistis la monaĥestrino. “Mi povas diri ke tiu estis ĉiama turmento de sinjorino Ortensia. Eble li revenos hejmen, ŝi diris, sed li estos maljuna, nekapabla labori kaj neniu helpos lin.”

“Trankviliĝu, via Respektinda Patrino. Li havas du fidindajn amikojn. Ĝis kiam ni posedos panpecon, ni ĝin dividos kun li.”

“Ĉu li plu havas la animfieron de lia junaĝo?”

“Spite de liaj sepdekdu jaroj, li esta la plej juna el inter ni ĉiuj. Sed li ankaŭ estas tre dolĉ-anima.”

La voĉtono de la monaĥestrino ĉiam pli moliĝis.

“Ĉu li ne estas afliktita? Ĉu li ne estas plena je malamo kaj rankoro?”, ŝi demandis. “Ĉu ne? Tio ja estus tre homa. Oni rajtas demandi al si ĉu tutviva enfermiteco estas eltenebla sen klara alvokiĝo al Di-graco.”

“Evidente la denaska alvokiĝo de Luka nomiĝis Ortensia”, diris Andreo.

“Bedaŭrinde temis pri alvokiĝo sen graco. Via interesiĝo pri mia amiko, via Respektinda Patrino, min kuraĝigas al propono, kiun mi esperas vi ne taksos aŭdaca. Ĉu vi permesos li konkuki ĉi tien, por mallonga vizito, tagon kiun vi bonvole decidis?”

“Ĉu ĉi tien? Kiucele?”

“Por ke vi povu lin koni, kaj por ke li povu aŭskulti rekte de viaj lipoj, tiujn informojn pri la vivo de sinjorino Ortensia, kiujn mi ĵus aŭdacis demandi al vi.”

“Ĉu mi devas memori al vi, ke ĉi tiu estas monaĥinejo?”

“Via Respektinda Patrino fiksis al la vizito la limojn postulitajn de la regulo. Eble nenio malpermesos ke li vidu, el la parko, almenaŭ la fenestron de la ĉambreto, kiun okupis la sinjorino. Aŭ nur la florojn, la arbojn, la montojn kontempleblajn de tiu fenestro. Temus, mi pensas, pri malgranda bonfara ago. Kian ĝojon, pensu, havus el tio la bedaŭrinda sinjorino Ortensia mem.”

La monaĥestrino ne tuj respondis.

“Se temus pri kruda aŭ malpia persono”, insistis Andreo, “mi certe ne proponus tion. Fine, via Respektinda Patrino, vi scias, de la rakontoj de la sinjorino, kiaspeca homo eksterordinara estas Luka Sabatini. Li nun estas blankhara maljunulo. Kial nei al li ĉi tiun posttempan konsolon?”

“Li rajtas veni”, diris fine la monaĥestrino.

“Kiam? Ĉu eble morgaŭ?”

“Li povas veni kiun ajn tagon, kondiĉe ke lin akompanu pastro Serafeno. Ĉe la pordo, li prisilentos sian nomon; tiu de la sacerdoto sufiĉos.”

“Se pastro Serafeno ne estus kapabla alfronti la lacigan vojaĝon?”

“Ni atendos la tagon, kiam li sentos sin sufiĉe forta. Sed nun mi rememoras, ke sinjorino Ortensia konfidis al ni ion por Luka Sabatini. Paciencu momenton.”

La blanka ombro de la monaĥestrino retiriĝis en la mallumo de la ĉambro.

Aŭdiĝis kelkaj pordoj malfermiĝi kaj refermiĝi post ŝi. Dum la atendado, pliiganta nervozeco kaptis Andreon. Kiam la monaĥestrino reaperis, ŝi havis enmane paper-rulaĵon. Andreo leviĝis preskaŭ tremante kaj alproksimiĝis al la kadro.

“Kio ĝi estas?”, li demandis.

“En la lastaj dek ok jaroj”, diris la monaĥestrino, “sinjorino Ortensia perdis la uzon de la kruroj. Ŝi sidis la tutan tagon sur tolseĝo, kiun laŭ la vetero kaj sezono, oni portis en la ĝardenon aŭ en la verandon. Ŝi pasigis sian tempon brodante kaj skribante. Laŭ konsilo de ŝia konfesprenanto, ŝi verkis intiman taglibron, kiun li legis kaj cenzuris.”

La monaĥestrino paŭzis.

“Ŝi skribis treege malrapide, pripensante kelkfoje tutajn tagojn vorton aŭ mallongan frazon. Sentante sin mortonta, ŝi obtenis de la konfesisto la rajton lasi al mi certan nombron da paĝoj el tiu taglibro.

'Donu ilin al Luka', ŝi diris. Mi demandis ŝin: 'Ĉu mi klopodu ilin havigi al li, kie li nun troviĝas?'. 'Ne', ŝi diris al mi, 'baldaŭ li estos liberigita'. Sed mi konfesas al vi, ke mi tute ne estis certa pri la ebleco plenumi tiun promeson. Male la Sinjoro montris ankoraŭfoje sian bonvolemon. Sinjoro Cipriani, mi tre dankemas vin pro via veno. Pardonu se la paperoj estas sigelitaj. La vakson metis ŝi mem.”

## Ĉapitro dek tri

Pastro Serafeno suprengrimpis la lignan ŝtupareton, krutegan, preskaŭ vertikalan, kiu kondukis al la ĉambreto de Andreo kaj trovis lin enmetanta orde siajn vestojn en valizo.

“Ĉu vi foriras?”, li demandis. “Ĝuste nun, kiam vi povus ripozi. Plej evidente vi ne kapablas ĝui la vivon. Kio estas tiuj paperoj, kiuj kuŝas sur la tablo? Ĉu vi ankaŭ verkis novrealisman romanon?”

Andreo ekridegis.

“Jes, temas pri vera romano”, li diris, “sed nur fikcia. Ne mi skribis ĝin, temas pri la aktoj de la proceso al Luka. Ĉu vi volas ilin trarigardi?”

La pastro ekmienis furioze.

“Priplorindaj juĝistoj”. Li diris.

“La difekto kuŝas en la metio mem”, verdiktis Andreo. “Justo estas neebla, krom en kelkaj kazoj, kiel okul-pro-okulo.”

“Kiel kutime vi troigas”, respondis la pastro. “Tiel vi fariĝos anarkiisto. Ja ne ĉiuj

procesoj similas al tiu de Luka.”

“Estas ankaŭ alia, la prototipo, kiu eĉ pli taŭgus al mia tezo”, aldonis Andreo.

“Parolante kun pastro, estus eĉ devige mencii ĝin. Kiu estis la oficiala motivo de la kondamno de Jesuo? Sed la vera kialo pro kiu li devis morti, vi mem klarigis tion dum kateĥizado, ja estis tute alia.”

“Silentu. Vi damne miksas sanktaĵojn kun profanaĵojn.”

Andreo kapjesis ridetante.

“Jes, ne hazarde”, li diris. “Vi male ne kredas je Enkarniĝo.”

“Vi estas konfuzemulo”, diris la pastro. “Ne ekzistas homa kunvivado sen kulpoj kaj punoj.”

“Sed pere de la puno ne estas ĉiam facile kompreni la kulpon”, aldonis Andreo.

“Tiu estas la kerno. Sed kun vi, mi jam sufiĉe disputis. Prefere, diru, ĉu estis io en Luka kiel knabo, kiu ebligis antaŭvidi eksterordinaran sorton?”

“Li estis ema al revado kaj al mem-esplorado”, diris la pastro. “Pro tio ni taksis lin iom stulta.”

“Amo lin savis.”

“Lin savis, vi diras? Lin perdigis. Homa amo estas kruela kaptilo.”

“Kara pastro Serafeno, ne rezonadu kiel farus pastro Franko.”

“Cetere, mi ne scias, kion raportas ĉi tiuj aktoj, sed ankaŭ dum la proceso li aspektis kiel kreteno. Tuj kiam disaŭdigis tiu novaĵo, la tribunalo ekpleniĝis je geelegantuloj serĉantaj amuziĝon. La akuzanto direktis al li plurajn demandojn pri lia privata vivo. 'Pardonu', Luka respondis, 'mi ne volas ofendi vin, sed temas pri aferoj, kiuj ne koncernas vin'. Imagu la rid-eksplodojn. Dum la pridemandado li fikse rigardis ion sur la vando, supre de la prezidanto. 'Kion vi gapadas?', lin demandis la prezidanto. 'Jesuo surkrucas', respondis al li Luka; 'ĉu tio ne estas permesite?', 'Vi devas rigardi alvizaĝe vian alparolanton', kriis la prezidanto. 'Pardonu', rebatis Luka, 'sed ankaŭ Li min alparolas; kial vi ne silentigas Lin?'. Vi povas denove imagi la gajecon de la publiko. Temis pri spektaklo absurda kaj timiga. Fine de la debato, kiel kutime, la prezidanto demandis la akuziton, ĉu li volis ion diri, antaŭ ol la ĵurianoj retiriĝos en la konsilejo. Luka apenaŭ videble movis la lipojn. 'Pli laŭte', kriis la prezidanto. Sed Luka ekruĝis kaj lin ekrigardis embarasite. 'Kion vi diris?', insistis la prezidanto. 'Dio pardonu vin', diris Luka. Lia nekontraŭstaro estis timiga. Se li nur estus blasfeminta, parolatakus, minacus; male li estis dolĉanima kaj malgrasema. Li neis esti la murdinto, sed li spektis la pasadon de la atestantoj, kiuj amasigadis indicojn kontraŭ li, kiel alspektaklo, kiu tute ne koncernis lin. Mi parolis al li momenton post la kondamno por doni al li pakaĵon konfiditan al mi de lia patrino. Vidante min konsternita, 'Kuraĝon', li diris. Poste li aldonis: 'Ĉu vi ne volis mian forvojaĝon? Nu, mi nun foriras. Ĉu vi ne volis ne plu vidi min en la stratoj de Cisterna? Vi min ne vidos longe'.”

“Li estas tiom pli forta ol ni ĉiuj”, rimarkis Andreo. “Mi ne estus havinta tiom da kuraĝo.”

“Mi ne scias”, diris pastro Serafeno. “Senvole li kaŭzis ĉi tie multan malbonon. Sed nur Dio povas lin juĝi.”

“Kiam mi meditas pri Luka”, aldonis Andreo, “mi min demandas de kie povas veni homo tia. Ke li estas unu el ĉi tiu regiono, videblas en ĉiuj trajtoj de lia vizaĝo, en lia voĉo, kiel li moviĝas, tamen...”

“Sub aspekto ordinara kaj malagresema”, diris pastro Serafeno. “li kaŝas nehoman durecon. Li duras kiel ŝtala klingo.”

“Mi dirus”, korektis Andreo, “kiel klingo de pan-tranĉilo.”

“Atentu”, diris la pastro, “tiu estas la armilo uzata en familiaj murdoj.”

“Ĉiu-kaze tamen la viktimo estis li mem.”

“Jes, unuavide. Sed pripensu iomete. Li suferis la tutan vivon socian perforiton, tio estas nerefutebla; tamen envere akceptante ĝin, li eskapis la perforiton kaj trudis ĝin al la aliaj. Pro tio la memoro pri li, ĉi tie, tute ne estas bona.”

“Sed kia vivo, Kristo. Li en tutviva malliberejo kaj ŝi en monaĥinejo.”

“Li en malliberejo, ŝi en monaĥinejo je plurcentoj da kilometroj for. Sed pli proksimaj, pli interligitaj ol iu ajn alia paro.”

“El mia vidpunkto...”

“Kion vi denove kontraŭdiros?”

“Nenion”, diris Andreo, bridante sian langon. Mi jam diris ke mi ne volas disputi kun vi, ĝuste kiam ni disiĝas. Ĉu vi eliras? Se vi vidos Lukan bonvolu lin averti, ke mi foriros ĉi vespere.”

Pastro Serafeno reiris rekten al sia loĝejo. Surstrate ne plu okazis kiel en la pasinto, ke ĉe ĉiu paŝo iu haltigis lin por peti konsilon aŭ helpon. Nuntempe tre maloftaj vilaĝanoj salutis lin kaj tion faris rapideme kaj embarasite.

Luka estis endome. Du fojojn pastro Serafeno iris ĝis la supra etaĝo, laŭiris la koridoron piedpinte kaj enrigardis tra la duone malfermita pordo de lia ĉambreto; sed vidante lin ankoraŭ streĉe legantan la paperojn ricevitaĵn de Andreo, li retiriĝis.

Luka sidis sur la fera fald-lito, en kiu li dormis. Dum li legadis, lian vizaĝon, kiel tiun de infano, trastriis larmoj. Kiam la pastro rimarkis ke li ĉesis legadi, li eniris la ĉambron kaj eksidis flanke al li.

“Ne zorgu pri la larmoj” pardonpetis Lukla ridetante dum li sekigis siajn vangojn.

“Ĉi tiu estas la momento plej feliĉa de mia vivo.”

“Mi estas kontenta, ke tio okazis al vi”, diris la pastro same kortuŝita. “Tute ne kredu, ke feliĉa momento estas malmulto. Feliĉo ekzistas nur en tiu formo.”

La emocio malebligis al Luka paroli. Li nur kapsignis jese.

“Mi min demandas tamen”, aldonis la pastro, “ĉu amo al virino povas motivigi tiom da sufero.”

“Ekzista ja nur tio”, respondis Luka konvinkite. “Pardonu, kio ekzistas krom tio?” Pastro Serafeno lin rigardis kun surprizo.

“Do”, li diris, “mia tuta kateĥizado utilis al nenio?”

Luka ne komprenis la demandon. Tial li respondis:

“Tio utilis por mia konfirmacio”, li diris. “Al kio krome ĝi devus utili?”

“Vi estas senprudentulo”, diris la pastro ŝajnigante ĉagrenon. “Bone pripensante tion, via tuta konduto konsistis el diabla impertinenteco. Via falsa rezigno havigis al vi la bedaŭrindan Ortensian. Ankaŭ al Andreo, kiu eĉ ne konis vin, trudiĝis via ekstravaganca influo.”

“Kaj des pli aĉe”, aldonis plie pastro Serafeno per sama tono, “vi senigis je ĉiu povo la plej teruran punon, kiu restas en nia kodo post la forigo de morto-puno. Neniigu la timon por tutviva mallibero kaj en ĉi tiu lando ne plu eblos vivi.” Post ioma atendo por vidi ĉu la maljuna pastro havis ankoraŭ ion por grumbli, Luka ekridetis.

“Andreo 'stas lerta”, li diris. “Ĉu vi ne pensas? Renkonti lin, kvankam ĉe la fino de mia ekzistado, estis la dua granda donaco, kiun mi ricevis de la sorto. Nun mi ne plu povas plendi pri mia vivo. Kie li estas nun? Kion li faras?”

“Nun li estas riparanta sian motorciklon.”

Post iom pastro Serafeno aldonis: “Li estas certe honesta, sed li ankaŭ kapablas esti senkompata.”

“Senkompata? Ĉu vi parolas serioze?”

“Mi bedaŭras diri tion”, pardonpetis la pastro, “Sed kun vi mi devas esti sincera. Jes, li povas esti malbona, eĉ kruela.”

“Oni ne dirus, ke ni parolas pri la sama homo.”

“Kun vi estas malsame”, klopodis klarigi la pastro. “Li tim-respektas vin.”

“Li tim-respektas min?”, diris Luka kaj ekridegis.

“Li estas speciale kruela”, diris plue la pastro, “tian kruelon ĉi tie ni ne konis. Mi forgesis diri al vi, ke li intencas veturi ĝuste ĉi vespere al Romo.”

“Ĉu li foriros?”, murmuris Luka.

“Vi komprenu”, diris la pastro, “liaj okupoj estas aliloke. Li restadis ĉi tie eĉ tro longe.”

La feliĉ-momento de Luka jam elĉerpiĝis. Liaj lipoj ekblankis kaj tremetis.

“Sed, antaŭ ol li forvojaĝos, mi devas paroli al li”, li diris ekstarante.

“Andreo estis antaŭ la dompordo okupita per malmuntado de la motorciklo, kiam li vidis Lukan veni el malproksime, preskaŭ kure, direkte al li. Li apogis tere la ŝraŭbilon kaj iris renkonte al li.

“Mi scias, ke vi foriros”, diris Luka reakirante spiron. “Ĝuste”, li tuj aldonis.

“Mi devas reiri al Romo”, motivigis Andreo. “Ni renkontiĝos dum libertempoj.”

“Kompreneble”, diris Luka glutante salivon. “Mi nur volus proponi al vi nelongan promenadon.”

“Se temas pri tio”, respondis Luka ridetante, “mi eĉ povas prokrasti la foriron.”

Ili ekiris laŭ la monteta pado, kiu estis la mallonga vojo por supreniri al Pertikara. La animagordo kreiĝinta inter la du manifestiĝis en ĉiu detalo de ilia maniero marŝi kune kaj konversadi. Al okuloj de nekonato, ili povus facile aspekti kiel

patro kaj filo, malgraŭ la malsameco de la socia stato kaj kvankam Andreo estis pli alta kaj svelta, Luka pli fortika kaj kun vizaĝ-traĵtoj pli fortaj.

La vespero estis milda, diafana kaj orumita. Alvenontis aŭtuno. La unua hirundo-grupo jam ariĝis sur la preĝej-tegmento por la ĉiujara foriro. Luka rigardis ĉirkaŭ si dolĉe kaj scivoleme. Pluirante laŭ tiu pado, Luka revidis, la unuan fojon ekde sia reveno, la forlasitan domon de sinjoro Silvio. Li ne klopodis ŝanĝi direkton, sed malrapidigis la iron. La pilastroj de la kradpordo senkalkiĝis, la fera krado mem rustiĝis kaj estis kunligita per dika kateno. Urtikoj, papavoj kaj misherboj ĉiuspecaj pleninvadis la malgrandan ĝardenon. La portikon antaŭ la enirejo kovris hedero kaj kaprifolio. La fenestroj estis ĉiuj fermitaj; pluraj latetoj de la persienoj jam disfalis kaj mankis. Kiam la du viroj pasis, blankanigra pigo sidanta sur la balkona balustrado, ekflugis raŭke ekkriante.

“La pasintan semajnon mi vizitis la domon”, diris Andreo.

“Mi scias. Kiel vi eniris?”

“Mi apogis ŝtuparon al la kuirejaj fenestroj kaj rompis la ŝutrojn. Tio ne kostis grandan streĉon, la ligno putras. La ĉambroj estas tute malplenaj. Nur en la salono oni lasis ĉe muro etan portreton de Ortensia. Mi forportis ĝin por vi. Mi ĝin donos al vi ĉi vespere, antaŭ mia foriro.”

Surprizite Luka ne sciis kion diri.

“Mi dankas vin”, li balbutis. Poste li aldonis: “Dum la pasintaj tagoj mi iel rankoris kontraŭ vi. Vi devas min pardoni.”

“Mi sciis, ke mi riskis vin ofendi”, diris Andreo. “Sed mi ne povis rezigni.”

“Mi havis kaŝejon”, daŭrigis Luka, “kien neniu krom mi iam eniris. Ĉu tio okazas al ĉiuj? Mi ne scias. Mi pensas, ke temas nur pri pudoro aŭ singardemo. Mi ĉiam havis la impreson, ke rakontate certajn okazintaĵojn, oni ŝanĝas ties sencon.”

“Ili pluiris iomete senparole. Rilate al Andreo disvolviĝis en Luka speciala ŝanĝo bone videbla en lia maniero rigardi kaj alrideti lin. Ne plu estis bezono kaŝi ion ajn inter ili.

“Ortensia, kiam ŝi estis knabino, loĝis ĉi tie”, diris Luka pasante antaŭ ŝtonamaso. “Ĉiuvespere, iom pli frue ol lla vesper-preĝo, ŝi malsupreniris kun kupra kruĉo por ĉerpi akvon el tiu fontano tie. Mi ŝin atendis duonvoje, preta kapti ŝian rideton, kiun mi revokis en mian memoron plurajn fojojn ĝis la posta tago. Mia vera vivo estis tiu rideto ripetiganta en mi dum horoj kaj horoj. El kio konsistus la vivo”, li aldoni post iom, “sen akordo kun la amata persono?”

Lia voĉo estis serena kaj trankvila.

“Mi vin envias”, diris Andreo duonvoĉe.

“Mi scias, ke vi ankaŭ estis ĉe la tribunalo”, aldonis Luka. “Ĉu oni permesis al vi legi la paperojn?”

“Mi eĉ parolis kun via akuzinto.”

“Ĉu li ankoraŭ vivas?”

“Jes, li vegetadas remaĉante siajn memorojn. Li ankoraŭ firme kredas ke vi estas la murdinto.”



“Tiu homo havas la kapon plenŝtopita je presita papero”, diris Luka. “Imagu, ke li kredis submeti min pugnobatante libreton, kiun li ĉiam tenadis enmane. 'Kion do vi havas en tiu libro', mi lin demandis, 'ĉu loteri-numerojn?'. 'Ĉi tie estas la artikoloj kaj la paragrafoj', li klarigis al mi. 'Bonege', mi diris, 'domaĝe, ke ili ne utilas por salato'. Se nur vi estus vidinta lin. Li koleriĝis kvazaŭ mi estus prisakrinta liajn avojn. Eĉ la ideo pri bono aŭ malbono, kiun havis tiu juĝisto, dependis kompreneble de la presitaj paragrafoj. 'Ĉu estas paragrafo', mi lin demandis, 'por viro edziĝonta al virino, kiun li ne amas, anstataŭ edziĝi al virino, kiun li amas?'. 'Ne', li respondis, 'tiuj estas nekontroleblaj faktoj, leĝo ne okupigas pri sentoj'. 'Bonege', mi diris. 'Ankaŭ miaj faktoj estas nekontroleblaj, estas neniu paragrafo koncernanta ilin, kaj mi ne rakontos ilin al vi. Temas pri aferoj miaj’”.

La pado atingis ĉar-vojon grimpantan per vastaj voj-turnoj al Pertikara. Ili tie renkontis ĉaron plenŝarĝitan je fojno, kiun tiris bovoj apenaŭ videblaj pro la granda fojn-amaso. Ĉe ilia apero, la viro sidanta sur la fojno kaŝiĝis en ĝi rapide kaj restis plu videbla nur la ĉapel-verta. Ĝi aspektis, kiel herboza monteto memmoviĝanta. La du marŝis malantaŭ la ĉaron centon da metroj kaj poste ekiris laŭ pado trairanta malgrandajn kampojn kaj rokajn elkstarajojn. Luka deprenis sian jakon kaj ĝin portis apogita al ŝultro.

“Varmas”, li diris.

Sed eble li faris tion por ne iri tra la kamparo kiel sinjoro.

La pado estis senhoma. La fojn-laboro kaj prizorgado de legomĝardenoj, tiumonate, tenis la homojn funde de la valo. Andreo samritmigiis sian paŝon al tiu de Luka, kiu de tempo al tempo devis halti por reakiri spiron.

“Kial vi ne foriris de ĉi tie?”, lin demandis subite Andreo. “Ŝajnas ke fojon vi havis eĉ pasporton pretan. Tiuepoke, kiel vi scias, ĉi tieaj viroj iris grandnombre al Amerikoj. Pluraj restis tie, konstruis novan ekziston malpli senesperan.”

“Oni kulpigis Ortensian pri tio, sed malprave”, respondis Luka. “Kiam ĉio pretis, mi ekrimarkis ke mi ne estus povinta vivi malproksime. Mi sentis min apenaŭ la duonon de estaĵo; la alia duono estis ŝi. Temis pri sento, kiun mi ne sukcesis sufoki, malgraŭ la maloftaj renkontoj dum kiuj ni parolis nur ĉeeste de aliaj personoj. Sed vivi en la sama vilaĝo, en ŝia orbito, estis tiu minimumo, kiun, laŭ mia sento, mi rajtis.”

Andreo estis obĵetonta ion, sed li ne aŭdacis. La pado pasis apud antkva fojnejo forlasita.

“Ni haltu”, proponis Luka. “Mi ankoraŭ ne alkutimiĝis al longaj promenadoj.”

Ili eksidis sur arbotrunko kuŝanta tere sub la markezo de la fojnejo. Terkavo tie fosita kun apud du ŝtonoj iam servis kiel fajrejo. Luka ekbruligis sian pipon. La suno estis subironta. Elde nubo disradiis orumita lumfasko, bone videbla, kie sanktul-nimbo. Luka suĉis de tempo al tempo buŝprenon da fumo el la pipo kaj pririgardis la kampojn kaj vitejojn deklivantajn alvalen per okuloj klaraj kaj serenaj. Pro la aĝo kaj por pli bone ripozi, li sidis iom malrekte, apogante la

kubutojn al la genuoj; la trajtoj de lia malgrasa vizaĝo restis regulaj kaj forte signitaj, kvazaŭ en granita statuo, la brovoj hardensaj, la okulkavoj profundiĝintaj. Li aspektis kiel kamparano fine de sia labortago.

“Ĉu vi vidas tie tiun arbareton?”, diris Luka. “La tero cirkaŭ ĝi estis mia vitejo. Mia patrino devis ĝin vendi pro la proces-elspezoj. Kiom ofte dum la pasintaj jaroj mi songis esti tie pioĉante aŭ dum rikoltado.”

Andreo observis sian amikon sen rimarkigi tion. Luka aspektis malgaja sed trankvila.

“La monaĥestrino senpaciencis scii de mi”, diris Andreo, “ĉu vi revenis afliktita.”

“Kontraŭ kiu mi devus esti tia? Ĉu kontraŭ mi mem?”, respondis Luka.

Antaŭ iliaj okuloj etendiĝis kelkaj centoj da kampetoj, ĉiunuanĉe flavaj kaj ruĝaj, kun maloftaj verdaj makuloj, ĉiu, en la menso de la vilaĝanoj, havanta antikvan familian nomon, disdividitaj de heĝoj aŭ de ŝtonmuretoj; sulkitaj valdirekte, sed senregule, de mallarĝaj padoj ilin kunligantaj.

La suno mortanta orumis la migdalujajn branĉojn, rozkolorigis la veprojn kaj la ŝtonmuretojn, kiuj limigis la bienetojn.

“Ĉu vi vidas tie tiun pajlokabanon?”

Li rekonis ĉiun terbulon, fosaĵon, arbuston, ĉiun ŝtonon kaj en liaj okuloj brilis emocio, kiel dum rigardado de antikvaj karaj bildoj.

El la punkto, kie ili sidis, videblis ankaŭ la konstruaĵoj de Pertikara, sele sur altaĵo.

“La pasintan semajnon mi estis tie”, diris Andreo okulmontrante la vilaĝon.

“Kiel fartas Jasmeno?”, demandis Luka. “Dum la proceso ŝi kondukis kontraŭ min kiel furio. Ĉu ŝi ankoraŭ malamas min?”

“Ŝi ankoraŭ timas”, diris Andreo. “Ŝi ankoraŭ prifunebras sian fratinton.”

“Laŭreta estis knabino bona kiel pano”, diris Luka. “Antikvamora knabino. Se mi ne estus aminta alian, ŝi estus por mi la plej taŭga edzino. Sed oni ne povas ami virinon kaj fari filojn kun alia. Ili estus bastardoj.”

“Antaŭ ol iri ĉe ŝi, tiun vesperon, ĉu vi renkontiĝis kun Ortensia?”, demandis Andreo per hezitema voĉo.

“Jes, mi parolis al ŝi”, diris Luka. “Kiel vi scias tion? Kiu diris tion al vi?”

“Mi ne sciis tion”, pardonpetis Andreo. “Temis simple pri demando.”

“Tio devintus esti adiaŭo”, pluparolis Luka. “Ankaŭ Ortensia, kiel vi scias, pelis min al edziĝo. Mi volis ŝin informi, ke tiun vesperon oni fiksos la definitivan geedziĝ-daton. Tial ke ŝi petis tion de mi, mi pretis por tiu sinofero. Mi sciis, ke mi estis riskonta freneziiĝon, sed mi volis certigi ŝian pacon kaj ĉesigi la klaĉojn. Tiu estis mia intenco. Vi devas scii, ke la ĉefa pordego de Ascia-domo, dumvintre, kutime restis fermita. Oni eniris la domon tra malantaŭa pordeto, apud la magazeno. Eble pro tio neniu min vidis. Mi esperis trovi Ortensian kun la edzo. Kun li mi devis ordigi aferon pri liverado. Male ŝi estis sola. 'Silvio eliris', ŝi diris, 'li estas en la kafejo por la kutima kart-ludo kun pastro Serafino'. 'Mi devas demandi al vi ion gravan', mi tuj diris al ŝi. 'Tial ke de via respondo dependos

mian estonton, mi vin petegas mediti antaŭ ol paroli. La demando estas ĉi tiu: Ĉu vi vere volas ke mi edziĝu?'. Ĉe mia demando ŝi ekploris kaj respondis al mi per ĉi tiuj vortoj, kiuj ne lasis min sola dum kvardeko da jaroj: 'Ne, Luka, mi ne povas tion deziri, ĉar mi vin amas ĉiun tagon plie; sed bedaŭrinde mi povas promesi al vi nenion'. 'Mi nenion petas de vi', mi diris falante ĉe ŝiaj genuoj. 'Se mi havas vian koron, mi bezonas nenion alian'. Ŝi helpis min stariĝi kaj ĉirkaŭbrakis min. Tiu estis la unuan ĉirkaŭbrakon, kiun mi ricevis de ŝi -kaj estis ankaŭ la lasta. Tiumomente mi sentis ke inundis min ĝojo senlima, nekonata. Temis pri ia ekstazo. Ĉiu necerteco aŭ timo forlasis min. Ĉu vi povas diri al mi, kio okazas en la animo dum tiuj momentoj? Subite la tuta mondo aspektas aliel. Se mi estus vidinta flugantajn ĉevalojn, tio neniel mirigus min. Vi devas min pardoni, Andreo. Mi bone komprenas ke mi diradas stultaĵojn. Sed ankaŭ vi, mi pensas, jam enamiĝis almenaŭ unu fojon. Ĉu estas ĉiam tia la amo? Mia Dio, mia Dio, mi ne plu rekonis la kreitaron. Mi sentis la ĉielon en mia koro. Estis kvazaŭ el mia kapo elŝprucus centoj da steloj. Feliĉo trapenetris mian estaĵon kaj ekbrulis tie per lumo de mi nekonata. La tuta tero rondiris ĉirkaŭ ni kiel turbo.”

“Kiam mi fine trovis min denove surstrate”, daŭrigis la rakontadon Luka, “mi rememoris pri la famili-kunveno en Pertikara. Mi jam malfruis. Mi devis iri tien por decidi la nuptodaton. Komence tio aspektis kiel strangaĵo, sensenca sindevigo, fiksita en alia vivo. Mi estis konfuzita. Mi marŝis kiel aŭtomato. Mia nura zorgo estis ne pligravigi la malfruon. Pro tio mi kuris. Mi kuris renkonte al mia ruiniĝo. Mi ekiris ĝuste laŭ ĉi tiu pado, kvankam vintre ĝi estas danĝera. La neĝo, amisigita de la vento, plenigis kavojn kaj fosaĵojn. Plurfoje mi sinkis en ĝi. Mi havis unu nuran timon, ne tro malfrui. Sed kiam mi troviĝis antaŭ Laŭreta kaj ŝia familio ariĝinta por prifesti la daton de nia geedziĝo, mi ne scias kiel mi min tenis stare. La planko kaj la vandoj de la ĉambro fortege tremis sub miaj piedoj, kvazaŭ pro daŭra tertremo. Mortiga laceco ekregis ĉiun artikon de mia korpo. La koro fariĝis al mi peza kiel rokego. Mi komprenis ke la sorto min ĉikanis. Mi estis kiel muso en kaptilo. Ĉiu elkora vorto de Laŭreta plipezigis mian konfuzon kaj kulposenton. Mi scias ke senespero dirigis al mi nekoherajn vortojn. Laŭ la juĝisto ili estis la pruvo de antaŭtempa konscienc-riproĉo pro la murdo ankoraŭ ne plenumita. Kiam mi foriris el Pertikara, mi estis certa, ke mi ne estos viva la postan matenon.”

“Estis nur la deka vespere”, diris Andreo. “Apenaŭ noktiĝis. Bonvolu min pardoni, se mi tion demandas, vi ja povas rifuzi respondi: ĉu vi reiris ĉe Ortensia?”

“Ne”, tuj diris Luka. “Kia demando estas ĉi tiu? Ĉu vi do komprenis nenion pri la situacio, en kiu mi troviĝis?”

“Bonvolu min pardoni.”

“Kiel tio povus okazi?”, insistis Luka. “Atentu, mi ne demandas kiel ĝi povus okazi konkrete, sed mense. Elirinte el la domo de Laŭreta, mi sentis min

neniigita, kvazaŭ monto estus falinta sur mian kapon. Mi ne kredis min kapabla travivi tion.”

“Kie vi pasigis la tempon ĝis la tria nokte?”, demandis Andreo plue. “Ĉu vi vagis sencele tra la kamparo?”

“Mi ne scias precize”, diris Luka. “Mi ripetas, mi estis preskaŭ sveninta. Plurestadas en mia menso du memoroj senkoneksaj. Ŝajnas ke tiun nokton, kompreneble senvole, mi eĉ faris miraklon.”

Andreo ne tuj komprenis pri kio temis. Luka montris al li preĝejeton konstruitan rande de mont-apikaĵo.

“Ĉu vi jam estis tie?”, li demandis.

Sur la monto, malantaŭ la preĝejeto, videblis palisaro kaj ĉirkaŭ la ŝafaro kiu estis en ĝi, svarmado da paŝtisto, kvazaŭ formikoj.

La preĝejeto aspektis kiel peco de kristnask-kripa puparo.

“Iam, kiel knabo”, respondis Andreo. “Iam oni iris tien pilgrime unu fojon jare. “Mi ne scias ĉu oni ankoraŭ faras tion.”

“Mi volas rakonti la originon de la fresko, kiu troviĝas sur muro tie”, diris Luka.

“La kapelon, kiel vi scias, oni konsekris al Sankta Gabrielo de la Suferanta Dipatrino. Mi ne komprenis kial tiun vesperon mi grimpis ĝis tie. Eble ĉar antaŭ iom da jaroj, iu sinmortigis ĵetante sin de tiu krutaĵo. La nokto estis klara kaj frosta. Kiam, elĉerpita kaj ŝvitanta, mi atingis la supron de tiu apikaĵo, mi aŭdis veni el la interno de la kapelo ĝemado. La kapelo, mi ne scias ĉu vi tion memoras, estas senporda. “Kiu tie?”, mi kriis. Tra la sojlo antaŭeniĝis virino ĉifon-kovrita. Temis pri almozulino, kiu preĝis antaŭ ol endormiĝi. Ni ĉiuj konis ŝin. Somere ŝi kutimis dormi en la interkampaj fosaĵoj, vintre en la fojnejoj aŭ sub la preĝejaj portikoj. La unua strangaĵo estis ke, en la konfuzostato en kiu mi troviĝis, kiam mi vidis ŝin mi tuj memoris, ke mi havis enpoŝe mil lirojn. Ilin pruntedonis al mi sinjoro Silvio por aĉetado de vitejo antaŭ la geedziĝo. Tial ke mi estis mortonta, ili ne plu utilis al mi. “Prenu”, mi diris al la malriĉa virino, kaj metis enmane al ŝi la bank-bileton. Tiam ĝi estis alta monsumo. Mi ne scias ĉu ŝi tuj komprenis la valoron de la donaco, sed mi memoras ke ŝi ne plu ĉesis danki min. 'Estu benata', ŝi diris, 'estu benata'. Sed la dua granda strangaĵo estis ke, mi ne scias pro kiu instinkto, mi sentis ian pudoron ĵetiĝi el la krutaĵo antaŭ la okuloj de tiu malfeliĉulino. Eble mi zorgis pri la timo, kiun ŝi suferus pro tio.”

“Nun mi memoras la freskon, kie oni bildigis vian geston”, diris Andreo ridetante.

“La almozulino, en ĝi, ricevas la monon rekte de la manoj de Sankta Gabrielo de la Sufernata Patrino.”

“Pri tio parolis al mi pastro Serafeno”. Diris Luka. “Tia estis, ŝajnas, la versio de la almozulino. Certe estas, ke tiun nokton kaj diabloj kaj angeloj estis tre okupitaj en ĉi tiu valo.”

“Ĉu pastro Serafeno do konas ambaŭ versiojn?”

“Li scias ĉion, la historion sanktan kaj la profanan.”

“Malantaŭ ĉiu historio estas ĉiam alia historio”, diris Andreo. “Kiamaniere oni

poavas scii, kiu estas la vera?”

“Mi scias ke dum la pasintaj semajnoj, vi multe turmentis la kompatindan pastron Serafenon”, diris Luka. “Vi ne devas lin juĝi malbone.”

“Vi pravas”, komentis Andreo. “Li estas bona ulo.”

“Io plie eĉ”, aldonis Luka. “Bone konante lin, li estas pli ol bona ulo.”

Antaŭ la fojnejo pasis kelkaj azenoj, kiuj portis barelojn surdorse per vekto. Ilin sekvis kelkaj kamparanoj. Pasante antaŭ ilin, tiuj turnis la kapon aliflanke.

“Iam, renkontiĝante en la kamparo”, diris Luka post kiam ili malproksimiĝis, “eĉ inter nekonatoj, oni salutis sin reciproke.”

“Sed ni ne estas nekonatoj”, klarigis al li Andreo.

“Se tio estas la kaŭzo, mi bedaŭras pro vi”, diris Luka. “Mi kompromitas vian politikan karieron.”

“Male, por mi tiu estas faciligo”, diris Andreo ridante. “Tiel oni ne plu petas de mi rekomend-leterojn.”

La suno jam subiĝis. La du ekstaris por iri reen. Sed ili ne volis iri laŭ la sama vojo. La nova pado estis nur best-pasejo. Luka spiris plenpulme, vere plezure. Tial ke ili alvalis, konversacio ne lacigis.

“Mi ne komprenas”, li diris, “kial certaj personoj nomas fetoro la bovin-ellasaĵojn.”

“Ili havas malsaman nazon”, klarigis Andreo. “Verŝajne tiun vesperon por alvaliĝi vi iris ĉi tiun saman vojon.”

“Verŝajne”, diris Luka, “sed mi tute ne memoras tion. Kiel la tempo pasis, kion mi faris, ĉu mi vidis iun, mi tute ne rimarkis aŭ simple forgesis ĉion tuj poste.

Alveninte ĉe la meulil-kanalo, mi ne scias kial mi ne plu efektivigis mian intencon mortigi min. Ĉu iu detenis min? Ŝajnas ke mi restadis kelkajn horojn senmova rigardante la akvofluon. Tion oni rakontis al mi. Verŝajne tio estas vera.

Senespero penetris ĝis la animfundo kaj min paralizis. Mi ne plu distingis nokton disde tago. Kiam, kelkajn horojn poste, mi ekkomprenis ke mi troviĝis enmane de karabinjeroj, mi sentis min iel senpezigita. Dum iom da tempo mi ne plu estos bezoninta mian volon. Nun, mi pensis, ili devas zorgi pri ĉio. De la terura senesper-abismo, el kiu mi eskapis senvunda, restis al mi nur totala laceco. Min ridigis tiuj, kiuj min pridemandadis kaj minacis tutvivan malliberon. Eĉ ne la infero estus timiginta min. La tagoj pasis sen mia interveno aŭ prizorgo. La aresto estis elir-vojo doncaita de l' bonŝanco kompare kun sinmortigo. Kion mi povintus fari kontraŭ la sorto, krom lasi ĝin efektiviĝi?”

Alvenintaj ĉe la ponteto apuda al la antikva muellil-kluzo, la du haltis kelkajn minutojn rigardi la akvofluon. En tiu loko blovis ankaŭ iom da freŝa venteto tre agrabla.

“Mi diros al vi sincere”, daŭrigis Luka, “ke komence mi ne kapablis antaŭtaksi kiom longa kaj dura tiu peno estas. Mi ne parolas pri la dek jaroj da absoluta apartigo. Por trakti ĝin mi devus repensi pri tio, kaj la sola memoro estus tro suferiga. Se estus ebla operacio por elradikigi ĉiun memoron pri tiuj dek teruraj

jaroj kiel enterigito, mi akceptus ĝin senprokraste. Mi povas nur diri al vi, se vi ne scias tion, ke estas ege pli granda diferenco inter enĉela absoluta apartigo kaj ordinara mallibero ol inter ĉi lasta kaj kompleta libero. Unuvorte tio min brutigis. Mi sentis min pli kiel azeno aŭ mulo ol kiel homo. En tiaj kondiĉoj mi ricevis la unua leteron de mia patrino, aŭ pli bone, via unua letero, kiu raportis la informojn pri Ortensia, pri ŝia disiĝo de sinjoro Silvio, pri ŝia rifuĝo en soleca loko, pri ŝia daŭra korinklino al mi.”

“Ĉu estis Ortensia, kiu kaŝiĝis sub la nomo Verdinjo?”, interrompis Andreo.

“Kiom mi estis stulta ne kompreni tion. Kiam via patrino diktis al mi leterojn, ŝi nur paroladis pri ŝi, pri ŝiaj salutoj kaj pensoj por vi. Kaj mi ne sukcesis diveni pri kiu ŝi parolis.”

“Neniu estus kopmpreninta”, rekomencis Luka. “Mi nomis ŝin Verdinjo kiel knabo, pro ŝia okul-koloro. Eĉ ne mia patrino konis tiun kromnomon. Certe, por gardi la sekreton, Ortensia mem sugestis ĝin al ŝi. Malgraŭ la tutviva mallibero kaj la apartigo, tiu letero mirinde efikis al mi. Subite mi troviĝis en la ekstazostato, kiun mi spertis post nia lasta renkontiĝo, antaŭ la aresto. Mi sentis en mi la superhoman potencon de amo, la senkomparan pacon de harmonio inter du sin reciproke amantaj koroj. Distanco estis sufero, sed am-sufero. Mi eĉ ne povis abomeni malliberon, ĉar tial ke mi akceptis ĝin, senvualiĝis al Ortensia la forto kaj kvalito de mia absento kaj sukcesis rompi la kontraŭnaturan ligan, kiu ŝin kunigis al la edzo.”

Andreo kaj Luka pluris silente ĝis la vilaĝo. Jam vesperiĝis, oni jam ŝaltis la unuajn lumojn. Bestoj reeniris stalojn, dom-kamenoj fumadis por sup-kuirado, sur la akcioj ĉirpis griloj.

“Ni malfruis”, pardonpetis Luka.

“Ho, ne, ĉu grave?” diris Andreo. “Mi ekvojaĝos morgaŭ.”

Ili trairis la placon antaŭ la forlasita preĝejo de Sankta Bartolomeo kaj eksidis sur ŝtonan benkon apud ĝia pordo.

“Mi tiam komencis serioze pripensi kiel eliri el tio”, rekomencis Luka. “Ankaŭ Ortensia, el la monaĥinejo, okupiĝis pri tio laŭ ŝiaj eblecoj, ŝi engaĝis advokaton kaj monsinjoron. Cetere mi estis kondamnita pri murdo, kiun mi ne kulpis. Sed justico estas senkompata maŝino. Ĝi ne toleras ajnan ŝercon. Kiam mi rekomencis aŭdi ilin paroli pri artikoloj kaj paragrafoj, mi komprenis ke ne estis elirvojo. Tiu artikolo kaj tiu alia paragrafo, diradis la advokato, postulas por revizio de la proceso novan fakton. Kiu esta la nova fakto? Demandis la advokato. Ni ne bezonas nonan fakton, mi respondis al li; devus sufiĉi, mi opinias, la malnova fakto, ke mi ne kulpas, tio estas ke mi ne mortigis tiun homon. Ne, tio tute ne koncernas la Punan Kodon; tio, kio povas ĝin koncerni estas nova fakto, insistis la advokato. Sufiĉas, mi senpacientiĝis, mi volas nenian rilaton kun la kodo, mi respondis. Nova fakto certe ekzistis, sed ĝi koncernis nek kodojn, nek advokatojn.”

“Kion vi celas?”, demandis Andreo.

“La nova situacio de Ortensia”, klarigis Luka. “Nu, mi pensis turniĝi rekte al la reĝo. Tribunaloj devas juĝi laŭ la libro, mi diris al mi, sed la reĝo, se li volas, rajtas juĝi laŭ konscienco.”

“Ĉu vi volis rakonti viajn aferojn al la reĝo?”

“Absolute ne”, klarigis Luka. “Se li estus akceptinta min, mi simple demandus al li tion: ‘Ĉu vi konsentas, ke ĝentlemano rakontu al neniuj, eĉ ne al la reĝa tribunalo, certajn faktojn, kiuj koncernas lian honoron kaj la honoron de la virino, kiun li amas?’ La reĝo, mi imagas, certe estus konsentinta tion, senzorge pri la artikoloj kaj paragrafoj, kaj tuj estus ordoninta min liberigi.”

“Jen afero nekonata”, murmuris al si Andreo. “Ekzistis monarkisto en Italio.”

“Sed kiel atingi la reĝon?” daŭrigis Luka. “Tio ege pensigis min. Skribi al li, mi jam tion provis, ne prosperis. Tiel tagon saltis en mian kapon, ke la juĝisto kun kiu oni daŭre rilatas dum la proceso, ĝuste nomiĝas reĝa prokuroro. Se li havas tian titolon, mi pensis, li evidente frekventas la suverenen. Sed kiel sukcesi alparoli lin por obteni tiun tre deziratan renkontiĝon? Bedaŭrinde post pluraj leteroj, kiuj restis senrespondaj, mi ne vidis alian elturniĝon krom provoki novan proceson. Tion mi bedaŭris, sed temis pri la sola maniero por devigi lin veni ĉe mi. Kiu jaro estis? Mi ne rememoras; sed mi memoras, ke mi tiam sidis en Portolongone. La direktoro, malgraŭ la malbela profesio, ne estis mava. Kiam ni plendis pro io, li nin aŭskultis kaj, tial ke li havis belegajn dentojn, ofte ridetis. Do tagon mi alproksimiĝis al li, unue mi pardonpetis pro la ofendo, kiun mi estis faronta al li kaj poste mi bele pugno-karesis lian makzelon, faligante li alteren. La damaĝo montriĝis ege pli grava ol kiom mi antaŭkalkulis, tial ke liaj dentoj estis falsaj. Li kraĉis ilin kiel manplenon da blankaj fazeoletoj. Sed kiel mi povintus scii tion? Plej aĉe estis poste kun la reĝa prokuroro. Kun tiu mi serioze disputis. Dum mi, per la pej granda respektemo, kiun mi kapablis, klopodis klarigi al li la motivon de mia pugnofrapo kaj strebis persvadi lin fiksi renkontiĝon kun la reĝo, kompreneble kiam kaj kie tiu preferis, ĉu vi scias kion tiu kreteno kontraŭmetis al mi? Li tenis enmane la libreton de la artikoloj kaj paragrafoj kaj volis montri al mi kiujn numerojn pritraktis mian novan krimon. ‘Tiujn numeretojn povas teni vi’, mi diris al li bonmaniere. ‘Per viaj numeretoj’ mi klopodis klarigi, ‘mi vere ne scius kion fari’.”

“Kaj fine vi batis lin”, diris Andreo.

“Mi estis devigita. Kiel vi eksciis tion?”

“Tio estis menciita”, klarigis Andreo, “en la motivigo de la malkoncedo de la suverena amnestio post la trideka jaro de via puno.”

Jam noktiĝis.

“Kioma horo estas?”, demandis Andreo. “Mi statas, kvazaŭ mi longe sonĝus.”

Luka ridetis. La du ekstaris por reiri hejmen. Kaŝiĝinte inter la folioj de akacia arbeto, grilon modulis sian ĉirp-ĉirp monotonan, insistan, daŭran; ĝi vokis sian inon, kiu malfruis. En la blankeca ĉielo super Pertikara, leviĝis luno last-kvarona, flava kiel tro matura melon-tranĉaĵo. La silenta strateto plu konservis la tagan

varmeton. La solaj viv-simptomoj estis tiuj de bestoj en staloj.

“Bone pripensante tion”, diris Andreo, “estis certe pluraj, ĉi tie en Cisterna, la personoj konvinkitaj pri via senkulpo rilate al la rabado.”

“Ke mi ne estis murdisto”, diris Luka, “mi kredas, ke ĉi tie ĉiuj sciis, escepte de la karabineroj kompreneble. Kiel oni motivigus alimaniere la rankoron, kiun ankoraŭ hodiaŭ la maljunuloj sentas al mi? Vi sciu ke, tempe de la lastaj rabistoj (mi bone memoras tion, ĉa mi jam estis knabo) ankaŭ du viroj el Cisterna kaŝiĝis en la makiso kaj krimis rabadojn kaj murdojn: nu, la plejmulto de la popolo simpatiis al ili. Sed mia krimo, juĝe de la vilaĝanoj, estis tute alia, ege pli grava.”

Fine de la strateto subite aperis knabo.

“Toni”, diris Andreo. “Li certe serĉis nin la tutan vesperon.”

“Aŭskultu min”, diris Luka haltinte kaj tenante Andreo ĉe brako. “Vi devus zorgi pri tiu knabo, portu lin al Romo, lernigu al li metion.”

“Mi jam pensis pri tio”, diris Andreo. Sed vi restus sola, inter ĉi personoj.”

“Ili neniam timigis min”, diris Luka ridetante. “Kaj mi ne longe vivos.”